HUNGARA VIVO

1968

3

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio

Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1968, VIII-a jaro, 3-a n-ro

Sur la frontpaĝo: István Dési Huber, Memportreto

Ágnes Lukács: La hungara pentroartisto István Dési Huber 1
István Kende: Vjetnamaj ŝirmejoj. Trad. *K. Kalocsay* 5
Béla Lengyel: Gorkij kaj la hungaroj. Trad. *P. Balkányi* 6
Tibor Ujlaky—Nagy: La Esperanto-instruado en Hungarlando 8
El nia vivo kaj kulturo 9, 29
Etelka P. Balasi: Árpád Tóth. Trad. *L. Kökény* 12
Árpád Tóth: Elegio al genistarbeto. Trad. *K. Kalocsay* 12
Magda Szabó: La rolo. Trad. *L. Tárkony* 13
Aurél Ponori Thewrewk: Pri la spacesploradoj 15
Zsigmond Móricz: Jóska Samu Kis. Trad. *Krisztina Nyitray* 17
Sándor Szathmári: La Tragedio de l'Homo 18
Kelkaj hungaraj kantoj. Trad. *K. Kalocsay* 20
Recenzo 7, 21
Eĥo—Reeĥo 21
Lajos Lesznai: Dudek horoj 22
Lajos Pusztai: La sporto kaj Esperanto 23
Imre Szenes: Kiuj duafoje venas en la mondon. Trad. *Z. Illéssy* 25
Márta Nádasdi: Pri la teatroj de Budapeŝto 26
Jenő Csongrádi: Hidropneumatika dragmašino. Trad. *F. Egry* 28

JUNULARO

Sándor Tatay: La memorlibro. Trad. *K. Gyulai* 24
Géza Gárdonyi: Por niaj karaj infanoj. Trad. *Ada Csiszár* 30
Korespondi deziras 31
Ridetu ! Ridu ! Ridegu ! 31
Ludas Matyi 32

Ĉefredaktoro: Ludoviko Kökény
Responda redaktoro: d-ro Jozefo Mátéffy
Redakta Komitato:
Szilárd Bálint, Imre Botos, Lajos Lesznai, Andreo Szabó kaj Tibor Ujlaky-Nagy
Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Kolomano Kalocsay
Sándor Szathmári kaj Lajos Tárkony
Arta ĉefkunlaboranto: Ágnes Lukács
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224—819
Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj en la Centra Gazetoficejo de la Poŝto)K. H. I., Budapest, V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.
La jara abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.-40 poŝtelspezo.

68.65892 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25377

Laboristoj de la Minejo de Komló n-ro 2.

Gvidlibro por Supera Ekzameno

Hungara Esperanto-Asocio plenumis gravan servon por la kulturo de Esperanto, eldoninte tiun ĉi skizon de Historio kaj literaturo de Esperanto. Apartaj ĉapitroj enhavas la vivon de Zamenhof, la unuan jardekon de Esperanto, la evoluon ĝis la unua mondmilito, la novan epokon post la dua mondmilito ktp. Sur 21 paĝoj ni povas studi la historion de la E-movado en Hungario. La plej grandan interesiĝon povas veki la Skizo de Esperanta Literaturhistorio — el plumo de K. Kalocsay, sur 77 paĝoj. Detalaj indeksoj, suplemento kaj bibliografio faciligas la uzeblon de la libro. La redaktoro de la Gvidlibro por Superaj Ekzamenoj prof. Alfonso Pechan — ankaŭ verkinto de pluraj ĉapitroj — faris tre bonan laboron. Kunlaboris ankoraŭ: P. Balkányi, L. Kökény, d-ro S. Szerdahelyi kaj H. Vatré. Lektoris Emilia Radvánszky. Ĉar tiu ĉi ekzamena materialo, resp. „baza kono por estontaj kaj praktikantaj lingvoinstruistoj" estas la unua en sia speco, ĝi povas esperi ankaŭ eksterlandan sukceson. Amplekso: 190 paĝoj, prezo: 20 forintoj. Mendebla ĉe Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, VIII. Kenyérmező utca 2.

István Dési Huber

(1895—1944)

Ni staras antaŭ la memportreto de István Dési Huber. Karbodesegnaĵo. Decidaj linioj, larĝe kaj pasie tiritaj. La pugnon li premas al sia brusto. Sur la vizaĝo streĉiteco, amareco. En la fono sur la muro reproduktaĵo de Picasso: „Fuĝantoj".

La vidvino nomas tiun ĉi desegnaĵon *Sinturmenta memportreto*. „Jes, ankaŭ per tiu ĉi ekmovo li montris: mi sentas foje-foje, kvazaŭ oni kaptus min en tenpremilon kaj oni premus min tiel, ke mi pensas, tuj rompiĝos miaj ripoj."

Tiam pasis du jaroj post la grava pulmoperacio, kiu ja ne resanigis lin, nur iom plilongigis lian vivon. Tamen dum la naŭ malfacilaj jaroj post la operacio li pentris siajn plej bonajn verkojn.

Sed la teruran premon li sentis ne nur korpe. La dato de la bildo estas: 1938. Ni estas en la dek-oka jaro de la Horthy-faŝismo. En tiu ĉi tempo li maturiĝas al homo, okazas lia artista evoluado. Kaj nun la ĉielo eĉ pli malheliĝas. Ĝi estas la jaro de la perforta anekso de Aŭstrio al Germanio. Ni citas el lia tiama letero: „Oni vane vidas la certan, puran linion, prezentitan de la perspektivo, vane oni scias, ke ĉio ĉi estas nur la abomenaĵo, heredita de nia generacio, ke ĉio estas nur pasanta malbono, tamen oni sentas la barojn de la historia momento, vidas la mokadon de la grandaj kaj sanktaj aferoj, kaj oni ruĝiĝas pro la senhontemo de niaj impertinentaj, cinikaj tagoj. Do tial estas la amareco, la sufoka soleco, tial estas la melankolio. Cetere mi estas, kiu estis, kaj ankaŭ restos tiu."

Tiun ĉi konfeson kvazaŭ ni povas legi de sur lia memportreto. Do kiu estas tiu ĉi pentristo?

István Dési Huber naskiĝis en Transsilvanio. Lia patro estis

Tagmeza ripozo

etmetiisto. Kiel kvarjara li perdis la patrinon. Ĉar la patro bankrotis, li ne povis plu lerni, kaj ekde sia dekdu-jara aĝo li perlaboris sian panon. Multe li vagadis, vidis — kaj legis pri diversaj temoj. En sia aĝo de deknaŭ jaroj li devis soldatiĝi kaj pasigis kvardek monatojn sur la batalkampo. Li venis hejmen kun pulmomalsano.

Nun li jam eklernas metion, la orajistan fakon kaj konekse kun tio li lernas ankaŭ desegni. En 1921 li ekloĝas en Budapeŝto, regule laboras en fabriko kaj desegnas en libera lernejo. Li trovas eminentajn amikojn. Li edziĝas. Persiste kaj avide li konatiĝas kun la malnova kaj siatempa arto, kun la belartaj teknikoj, kaj kun ĉiu tereno de la kulturo, kun la sociaj problemoj. Lin helpas en tio la klera, progresema edzino kaj liaj laboristaj amikoj. En 1924 li vojaĝas al Italio, kaj ĉi tie li vivas kaj laboras dum tri jaroj. Hejmen alveninte li ĉiam pli ofte partoprenas ekspoziciojn. Kaj oni ekatentas pri la sincervoĉa juna artisto.

En 1928 pretiĝas la linotipa serio sub titolo *IVa Ordo*. Tiam estis luktoplenaj jaroj de la Eŭropa laborista movado. Batalema fido esprimiĝas sur la folioj, sur kiuj la blanka kaj nigra koloroj frapas unu al la alia per granda forto, anoncante la venontan venkon de la IVa Ordo, de la laborista klaso. Ekz. sur unu el la bildoj aranĝita amaso de laboristoj, marŝanta kun standardoj nur kun sola pugno preparas sin alfronti la bajonetajn pafilojn defendantajn la malnovan ordon. En la straton, kie tio okazas, ni povas rigardi de supre. La homoj estas simboligitaj nur per makuloj kun ritma moviĝo. Estas



El la linoserio IV a Ordo, Interfrapiĝo



Meditanto

simpla kaj simbola ankaŭ la figurado de la malnova ordo. Bona aranĝo kaj dinamismo karakterizas ĉiujn ok foliojn de la serio.

La pasia serĉado de la ordo karakterizas en tiu ĉi tempo ankaŭ lian pentroarton. Li laboras kun la metodo de la kubismo. Lia temo estas preskaŭ ĉiam la laboranta homo. Liaj bildoj de la muta naturo estas same konfesoj, eĉ se nerekte, aludantaj al la homo, al la socio. Ekzemple ankaŭ tiu bildo, sur kiu ni vidas preskaŭ enigme kaŝitaj inter la objektaj motivoj la insignojn de la komunista partio, la serpon kaj la martelon. (Pro tio li devis suferi ankaŭ karceron.) (Delikate agorditaj koloroj faras poezia la kompoziciojn kun severa principo)

La samon ni povas diri ankaŭ pri la *Tagmeza ripozo,* sur kiu ĉe subo de la rigide anguleca, bruna lignobarilo mole-inerte kuŝas la laca kamparanino. Ĉi tie la fono estas: la kamparo brulanta en flavo de la impeta sunbrilo kaj la domoj de la vilaĝo, ne en spektakla, sed en simbola koncepto. Inter la varmaj koloroj (ruĝaj, flavaj, brunaj) dominantaj sur la bildo estas trankviliga parteto la bluo kaj verdo de la vestaĵo de la virino.

Unuflanke la severeco de la angulecaj, duraj objektaj formoj, aliflanke la emocio de la rondaj homaj formoj: tiu ĉi kontrasto donas ankaŭ la streĉitecon de la bildo *Ŝakludanto.* Nian rigardon kurantan malantaŭen sur la kvadratoj de la ŝaktabulo, haltigas la peza amaso de la ŝakludanta viro, la rektangulo de la seĝodorso kaj la muro sentita malantaŭ ĝi. La figuro meditanta pri la sekva paŝo, pri la plej bona solvo de la batala tasko evidente estas figuro prenita el la vivo. Tamen ĝi ne estas ĝenrece hazarda, sed montras trans sian individuan memon; la figuro enkorpigas sian klason.

Dési Huber tiutempe estis membro de la Grupo de la Socialistaj Artistoj, kaj tie li faris ankaŭ teorian laboron. Li konsideris sia tasko, trovi marksisman respondon al la demandoj de la arto. Li diskutis, verkis artikolojn. Liaj priartaj, arthistoriaj artikoloj atestas pri granda scio, ili estas interesaj, klaraj kaj konvinkaj.

Dume lia malsano fariĝis pli grava. Li ĉiam pli ofte kaj pli longan tempon restadas en la pulmo-sanatorio de Budakeszi. Li suferas multe, ne nur, kaj ne unuavice rekte pro la malsano, sed pro tio, ke li estas kondamnata al nenifaro. Pri tio li plendas

en siaj leteroj skribitaj al la edzino. Korŝire estas legi, kiel li provas — nehavante farbon kaj penikon — figuri per vortoj tiujn multajn belaĵojn, kiujn li vidas. Ĉar kiel artisto, li vidas ĉiam multe da belaĵoj. Verdire ĉi tie, en la sanatorio li malkovras la naturon kiel pentristan temon. En multaj paĝoj li parolas pri la koloroj kaj formoj de la aero, grundo kaj arboj.

En 1936 okazas la — jam menciita — grava kaj sortodecida pulmoperacio. Li eltenis ĝin heroe. Kaj poste ankaŭ la malfacilajn monatojn de la resanigado. Post monatoj li komencas denove desegni, poste pentri — kun febra ĝojo. Finfine ! Li pentras la arbojn, la kroĉiĝantajn radikojn de la arboj, la branĉojn sopirantajn alten, la senfinon sugestantan, tamen fermitan terenon de la arbaro.

Kvankam li ne akiris tute sian sanon, kaj ankoraŭ atendis lin multaj suferoj — la naŭ jaroj post la operacio estis riĉaj je travivaĵoj kaj rezultoj. Lia pentroarto liberiĝis de la rigida disciplino — sur sin trudita — de la kubismo, lia arto fariĝis pli esprimpova, pli pasia. Sed la movriĉecon, la lirikan svarmadon, konkuradon de la koloroj kuntenas decida ordo sur liaj bildoj.

En la somero post la operacio li pasigis kelkajn semajnojn kun sia eminenta folklorista amiko en Bátorliget, en tiu ebenaĵa loko, fore de la ĉefurbo. Lia amiko notas kaj per tio savas de la forgeso la mirinde belajn fabelojn de la preskaŭ naŭdek-jara kamparano *Oĉjo Fedics*, li pentras la maljunan fabelanton kun pelta ĉapo, kun longaj lipharoj, klinantan la mentonon sur la manon, apogiĝantan sur bastonon, kun okuloj revantaj en la mondo de la fantazio. Malantaŭ li estas la senfina ebenaĵo kaj la karakteriza motivo de la pejzaĝo: baskulputo. Ankaŭ tiu ĉi bildo estas pli ol portreto. Oĉjo Fedics estas simbolo de la forrestinta, senhava hungara kamparanaro, kiu rigidiĝis en la pasinto.

Estas neeble, ne rekoni la enhavan parencecon de Dési Huber kun la granduloj de la samepoka hungara muziko kaj literaturo. Iuj el liaj bildoj estas decidaj aludoj al Bartók; tie kaj ĉi tie kvazaŭ aperus antaŭ ni en la lingvo de la koloroj la poemoj de Attila József aŭ de Gyula Illyés.

Lia bela travivaĵo estis foje en somero la restado en *Hollókő*, vilaĝeto en Norda-Hungario. La vilaĝeto — el etnografia vidpunkto ege interesa — konstruiĝis sur bela pejzaĝo. Ĝi proponis multajn temojn. La artisto dufoje vizitis sian naskiĝurbon, la Transsilvanian Dés. Ankaŭ de tie li portis kun si multajn desegnojn kaj bildojn, inter aliaj kelkajn kompoziciojn kun bubalo.

Sed ne nur la fora provinco kaj la kamparanaro, sed ankaŭ la grandurbo, la vivo de la laboristoj mem estas neelĉerpebla fonto. Pri tio atestas la bildo *Sonas la*

Ŝakludanto



Oĉjo Fedics

La vilaĝo Hollókő

Sonas la sireno

sireno kun sia movriĉa kaj peza firmamento, meze de la bildo kun supreniĝanta malhela fabrikfumtubo. Ĉe subo de la bildo kaosa amaso de homoj rapidantaj al komenco de la laboro, kaj tio estas pentrata per simila malstrikto kiel la nuboj mem sur la ĉielo. Inter la supra kaj malsupra tavoloj de la amorfaj, ludemaj formoj de la nuboj kaj homoj, la mezan strion de la bildo severe okupas la duraj, geometriaj formoj de la uzinaj konstruaĵoj. Li figuras per esencokaptaj okuloj sian junlaboristan amikon sur la elegante bela desegnaĵo: *Meditanto*. La direnhavo estas parenca al tiu de la malnova Ŝakludanto, sed kompare al ĉi-lasta kiom multe ĝi estas pli libera, pli senpera kaj ankaŭ pli simpla.

Ni estas en 1943. Dési Huber maturiĝis al konata, respektata, granda artisto. Kaj lia altnivela arto estas sincera, sindona servo por la popolo. Sed materiala sukceso apenaŭ akompanis lian artistan agadon. La tiama oficiala faŝisma politiko — kompreneble — ne rekonis lin. Sed la veraj komprenantoj kaj ŝatantoj de la arto vicigis Dési Huber inter la plej eminentajn hungarajn artistojn.

Ĉe fino de la jaro 1943 li subite malsaniĝas. Denove li devas iri en sanatorion. Ĉi tie, en la morta lito atingas lin la sciigo: por li oni juĝis la premion de la Societo Szinyei Merse. Tio kaŭzas al la malsanulo grandan ĝojon kaj alportas por li ankaŭ kelktagan, provizoran pliboniĝon. Sed post pli turmentaj suferoj ol la ĝistiamaj, okazis lia tragike frua morto. Oni enterigis lin la 27-an de februaro 1944.

Lia vidvino tiel komencas la biografion pri István Dési Huber: „Kiam en la tago post la enterigo mi vizitis lian tombon, super la tombejo krozis aviadiloj kaj post tri semajnoj la germanoj okupis nian landon. Tiam mi sentis: se mia edzo ricevis ian bonon de la sorto, estis: li ne devis travivi kio poste sekvis."

Kaj ni mem, kiuj transvivis tiujn tempojn, kaj alvenis al pli vera, pli libera vivo, povis ĝoji ankaŭ je tio, ke Dési Huber ricevis en 1958 la plej altan distingaĵon, la Kossuth-premion. Lia vivoverko servu kiel averto kaj instruo por multaj generacioj.

Ágnes Lukács

EL NIA 4-A N-RO:

La plej eminenta Esperanto-eldonisto: Vilmos Bleier. — Béla Balázs: Sep reĝidoj. — Sándor Szathmári: Kain kaj Abel. — Tradukoj de K. Kalocsay. — Raportoj pri la Somera Universitato en Gyula, pri la Int. Pedagogia Seminario en Szeged. — Novelo de Mikszáth. — Marjorie Boulton: Lasta letero. — Recenzo pri la majstra poemo de Majakovskij „Bone" kaj pri la poemaro de Kock. — Mór Jókai: nuntempe. — La hungara klasikismo. — La lingvouzo de Hungara Vivo.

István KENDE

VJETNAMAJ ŜIRMEJOJ

Alarmo. Dum nia nelonga tiea restado ne la unua, nek la lasta. El sep noktoj pasigitaj de ni en Hanoi eĉ unu ne pasis sen alarmo: okazis, ke en unu nokto kvarfoje ni serĉis rifuĝon en ŝirmejo. Tiel ni agas ankaŭ nun. La longa, mallarĝa betonbunkro de la hotelo pleniĝas en kelkaj momentoj per vere internacia societo: krom ni sovetanoj, kubanoj, germanoj, ĉeĥoj, ĉinoj, francoj improvizas kvazaŭ renkontiĝon interpopolan. Ankaŭ surstrate rapidas la pasantoj, kaj kiu ne atingas iun grandan publikan ŝirmejon, tiu simple saltas en iun ,,individuan bunkron", kiaj troviĝas longvice apud la trotuaroj. Tiu unupersona bunkro estas betoncilindro, en kiu, stare aŭ kaŭre, havas sufiĉan lokon unu homo aŭ patrino kun infano. Se la afero estas serioza, oni devas la bunkron kovri per betona fermoplato.

Per tiaj unupersonaj bunkroj tuta Vjetnamio estas dense provizita. Laŭlonge de la vojoj, de la padoj inter rizkampoj, ĉie troviĝas la cilindraj kavoj fositaj en la tero kaj interne tegitaj aŭ netegitaj per betono. Kaj ĉar ĉi tie ne ĉiu bunkro havas fermoplaton el betono, multaj infanoj taglonge kunportas dikan rondan platon plektitan el rizpajlo. Eĉ pli multaj kunportas rizpajlan ĉapelon, irante al laboro, al agro, al lernejo. Dika kaj peza, ĝi pezas ĉ. du kg-ojn. Kontraŭ bombo, kompreneble, ĝi ne defendas, sed kontraŭ la kugloj de la ŝrapnelbomboj ĝi povas ŝirmi la kapon, aŭ, kiel fermoplato de unupersona bunkro, la tutan korpon.

*

Quang Binh (Kŭan Binj), la plej suda provinco de Norda Vjetnamio, suferas la plej terurajn damaĝojn: du trionoj de la domoj estas jam neloĝeblaj ruinoj. La tuta loĝantaro vivas sub la tero. La ŝirmejoj havas jam tute evoluintan teknikon: se min ne ĝenus ĉi-koncerne la vorto, mi dirus: kulturon. Bone instalita kampkorto en Quang Binh konsistas nun ne el domoj, sed el kvin bunkroj. Du apartenas al la familio: unu por la maljunaj, unu por la junaj. Unu estas la ,,stalo" de la brutoj. Unu gardas la havaĵojn kaj ilojn ankoraŭ restintajn. Unu estas la kuirejo. Krome, ofte du familioj havas unu komunan gastoĉambron, pli ĝuste gastobunkron, por ke ilin ne embarasu, se ili subite plinombriĝas per neatendita gasto, elbombita parenco aŭ amiko.

Nam Dinh estas la tria plej granda urbo de Norda Vjetnamio. Tien ni vojas, sed nokte, por sekuro, ni dormas ekster la urbo en improvizita pura hoteleto. La dormoĉambregon kurteno dividas en viran kaj virinan fakojn, kaj apud ĉiu lito, tie, kie ,,pacotempe" oni tenas la pantoflojn, troviĝas unupersona betonbunkro. El la lito oni povas rekte ensalti, se necese. Sed niaj gastigantoj atentigas nin, ke ni ne uzu tiujn okaze de alarmo, nur se la bomboj jam falus. Se estas ankoraŭ tempo, ni kaŝu nin en la (samnombrajn) bunkrojn ekstere, ĉar se la bombantoj ŝutus napalmon, ekbrulus la domo, kaj tiam la interna bunkro estus pereiga. Ĉi-nokte, cetere, ni ne bezonis la bunkrojn, sed Nam Dinh estis bombata tiel, ke tremadis nia lito, kvankam ni estis en distanco de 8—10 km-oj. Sekvatage ni vidis la spurojn de la atako: bombo trafis la grandan katolikan preĝejon, mortis la episkopo kaj unu pastro.

Nam Dinh estas plejparte ruinurbo, nur kelkloke vidiĝas domoj, tre malofte pluraj unu apud alia. Sed estas grandaj partoj, kie eĉ murruinoj ne restis, nur ruboj kaj ruboj. Tamen, la urbo, kvankam ĉiujn lernejojn kaj multajn uzinojn oni ellokigis, vivas kaj laboras. Jen, tie, kvazaŭ tegmento de domo subtere droninta, vidiĝas speco de fasado. Kaj el la tero, tra oblikva koridoro, filtriĝas lumeto. La koridoro kondukas al subtera kamero. La instalo? Tornobenko — super ĝi lumas la ampolo —, kruda lignokuŝejo, ŝranko sur la muro por la iloj, tornistro pendanta sur najlo por mono kaj aktoj, pafilo apogita al la muro, — kaj super ĉio ĉi komandas unu sola knabino kun nigraj haroplektoj: la manipulanto de la maŝino. Ŝi estas tornistino. La maŝino estas unu el tiuj de iama fabriko. Kaj en distanco de kelkaj dekmetroj troviĝas alia kazemato kun alia maŝino, alia knabino. Okaze de alarmo la laboro daŭras plu, aŭ la knabino, se estas ŝia vico, kuras en la elkonduka tranĉeo al la pafejo, kaj per la maldik-tuba mitralo de antiaera defendo ŝi pafadas kontraŭ la bombantaj aviadiloj, defendante la urbon.

En la ellokigitaj lernejoj daŭras la instruado. Kvardek ses gelernantoj atentas la klarigadon en biologia horo. La lernoĉambro, iama garbejo kun tegmento rizpajla, aspektas strange: inter la benkoj, apud la mallarĝaj pasejoj, troviĝas tranĉeoj kondukantaj al bunkro.

En iu vilaĝo de la provinco Nam Ha ni ekatentas pri infana voĉbruo. Vilaĝa infanvartejo. Kiam ni enpaŝas, tuj kvindek infanoj tumultas, krietas ĉirkaŭ ni. Onjo vartistino ridante metas ordon. Nun la infanoj faras por ni etan prezentadon, kantojn ĥoras, scenon ludas. Poste, ankaŭ por nia honoro, okazas io kordoloriga: Vart-Onjo per fajfilo donas signalon: tri fajfojn. La prezentado ĉesas, la infanoj rapide viciĝas kaj serioze kaj disciplne iras al la kavo troviĝanta rande de la vartejo. Poste, unu post la alia ili sidiĝas, sur ilia ronda postaĵeto streĉiĝas la pantaloneto kaj ili jam glitas, kiel ĉe ni sur la naĝeja glitotabulo,

malsupren en la mallumon, en la bunkron. En kelkaj momentoj la tuta infanaro jam estas interne. Sed ĉi tiun ekzercon nun tamen fuŝas eta etulo, kiu retimiĝas antaŭ la glito en la mallumon kaj komencas plori. Oni klarigas: li ne estas vartejano, li vivas hejme kaj nur alŝtelis sin por vidi la fremdulojn: tial lin timigis, ke la aliaj malaperas sub la teron. Li havas hejme personan bunkron, ne konas ĉi tiun „ludon".

Je nova fajfo, longa fajfo, la infanoj venas el sub la tero sur ŝtuparo kondukanta plurajn metrojn ekster la domon. Oni povas ludi, kanti, saltadi, kiel faras la infanoj ĉie en la mondo.

*

Ekzistas Vjetnama vilaĝo, pli ĝuste ekzistis, ĉar ĝian lokon signas jam sole rubamaso kiel tiun de Lidice aŭ Oradour, kiun trafis 13 aeratakoj en 24 horoj. La provincon Quang Binh trafis meze po kvar bomboj sur ĉiu ĝia kvadratmetro. Tie oni rikoltas la plej multan rizon, kvankam la kampulojn laborantajn sur la rizkampoj oni senĉese atakas per pafoj: oni pafas de trans la limo, el aviadilo, el helikoptero. „En Quang Binh ne povas okazi rikolto sen sangoperdo" diras mia amiko, mem tieano.

*

En Hanoi ni vizitis subteran hospitalon. La ĥirurgo rakontas, ke la plej ofta operacio estas la kranio-cerbo-operacio: pro la aeratakoj, murfaloj, elrigardo el la nekovrita unupersona bunkro, ŝrapnelbomboj ktp. Poste li komencas paroli pri si mem:

— Vidu, tia estas vjetnama revoluciulo. Ĉu vi imagis tiel? Nu, monsieur, sciiĝu, ke mi estas la princo de Hué. Pli ĝuste: mi nur estis. Sed sude mi povus esti nek princo, nek kuracisto. ĉar mi havas mian opinion pri la aferoj.

Nia interpretisto, inĝeniero studinta en Hungario kaj brile parolanta la hungaran lingvon, subite, luktante kontraŭ plorsingulto, montras lokon en rubamaso.

— Tie troviĝis apoteko. Mia edzino sep minutojn antaŭ la bombado estis tie por aĉeti medikamenton por nia bebo. Baldaŭ post ŝia foriro, la domon trafis bombo de 320 kg-oj.

*

D-ro Ton That Tung estis iam princo en Hué, sed nun li sentas homa unu solan rangon, unu solan epiteton: tiun de revoluciulo. Li malamas la invadantajn amerikanojn kaj vivas kune kun la vjetnamaj popolanoj, volas vivi kune kun ili, ĉu ili estas sudaj aŭ nordaj. Vivi kun tiuj, el kies kranio eble li povas forigi, en subtera operaciejo, ĉe lumo de biciklolampo, la spliton de bombo.

Tr.: *K. KALOCSAY*

*

Vjetnama literatura vespero okazis la 12-an de Junio en Budapeŝto en araĝo de la Pedagoga Grupo „Verda Koro" de HEA kaj de la Junulara Komisiono de HEA. Béla Berceli, ĉefsekretario de HEA faris salutparolon en nomo de HEA, poste sekvis la parolo de Nguyep Hoang Ha, reprezentanto de la Sudvjetnamia Nacia Liberiga Fronto kaj kantoj de vjetnamaj studentoj. Post prezento de kantoj, deklamoj kaj muziknumeroj la grandnombra kunveno akceptis rezolucion, el kiu ni citas la sekvajn:

„Ni alvokas la tutmondan esperantistaron al pli aktiva internacia solidareco por Vjetnamio. La krimoj de la eskalado superas ĉion imageblan. La agoj de la militinstigantoj en Vjetnamio kaj aliloke estas endanĝeriga minaco al la mondpaco.

Ni postulas, ke Usono senkondiĉe kaj tuj ĉesigu la bombadon de Norda Vjetnamio, eltiru ĉiujn siajn armitajn fortojn kaj militmaterialojn el Suda Vjetnamio kaj strikte observu la Ĝenevajn Konvenciojn de 1954. Usono senprokraste ĉesigu la militon en ambaŭ partoj de Vjetnamio."

Béla LENGYEL

GORKIJ KAJ LA HUNGAROJ

En la komenco de la nuna jarcento Endre Ady, la juna ĵurnalisto en Nagyvárad salutis Gorkij-on, kiel la plej grandan el la novaj verkistoj, kiuj rigardas la verkadon ne celo, sed „kiuj skribas por ekskui, por krei dubojn, por disigi mensogojn kaj detrui idolojn." Ne longtempe post tio Béla Bartók deklaris pri li kun simila ekstazo.

La nomo de Gorkij havis la saman signifon kun la revolucia batalo kontraŭ la despostismo, kies celo estas ĉesigi ĉiuspecan subpremon kaj la liberan disvolviĝon de la kreaj talentoj de la homo. „Homo — kiel fiere sonas tiu ĉi vorto!" — sonis denove kaj ripete sur la scenejo ĉe la prezentadoj de la *„Nikta Azile."*

Krom liajn laŭvice aperantajn beletristikajn verkojn oni legis kun vigla atento liajn publicaĵojn senmaskigantajn la hipokritan, kontraŭprogresan etburĝan pensadon. Grandan interesiĝon vekis lia deklaro en 1907 pri caro Nikolao la unua kaj pri la 1848—49-jara hungara liberecmilito. Pro tio la caro malpermesis, ke li hejmenvenu. En tiu la verkisto komparas la germanan imperiestron Vilhelmon la duan al Nikolao la unua, „de kiu ja ni povas ankoraŭ atendi absurdajn agojn".

La profunda interesiĝo kaj simpatio de Gorkij pri la vivo, historio kaj literaturo de la hungara popolo ofte esprimiĝis ekde lia debuto ĝis la fino de lia vivo. En lia unua rakonto, en la *Makar Ĉudra* la cigano Danilo fiere rifuzas la oldan magnaton, kiu proponas al li egan monsumon por lia belega filino Radda: „Nur la sinjoroj kutimas vendi ĉiujn siajn havaĵojn ekde la porkoj ĝis la konscienco, sed mi estis soldato de Kossuth kaj mi nenion vendas-aĉetas!"

Li tradukigis ruslingven kaj eldonigis komence de la nuna jarcento *La tragedion de l'homo* de Imre Madách.

La verkoj de Gorkij antaŭ kaj dum la unua mondmilito ludis ĉiam pli grandan rolon en la lukto de la progresemaj tavoloj. Jozefo Révai sur la sojlo de la Oktobra Revolucio, parolante pri la celadoj de la revolucia literaturo metis unu apud la alian la

nomojn de Petőfi kaj Gorkij. Je printempo de 1919, okaze de la naskiĝo de la hungara Konsilantarrespubliko Gorkij sendis saluton al la hungara laborista klaso. Julio Juhász en sia respondo salutas „la spiritan gvidanton, la grandan poeton de la revolucia Ruslando, „la kunbatalanton de Lenin," — kies nomon ankaŭ li kunligas kun la nomo de Petőfi.

Post la falo de la Konsilantarrespubliko Gorkij — kune kun aliaj mondfamaj homoj — protestis kontraŭ la blanka teroro kaj en la tridekaj jaroj ankaŭ li elpaŝas pro la karcerigo de la verkisto Aladár Tamás. En 1931 li moke skribas pri la „kvinjara plano" de István Bethlen: Bethlen „pensas, ke por realigi la kvinjaran planon sufiĉas sole liaj deziroj kaj la libera krea energio de la laboristaro ne estas necesa. La gvidantoj de la burĝaro kreas tiamaniere anekdotojn, samtempe, kiam la laboristaro de Sovetunio faras novan historion."

Aladár Schöpflin informiĝis pri la interesiĝo de Gorkij je la nova hungara literaturo. Li pretigis en 1924 pri tio studon: „en tiu konvinko, ke mi faras servon al la afero de la hungara literaturo, se mi provas pliprofundigi la simpatian interesiĝon de unu el la plej eminentaj verkistaj spiritoj de la nuna Eŭropo." Kiam Kosztolányi en la sama jaro vizitis Gorkijon en Sorrento, tiu menciis la eminentajn hungarajn verkistojn Madách, Petőfi, Jókai kaj li deziris aŭdi kiel eble plej multe pri la nova hungara literaturo. En la dua parto de la 1920-aj jaroj Oszkár Gellért plu evoluigis signifplene la personajn rilatojn kun Gorkij. Al lia iniciato oni povas danki, ke „La Artamonovoj" aperis en la 1926-a jarkolekto de la literatura revuo „Nyugat" kaj la konatiĝon kun pluraj studoj de la verkisto, kiuj parolis pri la nova homo kaj pri la nova literaturo.

Dum la reĝimo daŭranta kvaronjarcenton, ĝis la liberiĝo de Hungarlando, la dekstrula kritiko, defendanta la reĝimon, ĉion faris por neŭtraligi la efikon de la verkoj de Gorkij. Ni renkontas diversajn plurajn nuancojn de la taksado: de la klerikala *Napkelet* — laŭ kiu Gorkij estas „putraĵa produkto" — "li estas la filo de la kaoso kaj la figuranto de la kaoso" — ĝis la komunista revuo „*Gondolat*", kies eseo-verkisto Béla M. Pogány donis eminentan marksistan analizon pri la nova kontemplado kaj pri la figurada maniero de la verkisto.

La tiel grava verkaĵo de la antifaŝisma publicaĵo de Gorkij, kiel la „*Kun kiuj vi kuniras, majstroj de la kulturo?*" aŭ lia mesaĝo adresita al la Amsterdama kontraŭmilita kongreso, resume aperis en la maldekstrula hungara gazetaro kaj kreis nemezureblan idean kaj politikan edifan efikon.

La neleĝa komunista partio donis ofte unuavice dum la uzinaj agitadoj la verkon *La patrino* en la manojn de la laboristoj. Samtempaj dokumentoj atestas pri tio, ke *La patrino* donis al la revoluciaj legantoj malriĉvilaĝanaj impulson por ties tuta vivo.

Endre Ságvári, la komunista martiro enskribis en sian karcertaglibron kelkajn vicojn de la *Miaj Infanjaroj*, en kiuj Gorkij priskribas tion, ke la kruelaĵoj suferitaj dum liaj infanjaroj faris lin sentema pri ĉiuj ofendoj kaj doloroj, ĉu tiuj rilatis lin aŭ iun alian, Zoltán Schőnherz antaŭ sia ekzekuto rakontis al siaj karcerkunuloj pri la enterigo de Gorkij.

En la jaroj antaŭ la liberiĝo, kiam la reĝimo fakte sufokis la maldekstrulajn revuojn kaj libroeldonadon, ĝi ne povis mutigi la voĉon de Gorkij En 1938 en la revuo *Tovább* (Pluen) de la Marta Fronto, aperinta en Debrecen, en ties unua numero denove kuniĝas la nomoj de Petőfi kaj Gorkij. Post la moto presita sur la titolpaĝo: („Se preni el la abundkorbo Egale ĉiu povos jam . . .") el poemo de Petőfi, sekvis la poeme de Gorkij, la „*Kanto pri la Tempestbirdo*", kiel protesto kontraŭ la faŝistigo, esprimanta la postulon de la revolucia transformiĝo de la hungara socio.

„Certe ni estas tre multaj" — skribas en 1931 Béla Illés — „kies okulojn Gorkij malfermis." Lajos Kassák kaj Lajos Nagy simile konfesas pri tiu efiko por sia tuta vivo jam antaŭ la liberiĝo. Por Lajos Nagy — same, kiel por Attila József — Gorkij estis la plej ŝatata verkisto. Tute „gorkija" estis tiu febro, kun kiu Georgo Bálint frontanta kontraŭ la faŝismo proklamas la „aktivan, batalantan literaturon", „la poezion de la luktanta homo." „Ne pri tio temas" — skribas Gyula Illyés respondante al la atakoj de la burĝa gazetaro — „ĉu Gorkij estas bona verkisto, aŭ ne. Pri tio temas, ĉu li estas bolŝeviko? Pri tio temas, ke vi povas iri sur la plej rekta vojo, vi povas alkroĉiĝi al viaj principoj ĝis via lasta spiro, vi povas esti la plej talenta homo de la mondo; vi estas perfidulo, vi estas fripono, vi estas sentalentulo, vi estas libera predo en tiu ĉi fajna vivo regata de la kulturo kaj de la moralo, se vi pekas eĉ nur per unu voĉo kontraŭ la pilastroj de la spirita konstruaĵo, kontraŭ la sankta privata posedaĵo, kontraŭ la kapitalisma produktado."

Péter Veres denove kaj ripete deklaras, ke li akceptis Gorkijon sia homa kaj verkista idealo, sia majstro. En 1937 li per lia ekzemplo pruvas, ke la plej profunda nacia karaktero bone kuniĝas kun la marksismo, kun la internacieco. La grandaj poetoj — li skribas aliloke, estas ĉiam tendencaj: la tendenco kaj la arto povas kontraŭiĝi nur ĉe la mezkvalituloj. „Dante, Goethe, Tolstoj, Gorkij neniam forĵetis la arton por la tendenco, sed ankaŭ ne la tendencon por la arto, ĉar ili ludis ne rolon, sed ili donis sin mem . . . La Gorkijoj neniam maljuniĝas."

Post la liberiĝo de Hungarlando la verkoj de Gorkij atingas la legantojn en pluraj centmiloj da ekzemperoj, liajn dramojn tre ofte ludas niaj teatroj. Grava entrepreno estis en 1960 la ekirigo de la eldonado de la verkoj de Gorkij ĉiujn ĝisnunajn superante pli ampleksa kaj ankaŭ en pli bona traduko.

Gorkij vivas viglevive inter ni, sed la lernejo kaj la literaturhistorio ĉiam havas la taskon ke lia figuro ne rigidiĝu je statuo. Ni opinias, ke ne estus malfacile ekkoni lian „spiritan fingron" ĉe kelkaj eksperimentoj de niaj junaj verkistoj. Sed tio jam ne apartenas al la literatura historio, sed al la kritiko.

(El *Népszabadság. Tradukis Paŭlo Balkányi)*

Recenzo

Hungario sur bildoj. Bildalbumo pri Hungario. La belstilan antaŭparolon verkis Ernő Mihályfi, tradukis Ludoviko Kökény, kunlaboris Lajos Kapitány. Eld. Corvina en Budapest, kiu jam liveris bonajn-belajn librojn en Esperanto. Anstataŭ nia propra recenzo ni presigas tiun de „Franca Esperantisto", Marto 1968: „Luksa prezento sur glaciumita papero de ĉ. 150 tre bonkvalitaj fotoj, el kiuj kelkaj estas koloraj. En la antaŭparolo, ni ekscias, ke la celo de tiu albumo estas montri la nuntempan Hungarion, ne nur historian, monumentan kaj artan, sed la vigle vivantan Hungarlandon en ĝiaj diversaj aspektoj kaj kun ĝiaj multspecaj valoraĵoj. Kelkaj legantoj eble bedaŭros, ke oni ne apartigis tiujn fotojn laŭteme, sed el tiu diverseco kaj ŝajna malordo eliĝas speciala ĉarmo kaj fine la foliumado de tiu albumo estas agrabla antaŭleciono por tiu, kiu volas konatiĝi kun tiu Mezeŭropa lando aŭ ĝin viziti. Nur eta riproĉo: la legendoj de la bildoj estas troveblaj ĉe la fino de la albumo; tio estas nepraktika. Ne detruante la belecon de la fotoj, oni povus ja indiki la klarigtekstojn en eta kartuŝo." La belega albumo estas ricevebla ĉe Hungara Esperanto-Societo, Budapest, VIII., Kenyérmező utca 6. por 85 Forintoj.

Fotolibro pri Nederlando kun klariga teksto kaj multaj aktualaj informoj en Esperanto. Eld. en kunlaboro kun NEA la Nederlanda Ministerio por Eksterlandaj Aferoj. Formato 15 × 22 cm. 65 p. 14 steloj. Belega eldonaĵo pri tiu ĉi belega lando. Por „nepagipovaj" landoj specialaj kondiĉoj. Petu informojn de Nederlanda Esperantista Asocio, J. C. Heetkamp-Sentius, sekr., Hengelolaan 5 F, Den Haag.

La Esperanto-instruado en Hungarlando

La favora atmosfero por Esperanto, kiun kreis en nia lando la Budapeŝta UK. en 1966, eĉ hodiaŭ ne perdis el sia intenseco kaj altira forto, — jen, kion ni povas konstati el la rezultatoj kaj sukcesoj.

Krom registri kaj komuniki la faritaĵojn, nia nuna raporto celas doni novajn ideojn pri programoj, metodoj, materialo ktp. al aliaj, jam prosperantaj alilandaj Esperanto-instruadaj instancoj, kaj esti eventuale inspiro por la post nun ekagontoj. Krome kompreneble ni volas ankaŭ ĉi-maniere veki la emon de niaj hejmlandaj legantoj aliĝi al perfektigaj kursoj kaj akiri atestilon pri faritaj ekzamenoj.

Jam ĉe la enkonduka parto de mia artikolo mi devas substreki tre esencan traĵton de la Hungarlanda Esperanto-instruado, kaj tio estas unue, ke la supera gvidado kaj direktado, kiel ankaŭ la ekzamenado centprocente, kaj la efektivigo de la instruado mem pli ol kvindekprocente estas en la manoj de profesiaj pedagogoj, due, ke la varbagado estas direktata unuavice al pedagogoj.

Por la kursoj „A" 2 oficialaj lernolibroj staris je dispono. La plenkreskuloj lernis el la lernolibro de Julio Baghy, por la infanaj kursoj servis la libro de d-ro Stefano Szerdahelyi. La kursojn sekvis ekzamenoj, kiuj disvolviĝis en diversaj tempopunktoj kaj en diversaj partoj de la lando. La ekzamenojn gvidis ĉiun fojon 2—3 membroj de la ekzamena komitato de HEA, laŭ unueca plano. La ekzamenoj bezonis ĝenerale du tagojn, plej ofte sabaton kaj dimanĉon, por ankaŭ tiel helpi al la plenkreskuloj laborantaj dum la semajno. Ĝenerale sabaton posttagmeze oni aranĝas la skriban ekzamenon; ĝi konsistas el

a) traduko en Esperanton de teksto nacilingva;

b) konceptado en Esperanto pri donita temo el la ĉiutaga vivo. La uzo de vortaro estas permesata.

Dimanĉon okazas la parola ekzameno:

a) traduko de 8—10 linioj da Esperanta teksto en la nacian lingvon (post kelkminuta preparo helpe de vortaro);

b) respondo al kelkaj prigramatikaj demandoj, en nacia lingvo, ekzemplo-frazoj en Esperanto, laŭ la jus buŝe tradukita teksto;

c) parolo pri ĉiutaga temo lotume tirita el 24 temokartonoj, kaj poste konversacio pri tiu temo.

La sukcese ekzamenitoj ricevas atestilon. Ĉiuj ekzamenoj estas matrikulitaj — jam de 30 jaroj — en la matrikulo de la Landa Esperanto-ekzamena Komisiono. La suma kvalifiko rezultas el la opaj kvalifikoj pri skribaj taskoj, prononco, akcentado, tradukado, gramatika scio kaj plej ĉefe pri konversacio. En ĉiu jaro estas po 600—700 ekzamenoj, kun kreskanta tendenco.

Estas jam la tria jaro, ke la Instru-komisiono aranĝas korespondajn kursojn „A". En la ĉefurbo ĉi-jare estis naŭmonataj korespondaj kursoj „A", en ses grupoj kun po 20 partoprenantoj, plejparte pedagogoj el urboj kaj vilaĝoj proksimaj al Budapeŝto. La kursanoj kunvenis monate po unu dimanĉon, ĉiun fojon por 5 horoj. Dum la monata intertempo ĝis la sekva kunveno ili devis bone lerni la vortkvanton kaj gramatikon de la konigita materialo. La koresponda karaktero de la kursoj estis realigita en tio, ke hejme la kursanoj devis traduki ricevitan nacilingvan tekston en Esperanton, aŭ koncepti, kaj sendi ĝin ĝustatempe al la kursgvidanto. En letero aŭ en la sekvanta studhoro ili ricevis la korektitan hejmtaskon, kaj la instruisto kune kun ili priparolis la pli gravajn erarojn.

Krom en Budapeŝto ankaŭ en 8 provincaj urboj estis similaj korespondaj kursoj „A".

Apartan mencion meritas la kurso kaj ekzameno „A" en la Internacia Pedagoga Seminario en Szeged, kiu en tiu ĉi somero estis aranĝita jam la kvinan fojon, kun ĉiam kreskanta sukceso. (Laŭ la titolo ĝi estis establita unuavice por pedagogoj, sed ankaŭ nepedagogoj povas ĝin partopreni. Pri tiu speciala aranĝaĵo ni jam publikigis detalajn raportojn en la numeroj 1/1966 kaj 4/1967 de nia revuo.)

Ni devas ekatenti pri esenca faktoro, kaj tiu estas la internacia aspekto de la Seminario kaj koncerne la instruistojn (krom hungaraj: jugoslavaj kaj polaj) kaj koncerne la kursanojn (el eksterlando: angloj, belgoj, bulgaroj, ĉeĥoslovakoj, danoj, germanoj, japanoj, jugoslavoj, poloj, sovetianoj, svisoj ktp.). La internacieco kaj sukceso de la ĝis nunaj seminarioj estas jam vaste konataj, kaj ili altiras el ĉiam pli multaj landoj novajn interesiĝantojn.

Pluraj ekzemploj montras jam la konstante pli akutan necesecon, ke estu organizataj en skalo interlanda la interŝanĝo de eminentaj Esperanto-instruistoj, ne nur al okazaj, kelksemajnaj kursoj, sed ankaŭ por tutjaraj sistemaj lingvoinstruadoj. Sporadaj entreprenoj ĉi-rilataj ekzistis jam komence de la fruaj tempoj (ni menciu nur la eksterlandajn instruadojn de J. Baghy kaj A. Cseh, aŭ hodiaŭ tiun de s-ano Pettyn el Pollando, aŭ la kurson de Francisko Jáki en Finnlando), sed devos baldaŭ alveni la tempo, kiam kelkaj pli fortaj landaj asocioj estos kapablaj interkonsenti pri reciproka daŭra (1—2 jara) interŝanĝo de Esperanto-instruistoj. Kompreneble la nepra kondiĉo de tio ĉi estas la certigo de sufiĉa nombro da lernantoj.

Nun ni vidu la situacion pri la mezgrada Esperanto-instruado, nome tiun de la kursoj „B". Eble plej racie mi agos, se mi konigos, kion devas scii la kandidato por povi iri memfide antaŭ la ekzamenan komisionon „B".

Jen la konciza listo de la scienda materialo:

a) *koni ĉ. 2500 vortradikojn;*

b) *perfekta detala kono de la gramatiko;*

c) *flua parolkapablo kun senriproĉa akcentado;*

ĉ) *vasta literatura erudicio, kaj kono de la plej gravaj partoj de la Esperanta literatur-historio;*

d) *kono de la plej gravaj partoj de la Movad-historio;*

e) *bona tradukkapablo el ambaŭ lingvoj, el diversaj temoj (literaturo, ĵurnaloj, ekonomio, arto, politiko, sporto ktp.).*

Por atingi la celon servas la sekvantaj lernolibroj kaj instru-helpiloj: Ambaŭ lernolibroj „A"-kursaj, la „Gvidlibro por supera ekzameno II. Historio, literaturo." (hungara eldono, redaktita de Alfonso Pechan. Krome la „Gramatika Demandaro" de J. Baghy en la „Gvidlibro I. por supera ekzameno" kaj la hungarlingva konciza tralaboro de la Plena Gramatiko fare de K. Kalocsay.

Koncerne la legadon de literaturaj verkoj, la hungaraj kursanoj povis apogi sin — kompreneble — preskaŭ eksklузive sur verkoj akireblaj en la lando. Bonŝance krom la relative abunda hejmlanda produkto (Baghy—Kalocsay: Ora Duopo, Baghy: Koloroj, Madách: La tragedio de l'homo, Sántha: Dudek horoj, Fekete: Vuk, Baghy: Verda koro, Ráth-Végh: Patromurdo en la Nigra Muelejo, Dorozsmay: Fabeloj, la jarkolektoj de Hungara Vivo) pere de la interveno de la librovendejo de HEA estis aĉetebla certa nombro da eksterlandaj libroj, inter ili la valoregaj Prus: „Faraono", Sienkiewicz: „Quo vadis?" kaj la Fundamenta Krestomatio.

La instruado en la kursoj „B" okazis jam eksluzive en Esperanto. Koncerne la tipojn, ankaŭ ĉi tie ni trovas ĉiujn tri metodojn, nome a) la ordinaran (vesperan) kurson,

disvolvitan en Budapeŝto jam la duan jaron en granda prelegĉambro disponigita de la Pedagoga Sindikato, krome en kelkaj aliaj urboj; b) la korespondan kurson (2 paralelaj kursoj en la ĉefurbo, krome en Veszprém, Pécs kaj Szeged); kaj c) tiun de la Internacia Pedagoga Seminario en Szeged.

Koncerne la Seminarion kompreneble estis malfacile antaŭskribi devigajn legaĵojn por la eksterlandaj partoprenantoj, ĉar eventuale ĉe ili la supraj verkoj ne estas havigeblaj. Tamen, kiel devigan oni antaŭskribis „La Tragedion de l'Homo" kaj kiel rekomenditajn, la cetere menciitajn. Anstataŭ ili estis bonvenaj kompreneble ankaŭ aliaj verkoj, ĵuste tial la varbilo de la Seminario atentigis pri la librolisto de la Jarlibro de UEA.

Pri la ekzamenoj ĉe la kurso „B" ĉe ĉiuj tri tipoj zorgas same la Landa Ekzamena Komisiono. La ekzameno ankaŭ ĉi tie konsistas el skriba kaj buŝa partoj. En la skriba parto la ekzamenato faras tradukadojn el la nacia lingvo en Esperanton kaj el Esperanto en la nacian. La parola ekzameno okazas plene en Esperanto, do oni aparte klasifikas la parolkapablon ktp. laŭ preteco en la studobjektoj a) Gramatiko, b) Literaturaj legaĵoj, c) Historioj de la lingvo kaj Movado. Kondiĉo de la ekzameno „B" estas, ke la kandidato havu jam diplomon „A", aŭ, se eksterlandano, ian atestilon pri simila baza ekzameno. Se iu ankoraŭ ne faris similan ekzamenon, oni devas lin ekzameni laŭeble antaŭ la kurso en la Seminario.

Estas menciinde, ke la kurso „B" preparas la hungarajn kursanojn ankaŭ al la „Ŝtata lingvo-ekzameno", ja la postulaĵo de tiu lasta kongruas kun tiu de la kurso „B", escepte la Esperanto-literaturajn kaj historiajn konojn, kiuj ne estas ekzamenataj en la ŝtata ekzameno. (Eble por multaj ne estas sciate, ke en Hungarujo jam de 2 jaroj estas ebleco por fari ŝtatan ekzamenon ankaŭ en Esperanto, kaj ĝi egalvaloras kun la ceteraj lingvoekzamenoj, nome ankaŭ la plenumintoj de la Esperanta ŝtata ekzameno ricevas kromsalajron en sia laborloko, kondiĉe ke ili povas uzi la lingvon en eksterlandaj rilatoj.)

Krom la kursojn „A" kaj „B" la Instru-komisiono de HEA enkondukis ankaŭ la kurson „C". La celo de tiu ĉi kurso estas: akiri la sciojn bezonatajn de bona, kapabla instruisto de Esperanto. Krom la fakajn konojn oni devas koni historion, movadon, literaturon de Esperanto, ĉar tiuj estas necesaj scioj por klera esperantisto. La studobjektoj de la kurso kaj ekzameno „C" estas: a) Lingvistiko, b) Literaturhistorio, c) Stilistiko, ĉ) Pedagogio, d) Metodiko de la lingvoinstruado, e) Instrua praktiko (provinstruado), f) Disertacio pretigenda post (aŭ antaŭ) la kurso (post antaŭa priparolo kun la prezidanto de la Ekzamena Komisiono).

Ankaŭ la kurso „C" havas la suprajn tri tipojn: ordinara (vespera), koresponda kaj seminaria. La nombro de tiuj ĉi plej superaj kursoj kompreneble estas jam pli malmulta. En tiu ĉi jaro funkciis unu ordinara kaj unu koresponda kursoj, ambaŭ en Budapeŝto, kaj unu en la Internacia Pedagoga Seminario en Szeged. En la kursoj „C" oni studis lingvistikon, literaturhistorion, pedagogion, stilistikon, retorikon kaj faris provlecionojn. Krome ĉi-jare estis ankaŭ tradukista kurso, kiu okupiĝis pri teorio de tradukado, pri la praktiko de la tradukado surbaze de parte prozaj parte poeziaj verkoj, komparante kelkfoje du aŭ tri tradukojn el unu sama originalo. Okazis tradukado ankaŭ je diktado. Estis prelegoj pri lingvistiko, stilistiko, literaturhistorio, redaktaj, eldonejaj kaj presejaj konoj.

Specialaj lerniloj (krom la menciitaj ĉe la kurso „B") provizore ne estas je la dispono de la lernantoj. Ili lernas — farante notojn — el la prelegoj de la diversaj lekciantoj.

Ĉe la ekzameno ili ricevas kvalifikon krom el la supraj studobjektoj ankaŭ el parolkapablo, prononco, akcentado, kiujn oni prijuĝas dum la ekzameno de la ceteraj objektoj.

Estas tendenco, ke iom post iom kiel eble pli da kursoj havu sian alte kvalifikitan („C"-kursan) instruiston (kursgvidanton), kaj ke ankaŭ la presataj tradukaĵoj, aperantaj en Hungarujo multfoje el la plumoj de bonvolaj sed lingve malaltnivelaj diletantoj, estu verkataj en la estonteco de fakspertaj tradukistoj.

Tute apartan kampon okupas la universitata Esperanto-instruado. Tiaspeca instruado okazas nuntempe — laŭ nia scio — nur en Hungarujo. Post tri-jara lernado en la Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd, somere de 1969, finos siajn studojn de Esperanto, kaj ekfunkcios kiel Esperanto-instruistoj kun universitata kvalifikiteco la unuaj 8 junaj pedagogoj, kiuj havos la taskon instrui en mezlernejoj krom sia(j)n alia(j)n studobjekto(j)n (ekz. literaturo, historio aŭ alia lingvo ktp.) ankaŭ la lingvon Esperanto.

Simila instruado de Esperanto estas por junaj pedagogo-kandidatoj en la pedagogaj altlernejoj en Pécs kaj Esztergom, kiuj post kelkjara Esperanto-lernado instruos la lingvon en elementaj lernejoj.

Jen en ĝeneralaj linioj, koncize traktite la situacio de la Hungarlanda baza, meza, kaj supera Esperanto-instruadoj. Ni devas diri sincere, ke la tuta afero estas jam post la stato de eksperimentado, kaj la konstatoj kaj spertoj servis ĉiam al la pliperfektiĝo. Certe ni jam havas konsiderindajn rezultatojn, kiuj estas ŝuldeblaj al la nelacigeblaj kaj entuziasmaj gvidantoj de la hungara Esperanto-instruado.

Sed ni estus nelojalaj, se ni forgesus pri tio, ke multe helpis la subtenado fare de niaj superaj instancoj, nome la hungara registaro, la Sindikatoj, la Ministerio pri Instruado, sen kio la afero de la Hungarlanda Esperanto-instruado ne povus esti tiel organizita kaj tiomgrade evoluinta.

Tibor UJLAKY-NAGY

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

Kiam la fondo-dokumenton de UNESCO oni konceptis — ankoraŭ blekis-bruegis la armiloj de la dua mondmilito. Kaj UNESCO fondiĝis kun la celo: kunligi la naciojn sur la terenoj de la edukado, scienco kaj kulturo, por gardi la pacon, akceli la prosperon de la homaro. UNESCO hodiaŭ jam havas 122 membroŝtatojn. Nia patrujo estas membro de la organizaĵo de post dudek jaroj, kaj ekde 1954 ĝi partoprenas intense en la laboroj de UNESCO. En kunsido de la Hungara UNESCO-Komitato oni raportis pri niaj vastiĝantaj internaciaj kontaktoj kaj pri la kreskado de nia reputacio. Grava evento de la pasintjara UNESCO-agado estis la Viena konferenco de la klerigaj ministroj de la Eŭropaj membroŝtatoj, kiuj pritraktis multaĵn problemojn de la supera instruado. Unu el la viceprezidantoj estis la hungara ministro Pál Ilku. En UNESCO-rondoj oni konstatis, ke Hungario fermis rezultoplenan jaron en la natursciencoj, unuavice en la hidrologio. En pluraj laborkomisionoj de la Internacia Hidrologia Koordina Konsilantaro agadis ankaŭ hungaraj fakuloj, inter ili ankaŭ Ottó Haszpra, kunlaboranto de Hungara Vivo. Okaze de la 20-jara datreveno de la Universala Deklaro de la Homaj Rajtoj UNESCO eldonos la verkon „Teruraĵoj de la milito" kaj en tiu ĉi volumo aperos riĉa kolektaĵo de hungaraj poemoj. En Budapeŝto oni presigos fremdlingvan bibliofilan eldonaĵon sub titolo „Hungaraj poetoj kaj la homaj rajtoj". En 1968 estos en Parizo la 15-a jarkunveno de UNESCO. En Budapeŝto okazos krome tri signifaj konferencoj en kadro de UNESCO: 1, Konferenco de fakuloj de la kulturaj centroj (ili pritraktos la problemojn de la eksterlerneja edukado. 2, La

konsulta komitato de internaciaj hidrologiaj kursoj. 3, Simpoziono de la juristoj pri la temo: La perspektivoj kaj limoj de la kompara juro.

*

Intervjuo kun la ĉefurbestro de Helsinki. *Antaŭ reprezentantoj de la publika vivo, de la preso kaj de la Radio kaj Televido, malfermis la 19-an de Aprilo prezidanto de la Budapeŝta urba Magistrato kaj Laŭri Aho, ĉefurbestro de Helsinki grandampleksan ekspozicion en Budapeŝto kun titolo: Helsinki. La grandegaj artaj fotoj, uzobjektoj, mebloj, eĉ infanludiloj, produktitaj pri kaj en Helsinki tre konvinke prezentas la ĉiutagan vivon, la ĉirkaŭaĵon, la laboron kaj la amuzon de la loĝantoj de la finna ĉefurbo. — Post la solenaj malfermaj paroladoj de la gvidantoj de la du ĉefurboj, ni alparolis s-ron Lauri Aho, ĉefurbestron de Helsinki. Li salutis per la sekvaj vortoj niajn esperantistajn aŭskultantojn en Finnlando: „Granda ĝojo estas por mi, saluti el Budapeŝto finnojn, kiuj praktikas Esperanton. Ĉi tie la vetero estas tre bela, varma, kaj ankaŭ la homoj tre afablaj, varmaj, amikemaj. Kune kun aliaj reprezentantoj de urbo Helsinki mi estas ĉi tie por malfermi la ekspozicion pri Helsinki, en tre afabla, amikema atmosfero. Agrable estas, ke mi povas sendi al vi miajn plej varmajn salutojn ĝuste de ĉi tie, el la hungara ĉefurbo, kie mi jam estis antaŭe, sed kiun ankaŭ de tiam oni konstruis plue, tre energie, laŭ la postuloj de la estonteco. Se tio entute eblas — Budapeŝto hodiaŭ estas multe pli bela, ol ĝis nun." — S-ro Lauri Aho, ĉefurbestro de Helsinki, kiel estonta dommastro tre afable parolis ankaŭ pri la 54-a Universala Kongreso de Esperanto: „Antaŭ kelkaj semajnoj vizitis min la reprezentantoj de la Finna Esperanto-asocio kaj raportis al mi pri la aranĝota Esperanto-Kongreso en la venonta jaro, en 1969, en Helsinki. Estas granda ĝojo por mi, ke tiam mi havos la okazon elkore bonvenigi tiujn, kiuj vizitos nin kaj internacian kontakton ligos kun Finnlando. Ni tre volonte atendos ilin, kaj mi povas certigi al vi, ke la Kongreson ni akceptos tiel afablege, kiel ni nur kapablas. Estu kore bonvenaj en Finnlando, ni kore atendas vin ĉiujn." (Laŭ permeso de la Esperanto-Dissendoj de Radio Budapeŝto.)*

*

Mortis Gagarin la 27-an de Marto. La 12-an de Aprilo 1961 Gagarin ekiris per la Vostok-1 al la netravidebla foro de la stelaro, de la senlimo. Antaŭ sia ekiro — sentante la preman grandiozecon de tiu ĉi minuto — Gagarin faris deklaron, en kiu li alparolis la homojn de la tuta Terglobo: „Loĝantoj de ĉiu lando kaj ĉiu kontinento!" Gagarin do sentis sin sendito ne nur de sia patrujo, sed de la tuta homaro. Per tio ankaŭ li pravigis la eldiron de franca verkisto: „Mi estas laŭ neceseco homo, kaj nur hazarde franco". Gagarin eksciis la unuan fojon, kia estas la Universo trans la Tero. Dum la homaro vivas, la nomo de Gagarin ne estos forgesita.

*

La tragika morto de Martin Luther King *ankaŭ en Hungario kaŭzis egan konsterniĝon kaj sinceran indignon. Centoj da telegramoj espirimis la kondolencon por la kunbatalantoj de la Nobelpremiita negra patrioto. Kiel la telegramo de la Scienca Komitato de la Landa Packonsilantaro konstatis: „Sur la fronto de la luktado por la paco kaj homa egaleco mortis la kuraĝa defendanto de la malriĉuloj kaj subpremitoj. La tragika evento pruvas denove per senvualiga lumigo, ke la fortoj de la mallumo agadas senhalte, ke estas necesa nova kaj decida starpunkto kaj protestado kontraŭ la fortoj endanĝerigantaj la liberon de la homaro kaj akcelantaj la militon. — King batalis ne nur por la negroj, sed ankaŭ por la paco, por la homa honesteco, por la tuta homaro. Lia nomo fariĝos ĉiam glora, kiel tiu de Gagarin.*

*

Justo de Vjetnamio — jen estas ĝusta gvidartikolo de la hungara eldono de „Paco", organo de MEM. Ankaŭ ni laŭte emfazas: „Justo de Vjetnamio estas daŭra kaj nevenkebla. Kiel eble plej rapide eksilentu la armiloj, retiriĝu la agresantoj kaj definitive triumfu la justo sur la tero de Vjetnamio!" Ni fortege deziras: Kiam aperos tiu ĉi nia numero, jam ĉesos ĉiu murdo kaj ĉiuspeca sufero — hontinda kulpo de la agresantoj — sur la tero de tiu ĉi heroa popolo.

*

„La socialismo estas neimagebla sen demokratio." — *skribis Rezső Nyers, membro de la Politika Komitato de la Hungara Socialisma-Laborista Partio. „Ni komunistoj — li daŭrigis — sensanĝe devas kredi la raciecon de la demokratio, ĝian efektivan kaj esencan realigeblon, kaj ni devas kredi tion, ke la demokratio estas la bezonaĵo de la amasoj, kaj ilia ununura reala eblo por tio, ke esence ili povu alparoli la ŝtatajn aferojn, la problemojn de la komuneco kaj ankaŭ la ekonomiajn demandojn." La akcepton de la demokratio nia aŭtoro emfazis kontraŭ tiuj, kiuj per diversaj argumentoj kaj pretekstoj anoncas la vanecon de la demokratiaj fortostreĉoj — ĉu ili faras tion el burĝa flanko, ĉu el socialisma flanko. Tamen estas komprenebla afero, ke la demokratio ne estas konsiderebla panacco kontraŭ ĉio.*

*

La plej grandaj hungaraj verkistoj, poetoj, ekde János Arany, ĝis niaj tagoj, en la plej multaj kazoj estas ankaŭ eminentaj tradukistoj, kiuj dediĉis jardekojn, por malfermi la hungaran lingvoteritorion per tradukaĵoj por la mondliteraturo. La heroa epoko de la hungara arttradukado estis la mezaj jardekoj de la pasinta jarcento. Hodiaŭ ni jam povas aserti, ke eble ne troviĝas en la mondo alia malgranda lingvo, kiu havus tiel riĉan arttradukan kulturon, kiel la hungara. Estas karakterize, ke pli ol sesdek procentoj de la libroj, aperintaj dum unu jaro en Hungario — estas tradukaĵoj.

*

Parizo estas ĉefurbo de la revolucioj kaj kulturo. *La atentema interesiĝo de la hungara spirita vivo al Parizo estas preskaŭ samaĝa kun la ekflorado de la novepoka hungara kulturo. En la unua jardeko de la 20-a jc. elformiĝis en unu el la mallarĝaj stratetoj de Quartier Latin hungara kolegio. El tiu ĉi hungara studentkolonieto evoluadis malrapide la hungara instituto en Parizo. Ekde la dua duono de la kvindekaj jaroj la hungara-franca kultura kontakto alvenis al nova renesanco. La instituto fariĝis vere fokuso de la spirita interrilato de la du nacioj. La malgranda prelego-ĉambro jam montriĝas malvasta por la interesiĝantoj je la semajnaj hungaraj aranĝaĵoj. La ekspozicio „Hungara arto de dek jarcentoj" kunmetita fare de la hungara instituto somere de 1966, ricevis lokon en la plej elita galerio de la franca ĉefurbo. La Universitato Sorbonne disponigis sian ĉambregon por la prelegoj konigantaj sisteme la hungaran literaturon. La francaj literaturistoj, estantaj en kontakto kun la vivanta hungara literaturo, la poeto-arttradukisto Rousselot aŭ Guilevic, la lingvisto, aŭtoro de la granda hungara-francaj vortaroj, prof. Sauvegaut estas konstantaj gastoj de la instituto. En la lastaj tempoj la gastroladoj de la fortepianistino Annie Fischer, de la violinisto Dénes Kovács kaj la arĉkvarteto Tátrai akiris altan taksadon eĉ en la cetere riĉega koncertosezono de Parizo. La hungara instituto mem restis fidela al sia tradicia tasko: ĝi akceptas ankaŭ hodiaŭ jare pli ol cent stipendiulojn.*

*

En la internacia arkitektura literaturo havas gravan rolon la verkoj de hungaraj fakuloj konekse kun projektado de modernaj metalaj kaj betonaj konstruelementoj. La agadon de prof. Bölcskei, gvidanto de la ferbetonkatedro de la Budapeŝta Konstruindustria kaj Interkomunika Teknika Universitato oni konas en pluraj urboj de Eŭropo. Estas tre konata ankaŭ alia politeknika profesoro, Károly Szmodits. La du scienculoj ellaboris konstrukciojn de la modernaj tegostrukturoj, kiuj estas maldikmuraj, el metalo aŭ ferbetono pretigitaj, en unu aŭ du direktoj kun kurba surfaco, kaj laminitaj teniloj, havantaj gravan rolon en la alta konstruado, ĉe konstruo de pontoj, turoj, konstruaĵoj starantaj sur altaj piedoj.

Kiam oni ekzamenis domojn, *kiuj konstruiĝis en Budapeŝto en la 1930-aj jaroj, la fakuloj spertis multloke fendiĝojn. Ĉe tiuj domoj tiutempe oni uzis baŭksitcementon, kies fizikajn kvalitojn oni ne konis sufiĉe en tiu konstruperiodo. La baŭksitcemento tiam gajnis la konfidon de la arkitektoj kaj negocistoj, supozantaj, ke ĝi atingas dum unu tago stabilecon, al kio la tradicie uzata portlanda cemento bezonis dudek ok tagojn. Bedaŭrinde ĝi ne montriĝis sufiĉe stabila, kaj la loĝantojn de tiuj domoj, kiujn oni kvalifikis en la pasintaj monatoj danĝeraj, oni metis en sekuran staton. La konstruaĵojn el baŭksitcemento unu post la alia oni plifortigas.*

*

Kio okazas en la interno de la baŭksitcemento, alivorte: cement-aluminato? Tion malkaŝis hungaraj inĝenieroj, fizikistoj kaj kemiistoj de la konstrumaterialoj per kunigita forto. Dum longa tempo ili kvazaŭ igis konfesi la kolonojn, intertegmentojn kaj transpontajn konstruelementojn — se la menciitaj objektoj ŝajnis suspektaj —, kaj ili atingis la celon per ultrasono, rentgenradio kaj per borŝildo ekipita strukturoekzamena sondilo. Ili ekzamenis tiamaniere multajn konstruaĵojn, kaj dum tiu ĉi procezo estis konstatebla la interna pereo de la baŭksitcemento preskaŭ kun plena certeco.

*

La telefonparolilo, praulo de la radio, *eksonis en Budapeŝto la unuan fojon la 15-an de Februaro 1893. Tiu ĉi unika telekomunika inventaĵo funkciis per seria ŝalta sistemo, kaj el la studio-ĉambro speciala kondukilo komunikis sen terkondukilo la programon en la kapaŭdilon de la abonantoj. Kun la interesa inventaĵo de Tivadar Puskás la mondo konatiĝis jam pli frue, en 1881 en la Pariza Elektro-Ekspozicio, kie vekis egan sensacion la perado de opero el la Granda Operdomo. La unuan peradon la invititaj tridek du eminentuloj aŭskultis en pavilono de la ekspozicio. Cetere la telefonparolilo dissendis siajn programojn en Budapeŝto ĝis la jaro 1928, ĝis la Hungarlanda disvastiĝo de la Radio.*

*

La virina egalrajto jam efektiviĝis en Hungario. Antaŭ preskaŭ dudek jaroj oni enleĝigis ĉe ni la politikajn, lernadajn kaj prosperajn rajtojn de la virinoj, tute egalajn kun tiuj de la viroj. Hodiaŭ en Hungario ĉiu civitano, kiu fariĝis 18-jara — sen konsidero pri la sekso — havas balotrajton kaj estas ankaŭ elektebla. Kvinono de la parlamentaj deputitoj estas virinoj. En 1930 en nia lando entute 8300 virinoj havis universitatan aŭ altlernejan kvalifikon, en 1965 la nombro de la diplomitaj virinoj superis 50 000. Hodiaŭ pli ol 60 procentoj de la pedagogoj, 20 procentoj de la juristoj, 30 procentoj de la kuracistoj estas virinoj. Nuntempe pli ol 1 700 000 virinoj laboras en Hungario, pli ol 40 procentoj de la lukrantoj.

*

Tamen ni ne povas paroli ankoraŭ pri plena venko. *Multfoje aperas ankoraŭ la paseo, sekve de la opinioj faritaj pri virino aŭ pro la sinteno kontraŭ la virinoj. Estas necese, ke ĉiuj virinoj mem kredu tion, ke ili vere estas kapablaj por laboro egala kun tiu de la viroj. La elformo de pli moderna vidmaniero, la ŝanĝo de la malnovaj antaŭjuĝoj estas hodiaŭ unu el la ĉefaj problemoj en Hungario konekse kun la egalrajto de la virinoj. La dua problemo parte estas en kunligo kun la unua: nome oni devas doni la socian helpon al tio, ke la virinoj — krom sia ekonomia kaj publikviva devo — povu plenumi la multajn devojn de la patrineco, de la gefiloj.*

*

Ĉu la viro estas la „krono de la kreo"? Jam antaŭ longe ĉiu homo iom saĝa protestis kontraŭ tiu ĉi falsaĵo, tamen ankoraŭ estas spertebla konservativaj opinioj pri la viroj kaj virinoj. Tamen la progreso ne stagnas. Gazeto faris bukedon el la opinioj de dekkvarĝis dekokjaraj junulinoj pri la knaboj. Ĉiu knabino konsentis, ke estas bone la ekzisto de la knaboj, eĉ, sen knaboj la vivo ne estus bona. Sed ili emfazis ankaŭ, ke al tio la knabinoj kontribuas en almenaŭ sama mezuro.

La l-a n-ro de Hungara Vivo tiel rapide disvendiĝis, ke multaj interesiĝantoj vane provis akiri tiun ĉi numeron (kaj eble ankaŭ la 2-an). Do malgraŭ la prezaltigo nia revuo ne refalis, sed iom progresis. Tamen ni devas peti la pluan kaj pli efikan subtenon de ĉiuj ŝatantoj de la bona Esperanta stilo kaj interesa enhavo.

Ferenc Szilágyi, lia edzino (dekstre) kaj lia bofratino (meze) antaŭ kelkaj jaroj en Boras

Norda Prismo, *kies ĉefredaktoro estis d-ro Ferenc Szilágyi, eldonis memoran numeron je honorigo de sia forpasinta animo-fondinto. Tiu ĉi numero — en provizora redakto de Rose Szilágyi — presigis poemojn de kvin poetofratoj, artikolojn de G. Waringhien, Marjorie Boulton kaj L. Kökény, krome fotografaĵojn, kiujn oni faris pri Ferenc Szilágyi dum la Budapeŝta Kongreso 1966. Kiel ni informiĝis, la nova ĉefredaktoro de Norda Prismo fariĝis William Auld, unu el la plej gravaj verkistoj de Esperanto. Ni pensas, ke Norda Prismo, tiu ĉi altnivela revuo devas plu vivi, trovi novajn abonantojn en ĉiuj landoj. — Ĉi tie ni mencias, ke s-ino Rose Szilágyi, vidvino de nia kara kolegoamiko fine de Marto alvenis en Budapeŝto por kelkmonata restado. Ŝi vizitis en la hungara ĉefurbo ĉiujn Esperantogrupojn, kie oni rememoris inde ne ne nur pri la eminenta literatura, redaktora kaj instrua agado de Ferenc Szilágyi, sed ankaŭ pri la konstanta, oferema helpo kaj kunlaboro de la kara Edzino.*

*

Mortis Gyula Molnár la 28-an de Majo en Balatonszepezd. Li naskiĝis la 21-an de Septembro 1873, lernis Esperanton de sia amiko Paŭlo Lengyel (nia internacie konata pioniro) en Szekszárd, en 1898 el la unua lernolibro de Esperanto en hungara lingvo, verkita de Ábel Barabás. Ni kortuŝite adiaŭas de la plej maljuna kaj plej malnova hungara esperantisto, pri kiu H. V. antaŭ tri kaj duono da jaroj aperigis artikolon. (1965/1.)

*

Radio Budapest *daŭrigas siajn ĉiutagajn Esperanto-dissendojn, laŭ Mez-Eŭropa tempo je la 20.30—20.45, tra la ondolongoj 16,8, 19,8, 25,2,41,6, 42,2, 75,1 kaj 240. Ni petas Vin, aŭskultu regule la interesajn, variajn dissendojn en modela Esperanto, kaj skribu ofte al Radio Budapest, VIII. Bródy Sándor utca 7.*

Elegio al genistarbeto

ÁRPÁD TÓTH

Sterniĝas mi surdorse sur mont', en herb' odora
Kaj klinas sian oron sur min en densaj arkoj
La svelta kaj kvieta genisto boatforma:
Mil luliĝantaj floroj, mil etaj aerbarkoj.
Giganto pigra, miras mi ilin; kaj la plend'
El peza kor' ĝemspire fluganta tra la lipoj
Por ili estas vento, surpriza turnovent:
Ektremas tuta flotil' de oršipoj.

Ho gajaj, gajaj ŝipoj, flirtantaj en la blua
Aer' kvieta de la somera fru-vesper',
Toleru, ke timigas vin per ĉi ĝemo brua
La homgigant' inerta; ja premas lin sufer'.
Toleru, se haladzas el lia min' anima
Vaporo de doloro: venena gasfantomo.
Ne scias pri l' ŝaktoj de la mizer' senlima,
Kiujn en koro kaŝas ĉi monstro, unu — homo.

Vi lulas vin kaj arda, pur-ora lum-inund',
Kaj freŝa pluv' arĝenta verŝiĝas ĝis senpene,
Senzorge riĉiĝanta subtila via fund':
Mielo kaj odoro vin ŝarĝas riĉe, plene.
La ros' aŭrora estas ja por vi perlo peza,
Ĝin gardas, por senkorpa trezor' ne vagas vi.
Vin serĉi koloniojn de la sopir' freneza
Ne pelas kapitano krudvola: la konsci'.

Mi ankaŭ estas ŝipo, sed ŝtipojn la malĝojo
Per najloj de turmento kuntenas je ŝipkorpo.
Ŝipist' sovaĝa pelas ĝin al freneza vojo,
Ne lasas ĝin: dolorojn enluli en milda golfo.
Kvankam ĉi feronajlojn jam la transviva viv'
Altiras mildperforte per magnetmont' mistera:
Disfali ie pace sur muta roka rif',
Ne flosi, rub' stertora, sur vojo senespera.

Kaj la ceteraj, ĉiuj, la tuta homfratar',
Ĉi naŭzaj raboŝipoj, ruinaj savboatoj,
Kiujn malnoblaj veloj, aŭ tristasango-mar'
Per tren' terura portas: plorantoj kaj piratoj.
En la diluv' moderna de sang' kaj larm' — terura
Estas la sorto de la senhelpa homboato,
Pereos eble ĉiuj kaj mankos ĉe ni pura
Noah' kiun atendus feliĉa Ararato.

Pereos eble ĉiuj. Silentos mond'. Nur barkoj
De milion' da floroj sin lulos per la vent'.
Surherbe ĉielarkoj, surbranĉe ĉielarkoj,
Solene muta festo, p o s t h o m a f e s t s i l e n t '.
Ektrem' feliĉa nun kaj ekspiras plezurĝeme
La prasubstanc' dolora: ho ! for turment' kaj laco !
Malfermos lotusfloro la virgajn lipojn treme,
Elŝvebos ĝojaeren la neĝflugila Paco.

El la hungara: *K. KALOCSAY*

Etelka P. BALASI

ÁRPÁD TÓTH

(1886—1928)

Pri tiu ĉi ,,apartvoĉa'' poeto Hungara Vivo jam rememoris antaŭ kvin jaroj (1963|3. kaj 4.). Tiam ni presigis artikolon pri Árpád Tóth kaj liajn karakterizajn poemojn ,,Sangĵuĝo'' (trad. de L. Tárkony), ,,Flamo'', ,,Marto'', ,,De animo ĝis animo'', ,,La nova dio'' kaj ,,Aprila capriccio'' trad. de K. Kalocsay). Kvardekjara datreveno donas okazon denove paroli pri la eminenta hungara poeto.

*

La poezio de Árpád Tóth estas perlo de la hungara literaturo de nia jarcento. La reganta tono de liaj poemoj de komenco ĝis fino estis la doloro, la malgajo de homo vane atendanta amon, feliĉon. Lia konstanta gesto estas la rezigno. Li vivas sub premo de la tuberkulozo kaj de la malriĉo dum sia tuta vivo, sed en altiro de grandskala progresema spirita movado, de la literatura revuo ,,Nyugat'' (,,Okcidento''). Tiu ĉi revuo en la dekaj jaroj de nia jarcento apartenis al la progresemaj poetoj kaj verkistoj. Ne estas hazarde, ke Árpád Tóth tiutempe staris plej proksime ĝuste al la franca simbolisma poeto Samain. Árpád Tóth povis senti lin sia parenca animo pro la sameco de ilia malsano, sed ili estis parencoj ankaŭ en la malaplomba sentemeco, en la soleca malĝojado.

La unua etapo de lia poezio estas la tempo de 1907 ĝis 1913. Lia elstara poemaro estas la ,,Aŭrora Serenado''. La trista tono fortiĝas en liaj poemoj determina voĉo. Por efektivigi siajn sopirojn, li ne sentas en si sufiĉe da forto. Li ne postulas kaj laŭŝajne eĉ ne esperas grandan feliĉon eĉ de la amo. De la virino li apenaŭ atendas pli ol spicenhavajn ĝojojn, sed ankaŭ tiuj ĉi ĝojoj estas malrealaj por li. Vidinte la brutalajn faktojn de la unua mondmilito, fariĝas por li senduba la politika respondeco de la poeto. Lin indignigas la ekfloranta pseŭdopoezio sur la amastomboj de la heroaj mortintoj. Elstara poemo de tiu ĉi epoko estas: ,,Elegio al genistarbeto''.

Post afliktoj kaj teruraĵoj, trans ĉiu perdo kaj malgraŭ la rigidiĝinta silento, li kapablas kredi la eblon de la pli inda rekomenco. Liaj esperoj nun estas la plej firmaj. La poeton tute forkaptas la ekscitoj de la sociaj ŝanĝiĝoj. La

interna strecо tiel estas la plej granda, la arko de la idea leviĝo ĉi tie estas la plej kruta.

Post la milito la poezio de Árpád Tóth fariĝis pli riĉa kaj pli interesa, ĉar la tuta mondo, la integreco de la vivo estas en li ununura granda travivaĵo. Kiam li verkas pri la amo, en liaj sentoj partoprenas ankaŭ la forpaso de la junulaĝo kaj ankaŭ la amaro de la maljuniĝado, — kaj en lia propra sorto la kruelec de tiu epoko.

Ekzemple en lia poemo „Marto" la renoviĝon de la naturo plenigas la elektro de la socia renaskiĝo. Jen kelkaj versoj el la poemo:

Printempo telefonas al la Ter'.
. . .
fabriklaboristo movas sin, la brakojn
etendas, magrajn fabrik-fumotubojn,
enspiras la odorojn malproksimajn
kaj flamebriajn kantojn li komencas.

De tie Árpád Tóth devis fari nur unu paŝon al la unika poezia plenumaĵo de tiu ĉi epoko el idea vidpunkto, al „La nova dio". Ĝi estis nur unu paŝo, tamen tiun ĉi paŝon fari ankaŭ por nia poeto ne estis facila. El la gvidaj poetoj de „Nyugat" escepte de Ady kaj Gyula Juhász, aliaj poetoj ne faris tiun ĉi paŝon, kvankam Árpád Tóth mem ne estis revoluciulo. La socia kaj morala damaĝiĝo — kaŭzita de la milito — maturigis ankaŭ en li la konvinkon, ke nur radika socia turniĝo povas alporti renaskiĝon.

Post falo de la Konsilia Respubliko de 1919 lin atakas la kruela premado de seniluziigaj faktoj, tamen li ne fariĝis apostato. Li gardas la federon kun la laborantaj homoj.

Sed lia malsano pligraviĝas, la ftizo rapidege malkreskigas la forton de la poeto. Sentinte la proksimiĝon de la fino, li adiaŭas en poemoj, kies beleco devenas el tio, ke Árpád Tóth forte sentas, ke li devas forlasi la vivon kun ĉiuj ĝiaj apartenaĵoj, sed samtempe li kvazaŭ akomodiĝas en la etoson de la morto. Tiun ĉi etoson esprimas la jenaj tri versoj:

Mi kuŝas pace, pigre, kapitulacinte,
Kaj atendas min, tra la senfina vespero.
Meditante pri sorto mia Dio.

Magda SZABÓ

LA ROLO

Kiam oni donis al li la rolon, li ne ĝojis. Ne tion li kontraŭis, ke li ludos maljunulon, — la aktoro amis sian profesion, prenis ĝin por serioza, lia biblioteko estis plena de faklibroj; kiam la unuan fojon li legis Stanjislavskij, lin kaptis tia maltrankvilo, ke li kuregis eksteren al la fluanta pluvo kaj piediris ĝis la Urba Arbareto, tiel li deziris la moviĝon, la laboron de la muskoloj post la sovaĝa spirita travivaĵo, — la aktoro estis malkuraĝa kaj humila, se temis pri la teatro, lia sukceso lin faris preskaŭ timema. El alia laborsfero, eĉ ne tute june li venis al la teatro kaj por ĉiu rolo li prepariĝis, kvazaŭ de tio dependus lia tuta plua vivo, eĉ ne sole la lia, sed ankaŭ la vivo de tiuj, kiuj lin spektas.

Ankoraŭ neniam li ludis maljunulon.

Kiel antaŭ ĉiu nova tasko, denove lin kaptis la malcerteco: eble li eĉ ne sukcesos. Li devos roli personon preskaŭ kvardek jarojn pli maljunan ol li mem. Por tiu tempo, dum li estos sur la scenejo, ankaŭ interne li devos esti maljuna, ne nur en sia aspekto. Kiel oni fariĝas maljuna interne?

La problemon de la masko li solvis rapide, dum li atendis je la tramo. La aktoro ne havis aŭton, se li havis tempon, li veturis per aŭtobuso aŭ tramo, taksion li vokis nur tiam, se li rapidis. Li ŝatis la plenajn veturilojn, kiel ajn malkomfortaj ili estis, eĉ, kvankam li ne multe komprenis pri la sporto, kelkfoje li vizitis ankaŭ la matĉojn, aŭ se li havis tempon, li trarigardis la geedziĝon aŭ enterigon de tute fremdaj personoj: li studadis la vizaĝojn, la gestojn, observis kaj notis iun ŝultrotenon, ekklakan voĉon.

La ideo pri la masko doniĝis nature: li prunteprenos la vizaĝon de Patro. Patro estas jam preskaŭ okdekjara kaj ili tre similas unu al la alia; se li ĝisvivos, ankaŭ li estos tia, tia blankharara, magra maljunulo.

Ilia loĝejo estis en la nova loĝkvartalo, li devis veturi longe. Li konis bone tiun ĉi kvartalon, ĉar tie li naskiĝis: li memoris la lokon, kie nun altis la novaj ludomoj. Iam ĉi tie estis herbejo, kokidoj skrapadis inter la anemia herbaro, bluis la emajlo de forĵetitaj potoj, ne estis bone kuradi nudpiede, ĉar la tero estis plena de vitroruboj. Ankaŭ akacioj staris tie, al ilia trunko kelkfoje oni ligis ŝnuron, je la fino de la ŝnuro paŝtiĝadis kapro. Se malantaŭe, sur la digo pretermuĝis la vagonaro, la kapro levis la kapon, rigardis post la vagonaron; ĝia flava rigardo estis nervoza kaj malica.

Iam antaŭe li kutimis post la antaŭtagmeza labortempo gvati je sia Patro de sur rando de foso. Ekde la morto de sia patrino ĉiam li iris antaŭ lin, ĉe la enterigo eknestis en li la suspekto, ke la homoj povas malaperi el la domo kaj neniam plu revenas. Kio okazus al li, se foje ankaŭ lia patro malaperus? Se li ekvidis lin elpaŝi el la fabrik-pordego, li trankviliĝis, kuris hejmen, kiam la konataj paŝoj atingis la sojlon, li kaptis la manĝaĵon for de la fajrejo. Li kuiris aŭ terpom-supon, aŭ fazeolon. Proksimume de tie li gvatis sian patron, kie nun estas tiu apoteko.

En la lasta duonjaro apenaŭ li kunestis kun Patro. Dum la antaŭtagmezoj li provadis aŭ lernis rolojn, tagmeze li foriris de hejme kaj kiam vespere li venis hejmen, jam estis tiel malfrue, ke li ne volis lin veki. En la lastaj ses semajnoj li jam preskaŭ eĉ dormis en la filmfabriko. Nun sekvas iom pli trankvila periodo, ili povos pli ofte kunesti. Jam delonge li ne venis hejmen tiel frue. Nun tuj li eksidos apud li, se li nur ne havas gaston. Multaj vizitas Patron, ĉiun semajnon venas iu lin vidi el la laboril-fabriko.

Longe li sonorigis, ĝis fine li povis eniri. Patro forgesis la ŝlosilon en la seruro kaj li iradis pli malrapide, ol antaŭe.

De jaroj li ne rigardis lin tiel atente. Patro iel fariĝis pli malalta, ol li estis junaĝe, troviĝis io en la konturo de liaj ŝultroj, en la maniero, kiel li tenis sian magran kolon, kio ŝajnis preskaŭ neimitebla. Kiam li lin brakumis, karesis la brakon: preskaŭ pikis liaj ostoj, liaj ŝultroj estis pintaj, preskaŭ akraj. „Mi farigos tre larĝan vestaĵon, — pensis la aktoro, — en ĝi mi efikos pli magre. Patro malgrasiĝis. Mi eĉ ne rimarkis."

Li trarigardis sian poŝton, poste eliris al la balkono por cigaredi. Io lin malt-

rankviligis, sed li ne povis doni nomon al la malbona sento. Malsupre infanoj kriadis, — la aktoro subite ekkonsciis, ke ne la bruo lin ĝenas, sed la silento. La interna silento. En tiaj posttagmezoj Patro preskaŭ ĉiam marteladis.

Lastjare li tiel preparis sin por Otelo, ke al la rimoj kunsonoris la martelo de Patro, — io sekuriga, io trankviliga estis en tio, ke li tie agadas-faradas en la alia ĉambro, malplenigas kaj plenigas sian laborilokeston kaj riparas aŭ ĉarpentetas. La muroj estis tiel maldikaj, ke traaŭdiĝis ankaŭ tio, se li deĵetis la fajlilon aŭ la pinĉprenilon: la laboriloj kunpuŝiĝis. Lian infanaĝon revokis tiu ĉi agetado, iel eĉ imagi li ne povis Patron sen tiuj ĉi bruetoj. Kiam la maljunulo pensiiĝis, ili jam loĝis en tiu ĉi loĝejo. Li ŝanĝis la tablon en lia ĉambro je pli granda, ke laŭplaĉe li povu labori.

Nun Patro ne martelas.

Li formetis la cigaredon kaj eniris. Patro sidis ĉe la forno—ankaŭ tiu ĉi kutimo restis el la paseo, ĉar nur ĉirkaŭ la kuirforno estis varme ĉe ili —, liaj manoj estis surgenue, la okulojn li tenis fermitaj. Je la malfermo de la pordo li ekrigardis, sed diris nenion. Estis brila septembra posttagmezo, tra la balkonpordo inundis la varmo. Patro estis sen jako, super la ĉemizo estis la veŝto. Li palpis lian manon, ĉar subite li pensis, ke eble li havas febron. La veŝto lin timigis, la nemotivita veŝto, sed la manoj de Patro ne varmegis, eĉ malvarmetis, liaj plataj ungoj estis blankaj kaj puraj. Super la nodozaj vejnoj ankaŭ la haŭto de liaj manoj estis blanka, maldika, delikata, kalkblanka. Patro antaŭe havis ungojn oleokadrajn, kelkfoje vunditajn, liaj dikaj fingroj estis brunaj. „Blankan manon mi devos ŝminki, — pensis la aktoro. — Ne sufiĉas, se nur mia vizaĝo estas blanka. Mi bezonas ian specialan farbon, ke ĝi faru tian efikon, kvazaŭ mia haŭto eĉ ne estus haŭto, nur ia delikata ŝirma papero sur miaj ostoj."

Patro rimarkis, ke li observadas lin, li ekrigardis, ankaŭ ekridetis. Sub liaj dikaj brovoj kaj lipharoj ekmovetis lia buŝo, poste la muskoloj malstreĉiĝis, „Kiel strange li rigardas, — pensis la aktoro, — iam li havis tiajn kuraĝajn okulojn, brilajn. Nun iel ili estas pli malgrandaj, pli mallarĝaj, ol kiajn mi primemoras." Estis ia rifuzo en la rigardo de Patro. „Mi ne diros ĝin, — diris la rigardo, — ne demandu. Ĝi estas mia afero."

Ili komencis interparoli, tio estas parolis nur li, Patro aŭskultis, de tempo al tempo respondis. La ĉambron de Patro ĉiam karakterizis ia gaja senordo, ia konfuzo, laboritaĵoj, disĵetitaj ladlamenoj, peco da kruda fero, multaj laboriloj. Nun lia tablo estis malplena kaj kiel onjo Sári ŝatis, kiu purigis kaj kuiris por Patro, la tablon kovris kovrilo, sur ĝi estis vazo, ĉe du flankoj de la vazo, en centimetre egala distanco, po unu cindrujo. Kiam li demandis pri la laborilkesto, Patro ĵetis rigardon al la lito, kaj diris ke nun li faras nenion. Tio tedas lin.

Li nur gapis al li. La vorto „tedas" tiel same ne estis karakteriza pri Patro, kiel tio, ke la laborilkeston li tenas sub la lito. Li rigardis Patron kaj pensis pri tio, ke en la dua akto li tenos ion en sia mano, ian aĵon kaj priludos, ke antaŭe ĝi estis grava por li, li ĝin ŝatis, — poste li donos per sia ludo ian profundecon al tiu aĵo, fonon kaj antaŭvivon, — sed nun jam ĝi tedas lin, ne interesas lin, li ĝin plu ne bezonas. Ankoraŭ ĝi estos apud li, sed jam tiel, kvazaŭ ĝi jam ne estus la lia. Kio estu tiu aĵo? Io, kio sekvas el la karaktero kaj profesio de la figuro. Li eltrovos tion.

Ili kune vespermanĝis. Se li manĝis hejme, ĉiam Patro metis la tablon kaj pladis por li. Patro sciis precize, ke en lia metio ankaŭ tio estas laboro, se li legas aŭ nur sidas kaj rigardas antaŭ sin en la spegulon. Nun li iris al la kuirejo, ĉar teruriĝis pri tio, kiel metas Patro la tablon. Unue Patro eĉ ne volis enporti la manĝaĵojn, klarigadis, ke li manĝas plej ofte en la kuirejo, tiam oni ne devas enportadi la pladojn, poste, kiam li vidis, ke tio ne plaĉas al la filo, li surmetis la kovrilon kaj komencis unuope portadi, kio estis bezona: aparte li portis la kruĉon, aparte la du glasojn, aparte la telerojn. Tion la filo jam ne povis rigardi, li elkuris, kunmetis ĉion bezonatan, plenpakis la grandan pleton. Kiam li frapfermis la pordon de la fridujo, li ekvidis Patron. Li staris sur la soĵlo kaj lante li flankentiriĝis, ke li povu preterkuri kun la etaĝe ŝarĝita pleto. La aktoro estis konfuzita, ĉar subite li sentis, ke en la okuloj de Patro estas kolero, li rigardas al li, kvazaŭ al malamiko, kiu malkovris lian plej gardatan sekreton. Kia stranga vespero!

Dum vespermanĝo li demandis pri oĉjo Paŭlo. Patro apenaŭ manĝis, plie trinkis, li prenis la glason ambaŭmane kaj trinketadis, kiel infano. Oĉjo Paŭlo jam ne venadas ĉi tien, nek Fraĉjo - diris Patro. Li diris al ili, ke ili ne venu. Li ne ŝatas la gastojn. Liaj neĝblankaj ungoj brilis sur la ventro de la glaso kaj super la akvo li rigardis sian filon. La aktoro manĝis senapetite, iel li ne havis bonan humoron. Kiam ili finis, Patro deziris la vespermanĝon je la sano de la filo kaj stariĝis. Verdire li ne stariĝis, sed levis sin ambaŭmane sur la brakoj de la seĝo kaj ŝovis sin supren, poste komencis ree unuope elportadi ĉion. La aktoro ankoraŭ havis en la buŝo la duonon de piro, kiam li saltleviĝis por lin helpi.

Dum la pladoj estis elportataj, Patro sidis apud la forno, la manoj surgenue, la okuloj fermitaj kaj li dormis. Ŝed tio ja havas nenian sencon! Pasis la oka, se li estas laca, li enlitiĝu, tiel li povos dormi komforte. Li tuŝis lian ŝultron. Patro tuj vekiĝis, ion murmuretis, poste hontante iris al la banĉambro. „Kial li hontas?" rompis la kapon la aktoro. El apud la pordo li vidis bone, ke li rerigardas al li, kaj tiam denove li havis la malnovajn okulojn, eĉ se pli malgrandajn, ol iam, kaj denove li havis la senton, ke Patro koleras pro io kaj samtempe li estas strange ruzmiena, kiel se iu scias pri io, sed ĝin ne eldiras, sekretas.

Li laboris ĝis noktomezo: li legis la teatraĵon. Veninte al la fino, li ĝin rekomencis, studadis la rolon de la

aliaj aktoroj; ĉiam tiel li komencis la laboron; tiel li venis al la propra figuro, ke antaŭe li ekkonis ĉiujn rolantojn de la teatraĵo. Nun jam li estis pli trankvila, preskaŭ gaja. La rolo komencis elformiĝi, enkorpiĝi; ĉirkaŭ noktomezo li tiris sian seĝon antaŭ la spegulon, kiel li kutimis sin ekzercadi kaj li eklaboris. Li provadis gestojn, poziciojn, sidiĝis kaj leviĝis maljunulmaniere de sur la seĝo, poste li prenis cindrujon, per dek fingroj, kiel li tion vidis. Li paŝis pli proksimen al la spegulo kaj provis tiri la palpebrojn pli malgrandaj, preni la okulojn pli striktaj. Li ne sukcesis. Nu, li faros ĝin per gluaĵo. Li elludis ankaŭ tiun strangan rigardon, la nekompreneblan kuirejan rigardon de Patro, kiam li mem fajfante venis internen kun la vespermanĝa servico, poste li subite kovris la okulojn per la manoj kaj eksploris. Laŭte, sen ĉia honto, infanmaniere li ploris kaj li sciis, ke Patro mortos.

Tradukis: *L. TÁRKONY*

La signifo de la spacesplorado

Ekde 1957, do dum la unua jardeko de la kosma spacesploro, oni ofte demandadis: Kial oferas la homaro multegajn miliardojn, eĉ homvivojn por atingi Lunon, planedojn, por konkeri la senfinan kosman spacon? Por kio estas bona la tuta spacesplorado? La homaro ja havas gravajn solvendajn taskojn sur sia propra planedo!

La homa menso ĉiam serĉas, esploras — foje eĉ kontraŭ si mem (ni pensu pri la atombombo). Jam la infano esploradas — preskaŭ ekde sia naskiĝo. Antaŭ pli ol 10 jaroj la hom-bebo etendis siajn manojn al la eksterteraj spacoj, kaj antaŭ 7 jaroj jam li mem ekiris al la nekonata, senfina kosma vojo. Tiu, kiu forprenus de la homo la eblecon por eksperimenti, forprenus de li la sciencon, la arton, la progreson: do la tutan vivon indan por la homo.

Krom tio, la ĝisnunaj spacesploraj eksperimentoj kaj studoj donis jam tre gravajn rezultojn por la scienca kaj por la praktika homa vivo. Sufiĉos mencii nur kelkajn el la (pacaj) aplikoj.

La astronomio — dank' al la artefaritaj astroj — ĉesis esti nura teoria scienco: ĝi povas jam fari eksperimentojn laŭplaĉe lanĉante sur orbiton plej diversajn homkreitajn astrojn: satelitojn, lunsputnikojn, planedojn, meteoritojn, eĉ etajn kometojn.

La tera atmosfero ensorbas ĉirkaŭ la duonon de la radiadoj ekirintajn el astroj kaj ĉi tien alvenantajn. La bildo, kiun la surtera astronomio elformis kaj elformas pri la Universo kaj pri ties anoj, ne povas esti fidela, aŭtenta. Nur suprenleviĝinte en la plej densajn atmosfertavolojn povas la scienco vidi la eksterteran naturon en ĝia vera realo. La astronomio povis malkovri per la artefaritaj astroj la rentgen- kaj gama-radiojn de nia Suno kaj de la steloj, kiajn radiadojn la atmosfero tute ensorbas.

Pro la malkvieto de la tera atmosfero ni ne povas eluzi la plenumkapablecon de la grandaj teleskopoj. Inter la spacesploraj planoj oni povas trovi astronomiajn teleskop-sputnikojn, provizotajn per spegulteleskopoj, kies diametro atingos du metrojn. Tiuj ĉi instrumentoj eksterteraj — koncerne la plenumkapablecon — superos ĉiujn terajn teleskopegojn.

La artefaritaj satelitoj kaj aliaj spacesploraj aparatoj alproksimiĝis, eĉ parte atingis aliajn astrojn: la Lunon kaj du planedojn. Dank' al la lunesploraj, aŭtomataj laboratorioj, ni konas jam la tutan lunsurfacon, eĉ de la Tero forturniĝintan duonsferon. Ekzistas multaj surfacopartoj de la Luno, kie ni konas ĉiun ŝtoneton kaj kaveton, kies diametro atingas almenaŭ unu milimetron. Kaj antaŭ kelkaj jaroj neniu estus suspektinta, ke la surfacon de la planedo Marso kovras tiaj ringoformaj montoj same kiaj la Lunon.

Per helpo de spacraketoj alproksimiĝintaj al aliaj astroj kaj ties instrumentoj, ni povis pli precize mezuri la diametron, mason, surfactemperaturon ktp. de Luno, Marso, Venuso, ol antaŭe.

Sed la plej proksima astro estas ja *nia Tero!* Kaj evidentiĝis, pruviĝis tio, ke ni povas pli bone ekkoni nian propran planedon de ekstere, ol farante mezuradojn sur ĝi.

La artefaritaj satelitoj kaj la kosmonaŭtoj povas foti la tersurfacon: la liniojn de la marbordoj, la kontinentojn: la dezertojn, la nealireblajn montarojn kaj netrapaseblajn tropikajn praarbarojn — kaj tiuj fotoj alportas profiton al la geografoj kaj geodetoj. La televidaparatoj de la *meteorologiaj sputnikoj* konstante alsendas bildojn de la tera nubaro. De tiuj bild-serioj oni povas precize konstati la movrapidecojn kaj movdirektojn de la nubkovrilo — eĉ super la neloĝataj dezertoj, montaroj, maroj kaj egaj glacikampoj. El la ricevitaj indikoj la meteorologio jam nun povas doni al ni pli fidindajn veterprognozojn ol la ĝisnunaj.

Ne nur senvivajn valorojn, sed ankaŭ multajn homvivojn jam savis la meteorologiaj satelitoj. Nome la grandaj tajfunoj estiĝas sur la vastegaj oceanoj, kaj ĝis nun oni ne povis antaŭe atentigi la endanĝerigitan loĝantaron ĉemaran. Sed nun tio jam eblas, ie ajn estiĝas la uraganoj.

Per helpo de ĉiu sputniko (eĉ de la neinstrumentitaj satelitoj), kies orbito estas sekvebla, ni povas vidi *en la Teron*. Jes, oni povas envidi sub la tersurfacon, ĉar la orbiton de ĉiu sputniko elformas la gravitoforto de la Tero. La etaj malkorektaĵoj en la orbitoformo signifas densajn malegalecojn en la Tero. Se la denso estas ie malpli granda ol la mezvaloro, tie povas esti oleo aŭ tergaso en la terkrusto. Granda denso povas signifi kuŝejojn de ercoj. (La magnetaj instrumentoj de diversaj satelitoj artefaritaj jam malkovris grandajn ferkuŝejojn subterajn.)

Sur la tersurfaco ĝis nun oni povis difini la distancon inter du geografiaj punktoj nur kun kelkcentmetra malcerteco. Per helpo de la *geodeziaj satelitoj* tiu ĉi eraro konsiderinde malpligrandiĝis. Ekzemple la lokon de iu ajn marŝipo sur la oceanoj oni povas doni per konvena observado de tiaj satelitoj kun kelkaj dek, eĉ kelkaj metroj de certeco. (En la tempoj de la unuaj grandaj malkovrintoj la marŝipistoj eraris ofte cent kaj cent mejlojn dum unusola vojaĝo interkontinenta!)

La telespektantoj povas rigardi eventojn, kiuj okazas en la sama momento — sed tre malproksime de iliaj landoj. Dum la lasta — resp. la venonta — olimpioj la rezultojn de la diversaj sportluktadoj kaj sportmatĉoj povis — resp. povos — perokule ekkoni samtempe la zelotaro de la tuta terglobo, helpe de la *komunikaj satelitoj*. Tiuj komunikiloj povas anstataŭi mil kaj dekmil kilometrojn longajn telegraffadenojn, kablojn submarajn, aŭ milionojn da telefonlinioj.

Surfacoparto de la planedo Marso. Grandega surprizo de la astronomoj estis la fotoserio de la Usona artefarita astro Mariner IV, sur kiu vidiĝas sur nia frato-planedo, tiaj krateroj kaj rondformaj montoj kiaj la Lunon kovras. (Nia bildo estas la 11-a de la serio, fotita la 14-an de julio 1965, de 12 500 km-a alteco de la surfaco de Marso)



La nubkovraĵo super Eŭropo, vidita de 1390 km-a alteco. Ĉe la rando de la granda, supereŭropa ciklono, en la mallarĝa, sennuba strio estas montrita la loko de Budapeŝto. Tiaj fotoj faciligas kaj sekurigas jam la veterprognozojn. (Fotis la meteorologia satelito ESSA—2, 20. majo 1966.)

Ekzistas du grandaj specoj de tiaj telekomunikiloj. La *pasivaj* satelitoj ne havas instrumentojn: ricevilon, amplifikilon kaj sendilon: ilia surfaco nur simple reflektas la elektromagnetajn ondojn al ili direktitajn (ekz. Eĥo-satelitoj). Pli efikaj estas la tiel nomataj *aktivaj* komunikaj satelitoj. Tiuj entenas ricevilon, amplifikilon, dissendilon funkciantan per akumulatoroj kaj baterioj. Tiaj estis, resp. estas la famaj Telstar-oj, Early Bird, Molnijasputnikoj, kaj la fiksaj *satelitoj*, kiuj cirkulas la Teron dum 24 horoj, do ili ŝajne haltas super iu punkto de la ekvatoro (ekz. la Syncom-oj).

La du trionoj de la novaj *teknikaj metodoj* prilaboritaj kaj aplikataj por la spacesploraj raketoj kaj instrumentoj restas „surtere", ĉar tiuj riĉigas la teran teknikon. Mi mencias nur la miniaturajn radio- kaj aliajn aparatojn, kiuj eble ankoraŭ ne ekzistus sen spacesploraj eksperimentoj, en kiuj gravega demando estas la malgrandeco kaj malpezeco de la aparato.

Ni povus daŭrigi mencii la utilecojn de la plej diversaj homkreitaj astroj, sed prefere ni atentu al iu alia, ne malpli grava vidpunkto.

Sekve de la spacesploro ŝanĝiĝas la ĝenerala koncepto pri la tuta mondo, kaj pri la Tero en ĝi. Sur kelkaj, de ekstere faritaj fotoj nia Tero estas videbla kiel eta, lunoforma astro. Tiel por ĉiu homo evidentiĝas, ke nia planedo tute ne estas la centro de la Universo, do la homaro finfine povas resaniĝi el la scienca egoismo: el la geocentra mondpercepto.

Senfinas la homa scivolo. Tiu ĉi neestingebla deziro instigas la homaron ĉiam pli bone ekkoni la naturon kaj ties leĝojn. Ekkoni kaj utiligi tiujn leĝojn kiel eble plej perfekte: jen estas la plej bela, plej utila celo antaŭ la nuna kaj la estonta homaro. Al tiuj fortostreĉoj ni povas danki niajn tutajn evoluintajn sciencon kaj teknikon, kaj pere de ili nian nunan komfortan vivon. La plua evoluo dependas de la pluaj esploradoj pri la naturo, ekzemple pere de la spacesploro. Do ni ne domaĝu la miliardojn, eldonitajn kaj eldonotajn por tiu ĉi belega, tuthomara celo!

AŬREL PONORI THEWREWK

La Sindikato de la Hungaraj Pedagogoj aranĝis enketon pri la sociaj, edukaj, kulturaj problemoj de la teknika progreso. Ĉefa resumo de la diskutoj estas, ke en la konomaterialo oni ne apartigu rigide la sciencan-teknikan parton de la sociaj sciencoj, de la literaturo kaj artoj. La unuflankeco ja povas rezultigi danĝerojn. La naturscienco, la teknikaj bazaj konoj fariĝu partoj de la moderna klereco, kaj samtempe tiu ĉi bazo de la kulturo entenu la artojn kaj la daŭre restantajn tradiciojn de la kulturo. La edukado devas esti tia, ke la scienca bildo de la mondo ne forpuŝu la sentojn el inter la rilatoj de la homoj. Ankaŭ la romantiko kaj la amuziĝoj devas havi konvenan rolon.

*

ZSIGMOND MÓRICZ

JÓSKA SAMU KIS

Ili venis el la sama vilaĝo de ie ĉe la limo de Transsilvanio, ili estis ankaŭ ruzetaj, kiel la sikuloj. Ili estis ĉiam gajaj, bonhumoraj kaj en la vico ili staris ĉiam unu apud la alia. Ili ricevis fine ankaŭ la saman nomon, la tuta regimento konis ilian famon, La unua fraŭlo estis Samu Kis, la alia Jóska Samu, sed la du viroj estis kune Jóska Samu Kis.

— Frato — diris Samu Kis —, mi komencas malsati.

Tiam ili ne manĝis jam de du tagoj. Ili ĥavis nenion en la mondo. Oni sendis ilin antaŭen al la dratbariloj, post

ili estis granda senarbejo, tra kiu kelkaj soldatoj povis iri nur nokte kaj ŝtele, sed ankaŭ tiuj portis al la kamaradoj pli da municio ol da manĝaĵo.

— Kion ni manĝu, frato? — diris Jóska Samu.

— Kion vi havas?

— Mi havas akvon.

— Kaj mi havas salon.

— Tio ja estas grandioza, ni kuiru supon.

— Sed el kio?

— El herboj.

— Ĉu tio estas bona?

— Atendu, tio ne estos bona. Mi kuiros spinacosupon, ĝi estos pli bona.

— Sed ni ne havas spinacon.

— Ni plukos ĝin. Sur tiu ĉi granda kampo ĝi troviĝos ie. Hejme mia panjo nur eliras kaj tuj portas da ĝi por unu kuiro.

— Nu, ĝi estos do tre bona.

Ili eĉ ridetis pri tio. Sed ja vane ili trarampis tiun ĉi piedpremitan kampon, ili ne trovis spinacon, kiun ili kuraĝus kuiri.

— Nu, frato, mi eliros antaŭ la dratojn, tie ankoraŭ neniu iradis, tie estas bela la herbo, en ĝi certe mi trovos ion.

— Ankaŭ mi eliros.

— Vi ne venu, ĉar se unu restos tie pro iom da spinaco, almenaŭ la alia restu ĉi tie.

— Do, tiam eliros mi.

Vi volas formanĝi ĉiujn herbojn de la kampo de antaŭ mi!

Tiam Samu Kis jam traŝovis sin sub la pikildratoj.

Li malrapide glitis antaŭen kiel granda dika talpo.

Subite iu stranga brueto frapis liajn orelojn.

En la unua momento li silentis timigite, poste li ekridis nur mallaŭte, por ke la rido ne havu voĉon.

Li aŭdis ronkadon.

Kion nun li faru?

Kiu povas dormi tiel trankvile sub la granda ronda ĉielo?

Li kolektas ankoraŭfoje sian tutan vivoforton, kaj iras antaŭen plu, malrapide, kiel lacerto.

Kaj antaŭ li estas rusa soldato.

Tie li kuŝas en la herbo sterniĝanta en sia verdeta vesto, la ĉapelo duone pendas de sur lia kapo, longa blondet-bruneta hararo gluiĝis al lia ŝvitplena varma frunto. Lia buŝo iomete estas malfermita kaj lia vango milde paceca kiel tiu de infano, tie li kuŝas sur la humo. La armilo falis el lia mano, lia pansako estas tie apud li, li dronis en dormo, feliĉa kaj plena de konfido, kiel bebo en la patrina sino. Li ne zorgas pri tio, kio ajn okazas al li, oni povas lin mortbati, oni povas lin mortkisi, ĝis li vekiĝos . . . Al kiu konfidis sin do tiu ĉi ruso? . . . . La sankta Tero kvazaŭ ŝvebis sub li, kvazaŭ la varman pulsadon de la tero oni povis vidi en sama ritmo kun la mallaŭta spirado de la rusa soldato.

La okuloj de Samu Kis ekbrilis. Lia rigardo fariĝis akra, li gvatis, pesis, kiel profunde dormas la ruso.

Poste li etendis la manon, en la mano la forte tenitan akran pintan bajoneton.

Kiam ĝi estis nur je centimetra distanco disde la korpo de la ruso, de lia malbutonita, harplena, ruĝhaŭta, anhelanta brusto, li haltis . . . La malmola fero, la senkompata murdilo kvazaŭ de si mem haltis, kvazaŭ li hezitus, tremante sub la influo de ia bela kaj vera penso. Poste li retiriĝas kaj la pafilon metas en sian alian manon.

Kaj Samu Kis prenis per nuda mano la longan rusan fusilon kaj levis ĝin el la herboj . . . Kiel obeema besto estas la armilo, la maŝino, se ĝi ne estas kroĉita kun la vivanta homa animo. Jam estis tie la rusa morto, en la hungara mano. Kaj nun denove malfermiĝis, etendiĝis la hungara mano, kaj levis la brunan pansakon.

Ceteran aĵon li ne bezonis.

Ankoraŭfoje li trarigardis la ruĝe dormantan grandan homon. Li ne estis jam juna homo, longeta maldensa blondeta-bruneta barbo montriĝis sur liaj vangoj, liaj trajtoj estis lacaj kiel tiuj de familiopatroj muelitaj en la batalo de la vivo.

— Dormu, frato — murmuris Samu Kis kaj li metis sur sian kolon la fusilon, la pansakon kaj komencis gliti reen.

Li aŭdis ekronkon, de kiu li timiĝis. Terure li timiĝis: se vekiĝos la malfeliĉulo, li devos lin mortigi.

Li atendis senbrue, kiel la sekalskarabo, kiu je la plej malgranda brueto ŝajnigas sin mortinta, kaj nur post longa minuto ekiras denove . . .

Tiel ekiris ankaŭ li, reen sur sia padospuro . . .

Kiam li kaŝis sin sub la drato, li trovis Jóska Samu sur lia gardoloko. Li sidis kaj sidante dormis. Li dormis, kiel la ruso, kaj li ne vekiĝis.

Pro la dormo la soldato ricevis en la milito grandan punon, vergofrapon, perŝnuran pendstarigon, en danĝera



tempo oni eĉ pafmortigus lin . . . kaj kiel dormis ankaŭ tiu ĉi . . . La malfeliĉulo ne povis ĝisatendi la dolĉajn herbojn.

— Nu, nu he . . — ekskuis lin la kunulo. — Nu, he . . .

Apenaŭ li povis lin veki.

Ĉi tie estas la manĝaĵo.

Jóska Samu per siaj grandaj malfermitaj dormemaj okuloj rigardis la pansakon, kiu estis ŝvela.

Li rigardis al sia kunulo kaj balancis la kapon. Li komprenis ĉion.

Sed estis io, ia strangaĵo en la pansako, pro kiu la okuloj de ambaŭ malfermiĝis rondaj.

Stranga kreaĵeto: malgranda puplulilo.

Jóska Samu prenis ĝin en sian manon. Li prenis ĝin en sian manplaton kaj vidis, ke ĝi estas tute normala malgranda plaĉa lulilo. Per tranĉileto skulptita, balanciĝanta lulileto.

Ili silentis kaj rigardis ĝin.

La suno varme brilis de sur la ĉielo, ili estis duone svenintaj en la senombro, gutoj perlis de ilia frunto kaj ie ĉe iliaj okuloj la gutoj kuniĝis, ekruliĝis . . .

La larmo de Jóska Samu falis en la mezon de la malgranda lulilo.

— Kie vi prenis ĝin, frato?

— Tie dormas orfo sola — diris Samu Kis.

Jóska Samu ekbalancis la kapon.

Ili silentis. Li volis diri: ĝi estas taŭga por mia filineto Elinjo! . . . Sed li ne elparolis tion, nur silentis. Ankaŭ la alia homo volis diri la saman: Portu ĝin hejmen por via malgranda filineto Elinjo . . . kaj ankaŭ li ne elparolis tion.

Ili rompis pecon el la pano kaj malrapide manĝadis.

Po mordaĵoj ili dispecigis la disdonitan panon.

Foje diras Jóska Samu:

— Frato.

— Kion vi bezonas, frato?

— Kie dormas la orfo?

— Do, tie, sube.

Kaj ili manĝis plu. Foje Samu Kis ekparolis:

— Ho, ho, se mi estus sciinta . . .

Kaj ili denove manĝis plu.

Denove Jóska Samu ekparolis:

— Ankaŭ mi povus fari tion por mia Elinjo — kaj li rigardadis per artkomprenaj okuloj, studis la formon de la lulileto.

Poste Samu Kis diris:

— Ĝi estas taŭga, sed ĝi ne estas sorĉaĵo.

Jóska Samu respondis:

— Ne.

Samu Kis denove tiel:

— Transdonu ĝin al mi, frato . . .

— Mi? . . . mi ne donas . . .

— Do, bona homo, mi ne volas ĝin manĝi.

— Mi ne scias, kion vi volas, sed mi volas ĝin reporti.

— Kiel vi reportus ĝin, ja mi alportis?

Sed mi eltrovis ĝin . . . Mi havas infanon, mi scias, kiel! . . .

Li ne parolis plu, nur ekiris reen sur la spuro de la alia. Li timis, ke li ne povos paroli pro la premo de sia gorĝo.

— Nu, metu almenaŭ ion en ĝin por ne alporti malplenan lulilon — diris Samu Kis krude kaj rompis pecon el la pano. — Kiu scias, kiam ricevos panon denove tiu ruso.

La ruso estis maldorma, tie li sidis en la herbo, klinis suben sian kapon, li jam ne sciis kio okazis al li.

Li nur tiam alarmiĝis, kiam homa vizaĝo aperis antaŭ li.

Jóska Samu mansignis al li, poste etendis sur sia manplato la lulilon.

La ruso rigardadis per sangruĝaj okuloj gape, stulte.

Nu, do prenu nur — diris afable Jóska Samu — ne dinamito estas en ĝi, ja vi povas scii, kio estas tio.

Kaj la ruso prenis ĝin. La du patroj rigardis unu al la alia, poste li rapide turnis sin. Ambaŭ hontis sur la batalkampo pro la larmoj en okuloj de viro . . .

El la hungara: *Krisztina NYITRAY*

LA TRAGEDIO DE L'HOMO

En 1966 estis nove eldonita Esperantlingve la titolnomita verko de Imre Madách. La unua eldono okazis en 1924.

Pri tiu ĉi nova eldono aperis recenzoj vaste en la Esperanta gazetaro. Sed bedaŭrinde ĉiuj nur servute ripetas la oficialan opinion de ĉiuj, ĝis nun vivintaj reĝimoj kaj neniu ekvidis ĝian veran tendencon. La tezoj de tiuj opinioj estas:

1. La Tragedio estas religiema verko, ĉar en tiu rolludas la kreanta Dio, anĝeloj, Adamo kaj Eva.

2. Ĝia filozofio estas ŝajne skeptika, pesimista, ĉar la Homo en ĉiuj aktoj estas malfeliĉa. Sed tion kaŭzas nur la cirkonstancoj, ĉar la dramo estiĝis en la malespera atmosfero post la malvenko de la hungara revolucio en 1848—49.

3. Sed ĉian pesimismon rebonigas la „esperigaj" finvortoj de Dio: „Mi diris homo, luktu kaj firme fidu!".

Ĉi tiujn klarigojn elpensis jam la malnova hungara reĝimo, tuj post la naskiĝo de la Tragedio (1861). La Akademio kolere atakis ĝin pro ĝia pesimismo. Johano Arany, — la tiam jam respektata akademiano, — bone konis la valoron kaj veran tendencon de la verko, kaj por savi ĝin, li devis misklarigi la verkon:

— La Tragedio estas esence optimista, — li deklaris, — ĉar ĝi fermiĝas per la vortoj de Dio: „Homo luktu kaj firme fidu!"

Tiutemple la Tragedio estis jam sufiĉe publike konata kaj ĝia alta valoro jam ne estis facile malaperigebla, do, la oficiala opinio ĝoje ekkaptis la ideon: „la Tragedio estas esence optimista!" Tiel ĝi akiris stampitan pasporton al la publiko.

Post kelkaj jaroj, kiam la postrevolucia terorperiodo en Hungario finiĝis, kaj venis la liberala burĝa reĝimo, la oficialuloj eltrovis la suplementon al tiu ĉi indulga klarigo: „Eĉ la konjektita pesimismo estas nur ŝajna, kion kaŭzis la senesperiga atmosfero pro la malvenko de la revolucio. Se Madách verkus la Tragedion hodiaŭ, ĝi eĉ ŝajne ne fariĝus pesimista.

Interese estas, ke ankaŭ la reakciuloj havis sian propran „klarigon", kompreneble la kontraŭan: „Madách estis aristokrato kaj ne konsentis la revolucion, tial li estis pesimisto."

Nu, ĉi tiu „aristokrato" post la revolucio suferis unujaran karceron pro sia revolucia sinteno. Cetere li estis tute vulgara nobelo, el kiuj dum la revolucio batalis kvindekmil kontraŭ la armeoj de la aristokrataro.

Kaj, — ridinde, — nun ambaŭ opinioj rolludas en la samaj komentarioj, unu apud la alia! Tiel la politikaj korifeoj sukcesis lavi la Tragedion salonkonvena.

Sed la tiama oficiala gazetaro ne forgesis uzi ankaŭ la alian armilon: la prisilentadon de tiu ĉi tikla kaj malagrabla verko. Karakterize estas ke en Hungario la Tragedio estis nur malvaste konata, kiam en Bohemio oni jam delonge konis, altetaksis kaj la teatroj jam favore ludis la ĉeĥan tradukon.

Depost tiam regis multaj diversaj reĝimoj. Ĉiuj havis siajn proprajn komentariojn al la Tragedio, sed la bazaj tezoj estis ĉiam la samaj.

Kial ĉi tiu konsekvenca misklarigo?

Ĉar la principo de la Tragedio estas plene pesimisma. Ĝi sonas: „Neniam estis kaj estos epoko, kiu feliĉigus la homaron. La homaro ĉiam turmentos sin."

Vere malsimpatia tezo por ĉiaspeca reĝimo, konsiderante, ke la momenta, prezenca reĝimo ĉiam trumpetas, ke la antaŭaj reĝimoj ĉiuj estis suferigaj, sed la nuna fine sukcesis alporti la finan kaj eternan feliĉon al la homaro.

Konsiderante, ke la legantoj ne ĉiuj konas la verkon, ni skizas ĝian esencon:

Dio finis la mondkreadon. La anĝeloj vice kantas humilajn panegirojn al Dio. Nur Lucifer staras senvoĉe. Dio alvokas ankaŭ lin por laŭdi, sed li anstataŭ tio, kritikas la mondkreon, kiu estigis nur servilisman estularon, kies tasko estas per siaj luktoj kaj suferoj amuzi la despotan Sinjoron.

Dio kolere ekzilas la ribelantan anĝelon, kiu iras al la unua homparo. Lucifer endormigas ilin kaj ili sonĝe travivas la historion de la homaro. Adamo estas laŭvice faraono, poste Miltiades en Atheno, drinkema aristokrato en la dekadenca antikva Romo, krucista oficiro en Bizanco, Kepler, Danton, burĝo dum la kapitalismo en Londono, poste vizitas la falansteron dum la kolektiva sociordo (ideo de Fourier), forflugas de la Tero en la kosman spacon kaj revenas al la Tero en la malproksima estonto, kiam la Tero jam malvarmiĝas kaj la homo denove sovaĝiĝas.

Adamo devas ĉiam vidi la homaron, suferigantan sin mem pro ĥimeroj, pro elpensitaj fantomaj sloganoj: religia fanatismo, ŝovinismo, pro subpremo de despotoj, liberiĝintaj pasioj de la kanajlaro, dibočemo, korupcio, ekspluatado, ktp.

La tragika estonto senesperigas Adamon. Li decidas prefere mortigi sin mem por malebligi la estontajn suferojn. Sed Eva malkašas, ke ŝi estas graveda. La estonton jam ne povas preventi la memmortigo.

La vortoj de Dio fermas la tragedion, kiuj eksplikas, ke la paŝojn de la homaro devas direkti la destino, kiun ordonas Dio, t. e. la instinktoj, inter ili la espero kaj amo. „Luktu hom' kaj firme fidu!"

*

Nu, ĉu ĝi estas religiema, pia himno por la Eklezio? Tute kontraŭe! Ĉi tie Dio estas pli-malpli kaprica tirano, kiu kreas homaron por ĝui ties lukton, penan, vanan batalon por la neniam atingebla ripoza feliĉo. Do, esence, Li estas la n a t u r l e ĝ o j. Ties opoziciulo estas Lucifer, la l o g i k o, s o b r a p r u d e n t o, sena de ĉiuj ĥimeroj, spiritaj fatamorganoj. Li senindulge senvualigas la fantasmagoriajn „idealojn" de la ĉiam revema homa menso: la Athena demokratio, la h o m o j u z i o n kaj h o m o u z i o n, la libereco-egaleco-frateco, la kolektiva socio, kaj ĉiuj-ĉiuj „sanktaj" ideoj dronas en sangomaron kaj realiĝinte ili fariĝas en la manoj de ĉarlatanoj kaj maniuloj nur pretekstoj por subpremi, turmenti, ekspluati kaj ekstermadi la homan gregon. Vane la prudento (Lucifer) volas veki la logikan pensadon, la homaro blinde marŝas al la abismoj. Kaj kontraŭ la tragika sorto eblas fari nenion: la homaro naskas, plimultiĝas kaj plusuferas. La naturleĝoj venkas la prudenton.

Ĉu ĉi tiu vera tendenco ne elsentiĝas? Vere, la Tragedio estis skribita al tiuj, „kiuj havas okulojn por la vido kaj orelojn por la aŭdo". Ĝi estis verkita por la adeptoj, al la elito de la spirito. Imagu la sorton de la Tragedio, se Madách senkaŝe deklarus ĉi tiujn kontraŭekleziajn kaj kontraŭpotenculajn tendencojn!

Tial la Tragedio povis nur tre malrapide prosperiĝi. Sed la ideoj estas tiome grandiozaj kaj ĉiam-aktualaj, ke la tiama liberala reĝimo ne povis simple mutigi ĝin. Tial ili devis elpensi, ke la Tragedio estas esence religiema, kaj ke la „luktu kaj firme fidu!" estas patreca admono, bonedukite obei al la pia, filistra moralo kaj zorge eviti ĉiujn doktrinojn, kiuj eble maltrankviligus la sieston de la potenculoj.

Tiel fariĝis tiu ĉi tertreme skeptika kaj skeptikiga klasikaĵo de la mondliteraturo la katekismo de la filistra moralo por tiuj, kiuj „ne havas okulojn por la vido kaj orelojn por la aŭdo." Sed la posedantoj de ĉi tiuj sentorganoj tamen komprenis la esencon, kiu ĉiam plimalpli efikis kaj konkeris la mensojn, ĉar la tempoj ĉiam pli kaj pli pravigis la ideojn.

*

Okazis foje, ke mi prelegis en la Asocio de la Hungaraj Arttradukistoj. Memkompreneble, mi akcentis, ke ĉiun problemon de la arttradukado solvus nur Esperanto, se ĝi foje fariĝus tutmonda interpreta lingvo. Nuntempe la majstroverkoj de la malgrandaj nacioj estas preskaŭ entombigitaj kaj precipe tiuj de la senparenca hungara lingvo.

Al mia prelego alparolis iu, kiu kutimas traduki el ĉina lingvo. Li menciis sian propran kazon: foje li en Ĉinio interparolis kun ĉinaj literaturistoj. Unu el ili menciis, ke el la hungara literaturo li konas nur unusolan verkon: la Tragedion de l'Homo: Lia esperantista konatulo ja legis la Esperantan eldonon kaj ĝi tiome obsedis lian menson, ke li tradukis ĝin al ĉina lingvo kaj tiel, manuskripte, li montris ĝin al siaj konatuloj.

Jen, Esperanto, kiel diplomato de la kulturo de la malgrandaj nacioj! Kaj ne nur tial, ĉar ĝi estas internacia lingvo, sed tio estas dankebla ankaŭ al la majstra traduko de Kalocsay. Ĝi sonas glate, majeste, kiel orgeno de gotika katedralo.

*

La Tragedio efikis al multaj verkistoj de la mondliteraturo, kaj ilian verkadon fekundigis.

En Esperantujo la dramo de Julio Baghy: *„Sonĝo sub pomarbo" naskiĝis senkaŝe sub la influo de la Tragedio, kaj el la sama ideo: la hodiaŭaj geamantoj, Adamo kaj Eva sonĝe travivas la estonton de la homaro, ĝis la kompleta sinekstermo per atombombo. Animskuaj estas ĉi tiuj vortoj de la versa dramo:*

Mesioj venis kaj mesioj iris,
mesaĝis pri Promeso kaj — martiris.
La postlasita vero pri Fiktivo
dekmilojn martirigis en la vivo,
centmilojn pelis al batal' socia,
milmilojn ĉenis al revad' pasia
ĝis fine realiĝis la Promeso
por nutri — parazitojn de l' Progreso
kaj . . . jen dekmiloj iluzion perdis,
centmiloj vanon por la lukto spertis,
milmiloj pentis pri la rev' pasia,
espero velkis sub kalkan' socia,
la vivo saman melodion gurdis,
sub novaj signoj oni mortis, murdis
kaj dum popolo ĝemis kaj sopiris,
Mesioj venis, iris, kaj martiris.

Baghy komprenis la bazan ideon kaj tendencon de la Tragedio. Li ne imagis ĝin religia, aŭ optimisma . . .

Sed bone komprenis ĝin ankaŭ la eksterlandaj inspiritaj verkistoj, kiuj ankaŭ transprenis ĝin, same kopiante la formon, sed prisilentante la originon. Ili eluzis la eksterlandan nekonatecon de la Tragedio. Unu el la plej mondkonataj Tragedi-idoj estas la dramo de Thornton W i l d e r: „The skin of our teeth". (Angla idiotismo. Proksimuma signifo: malfacila, danĝera saviĝo.) Ĝi estis prezentita unue je 18 nov. 1942 en Novjorko, en teatro Plymouth *kaj poste ĝi travagis la mondon. En tiu ĉi dramo Adamo kaj Eva travivas la historion, ekde la glacia epoko ĝis la fino de la mondmilito. Novaĵo estas nur, ke ankaŭ Kain rolludas, la spirito de la detruemo. La nomo de Adamo en la modernaj scenoj estas* mr. Antrobus. *(Antropos: greka vorto: „homo".) Kiam la mondmilito preskaŭ ĉion detruas, mr. Antrobus entusiasme rekomencas la vivon plene de fido kaj espero. La figuron de Lucifer reprezentas Sabina, la ĉambristino, kiu malalte taksas la sencelajn revojn kaj sensukcesajn fortostreĉojn de Adamo kaj ĉe la fino de la dramo deklaras al la publiko, ke la sama afero ĉiam ripetiĝas en la tempoj: mr. Antrobus ĉiam rekomencas la vivon per nova, firma fido kaj espero.*

Nu, ĉi tiu estas la Tragedio de mr. Antrobus. Nur la stilo modifiĝis: ĝi fariĝis moderna, leĝera, Amerika. La „orgeno de gotika katedralo", adaptita al ĵazorkestro. Tamen ĝi estas majstroverko, kies aŭtoro same bone komprenis la tendencon de la Tragedio de l'Homo, kiel Baghy. La dramo trafuroris la mondon, sed la plej elkorajn aplaŭdojn rikoltis dum ĝia Budapeŝta prezentado, kie la publiko entuziasme salutis la novkostuman malnovan konaton.

*

Nu, tio ĉi ne povus okazi, se Esperanto estus jam akceptita mondolingvo.

Kiom multaj literaturaj valoroj devas perdiĝi pro la diverslingveco! Pli ĝuste: pro la ĵaluzo de la ŝtatestroj, kies miopa ŝovinismo timigas ilin, konjektante, ke la tutmonda oficialigo de Esperanto unuigus la mondon, kaj anstataŭ cent registaroj fariĝus nur unu kaj la ceteraj perdus sian panon . . .

Sándor SZATHMÁRI

* * *

Noto. La Red. Kom. volonte akceptas koncizajn alparolojn al tiu ĉi interesa artikolo, spegulanta originalajn opiniojn.

Kelkaj hungaraj kantoj

Hej, haj, roz', diant',
rosmareno kaj lekant',
majoran', jasmeno!
Plu ne premus min la trist',
se mi estus ĝardenist'
en via ĝardeno.

*

Mian koron iu ŝtelis for,
kaj mi scias, kiu ŝtelis for.
Vi min ravas, vi min havas,
mi en viaj ĉenoj sklavas,
kara, vi!

Plej aminda, ĉarma ŝtelistin',
priŝtelinte ne forlasu min!
Vi min ravas, vi min havas,
mi en viaj ĉenoj sklavas,
dolĉa, vi!

*

Iras mi, foriras, longavoje, tre for,
palton mi surmetos el la polvo de voj'.
Miaj densaj larmoj sur ĝi la pasament',
la butonoj sur ĝi mia ĝem' kaj lament'.
Blovu, vent', forblovu dikan polvon de voj',
dikan polvon de voj' kune kun la malĝoj'.

*

Ja mi ne kutimas loĝi kaĝon birdan,
sed ja mi kutimas flugi branĉon verdan,
flugi branĉon verdan, manĝi pino-sproson,
manĝi pino-sproson, trinki perlo-roson.

*

Mi ĉevalon ligis al pomarb' ruĝpoma,
mi min mem alligis al viol' burĝona,
Ĉe la lunleviĝo ĝin mi liberigos,
sed min de vi, kara, nur la mort' malligos.

*

Mi adiaŭdiras laste vin, amata,
por naŭ jaroj ligus min la serv' soldata,
sed prefere stepa vagabond' mi estos,
ol ke mi servistu al la imperiestro.

*

Kie mi iradas, ploras eĉ tilioj,
de iliaj branĉoj falas la folioj,
falu, ho folioj, kaŝu korpon mian,
ĉar la amatino amas jam alian.

Sur kuseno sama estus por ni loko,
vivus ni feliĉe eĉ sur nuda roko.
Falu, ho folioj, kaŝu korpon mian,
ĉar la amatino amas jam alian.

*

Brilu sur la ĉiel', brilu, stelo-miloj,
vojon al ĉi junul' montru per la briloj,
Estu gvido de voj' al ĉi juna homo,
por ke de l'amatin' trovu li la domon.

*

Aŭrorstelo hele brilas ĉiele,
mia dolĉa kortrezor' hejmeniras fiere,
lakaj botoj al li sur la piedoj paradas,
kaj l'aŭrora stel' sur ili briladas.

*

La konvalo, la konvalo ekburĝonis en ĝarden',
kiu amas du samtempe, premas tiun la ĉagren'.
Jen mi amas unu sole,
tamen ĝemas senkonsole,
mian koron ekbrulintan estingadas densplore.

*

En ĝardeno, ĉu ne kolombet', belan plantis mi
floron ĉu ne kolombet'.
Tage-nokte, ĉu ne kolombet', surverŝadis mi ploron,
ĉu ne kolombet'.
Malutilis multa plor'
al malforta radiketo de la flor'.
Mi ne fidos de nun, kolombet', la parolon de la kor',
ĉu ne kolombet'.

*

Blovas la vent', amatino mia, kun printempa spiro,
esti rozo en ĝardeno via, jen mia deziro.
Rozo tie mi ne estos,
ĉar la reĝo min arestos,
mi en granda flava urbkazerno velkos de sopiro.

*

Altan pinton, altan pinton havas ja la poplo,
la folioj, la folioj flavas de oktobro,
ankaŭ mi mem, ankaŭ mi mem flavas palkolore,
amatino, blondulino trompis min senkore.

Kara, se ni, kara, se ni nin renkontos foje,
ni eĉ vorton ne dirante iros pretervoje,
mi maldekstren, kaj vi dekstren nian vojon prenos,
vian foton en la stratokoton mi piede premos.

Tradukis *K. KALOCSAY*

EĤO REEĤO

Enrico Mingo, Napoli. *Ni korege dankas viajn plej varmajn gratulojn por nia ,,admirinda laboro'' kaj tiujn de la tuta Napola Esperanto-Grupo ,,Harmonio kaj Progreso'', kies prezidanto vi estas. Vi skribis, ke tre plaĉis al Vi la 1967/2-a n-ro, precipe la artikoloj pri la antikva Savaria kaj pri la poeto Sota Rustaveli. — Je via demando pri la signifo de la vortoj ,,kontraŭado'' kaj ,,kontraŭaĵo'' ni notas: ,,Kontraŭi'' laŭ la SAT-Vortaro signifas: 1, esti kontraŭa al. 2, agi kontraŭ, malhelpi al, bari. 3, kontraŭdiri al. — Do, se ni aldonas ankoraŭ la sufikson — ad, pere de ĝi ni esprimas pli-malpli daŭran agon, ripetiĝon ktp. Jen estas du ekzemploj (same el la SAT-vortaro): Kiom da kontraŭaĵoj kaj ĉagrenoj povus esti evitataj, se en la turismo estus enkondukata internacia lingvo. — Estas multaj kontraŭaĵoj en lia konduto. Do inter la sencoj estas nuanca diferenco. — Ni danke ricevis Vian ,,Ampreĝon'', en kiu troviĝas belaj pensoj kaj por la idealisme, kaj por la materialisme pensantaj* homoj. *Koregajn salutojn al Vi kaj al ĉiuj italaj samideanoj.*

Maria Grünwaldova, Novy Bor, ČSSR. *Pardonon pro la malfruo! Via letero enŝoviĝis en neĝustan tirkeston. Ni ĝojas, ke al vi tre plaĉis la ,,Intervjuo kun kvinjara knabino'' de Marta Nádasdi. Jes, karaj esperantistaj geedzoj, Viaj infanoj certe lernu de Vi Esperanton!*

Alec Ventur, Britio. *Ni korege dankas Vin pro la multflanka helpo kaj subteno. Vi ne nur rekonas la bonan redaktadon de nia revuo, sed ankaŭ helpas ĝin pliboniĝi. Koregan dankon ankaŭ pro la sendo de list(et)oj de pres- kaj aliaj eraroj.*

Erkki Rasku, Kulju, Finnlando. *Vi verkis artikolon por ni pri la ŝtatprezidanto Urho Kekkonen. Ni multe bedaŭras, sed la programo kaj aspekto de nia revuo ne permesas al ni aperigi tiajn artikolojn. Cetere ankaŭ la hungaroj alte taksas la personecon de Urho Kekkonen, ni ĝojas, ke la finna ŝtatprezidanto daŭre sekvas la politikon de la paco. Kiel Vi mem skribis: ,,Dum la senkompata milito kaj kruela teruro en Sud-Orienta Azio kaj en aliaj teritorioj danĝere malpaciĝas, nia norda regiono jam delonge restis ekster tiaj malfacilaĵoj. Ankaŭ ni esperas, ke ,,la vojo de suomoj daŭros plu pace sub la saĝa gvido de Urho Kekkonen por nia komuna feliĉo.''*

Margareta Daems-Fehér Bruxelles. *Vi esprimis la kondolencon al Hungara Vivo okaze de la forpaso de nia Ferenc Szilágyi, ,,kiun vi vidis kelkfoje en Budapest, foje en Svedlando antaŭ multaj jaroj. Ĉiam mi estis kaptita de la ĉarmo, kiu radiis el lia personeco'' — vi konstatis, kaj ni tute konsentas kun vi.*

Ivan Lisiĉnij, Narva, Estonio, *Ĝoje ni legis viajn rekonajn frazojn, el kiuj ni citas: ,,Oni povas diri, ke Hungara Vivo estas preskaŭ la sola fonto, el kiu eksterlandanoj ĉerpas sciigojn pri la vivo kaj kulturo de Hungario. Kaj en ĉiu angulo de la mondo, kie ĉi revuo estas legata, Hungara Vivo havas la same firman kaj grandan aŭtoritaton. Via revuo multe helpas al la esperantistaro kontaktiĝi kun eksterlandaj gesamideanoj.'' Ni estas dankemaj al vi, kaj ni esperas, ke multaj indiferentuloj — ankaŭ en nia propra lando! — trovos inda apogi nian revuon, kaj konvinkiĝos, ke Hungara Vivo devas havi ĉiam pli firman bazon, pli fortan subtenon por la plua evoluado kaj disvastiĝo.*

RECENZO

Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La Esperantan tekston eldonis UEA (en konsultaj rilatoj kun Unesko). Rotterdam. Tiu ĉi Deklaracio subskribita antaŭ 20 jaroj, garantias interalie, ke ,,ĉiuj rajtoj kaj liberecoj validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo laŭ lingvo'', ,,aliflanke oni vidas nenian malpliiĝon de la lingva diskriminacio tra la mondo.'' — konstatis Victor Sadler, redaktoro de ,,Esperanto'' de UEA. ,,. . .multaj estas ankaŭ la homoj, kiuj suferis persekutojn aŭ areston nur pro tio, ke ili uzis la Internacian Lingvon. Tre multaj estas la libroj kaj gazetoj, kiujn konfiskas la cenzuroj de tiu aŭ alia lando, jam nur pro la lingvo. En pluraj landoj ankoraŭ hodiaŭ ne povas ekzisti Esperanto-organizaĵoj, kvankam, laŭ la Universala Deklaracio, ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo.'' ,,La lingva problemo, tamen, laŭ la plej baza senco de la tuta Esperanto-movado, estas unu socia problemo, pri kiu UEA ne povas esti neŭtrala. Toleri la subpremadon de tiu aŭ alia nacia lingvo, eĉ en landoj, kie estas ankoraŭ nenia persekuto kontraŭ Esperanto, signifas akcepti principe ankaŭ la subpremon de Esperanto.'' Ni salutas la decidon de UEA, kiam ĝi elpaŝas kontraŭ la lingvaj diskriminacioj, kontraŭ la persekuto de Esperanto. Ni mem esperas, ke alvenos ankaŭ la tempo, kiam granda plimulto de membroj de UEA kuraĝe protestos kontraŭ ĉiuspecaj subpremoj (Grekio), agresadoj (Vjetnamio), rasopersekutoj (Sud-Afriko). — Do ĉiuj, eĉ la plej grandaj potencoj ne piedtretu la spiriton kaj vortojn de la Universala Deklaracio. (L. K.)

Universala Skribo de Manuel Halvelik estas duflanka skribmetodo, kiu povas esti uzata a) kiel prononcon simboliga sistemo simpla, racia kaj fleksebla; b) kiel internacia regularo normigita por reformi la skribmanieron de ĉiu ajn lingvo, per delikata kompromiso inter la ofte konfliktantaj postuloj de efektiva prononco, facila legeblo kaj gramatika diferencigo. La metodo sekvas la ĝeneralajn liniojn de la Internacia Fonetika Asocio, sed ĝi utiligas ordinarajn literojn (ĉefe latinajn) kaj aranĝas ilin laŭ aŭdoperceptaj kriterioj. 128 p. Aĉetebla ĉe UEA por 30 steloj.

*

Lajos LESZNAI

Dudek horoj

Ferenc Sánta: Dudek horoj — kroniko. Libroeldonejo Corvina. Budapest 1966.

Tiuj ĉi du vortoj estas la titolo de libro, kiun la hungara aŭtoro — Ferenc Sánta — nomas *kroniko*. Tiamaniere la verkisto mem signas, ke la verko ne volas esti romano en la tradicia senco de la vorto.

Jam ĉi tiu fakto pruvas, ke la libro volas esti io nova, moderna, nekutima.

Modernan literaturan verkon krei ne estas malfacile: la temoj estas ne nur antaŭ la aŭtoro, sed same antaŭ la legantoj. Tiuj temoj, kiuj tuŝas la verkiston, estas interesaj eĉ por la plejparto de la legantoj. Sed modernan literaturan verkon krei estas samtempe ege malfacile: la nuntempa leganto ne estas kontenta, se la verkisto nur rakontas la problemojn kaj zorgojn — ĉar li ŝatus trovi helpon por solvi ilin, apogon kaj konsilon; li volas vidi la interrilaton de la problemoj kaj cirkonstancoj, iliajn leĝojn. Ĉar la nuntempa homo travivis kaj travivas tiom da multflankaj historiaj eventoj, ke li rajte povas diri: li sentis sur la propra haŭto la historion pli profunde, ol siaj prauloj, kaj volas ekkoni sian vivon kiel eble plej detale kaj precize.

La verko *Dudek horoj* estas skua legaĵo. Kelkaj — proksimume du dekkvin — personoj rolas en ĝi, inter ili kvin aŭ ses estas la ĉefrolantoj. Sed kio okazas en la libro?

La tuta libro temas pri tio, kiel evoluis la vilaĝo en Hungario, — kie regis antaŭ la dua mondmilito nur mizero kaj turmento por la granda parto de la loĝantoj, — post tio, ke la popolo ricevis la potencon. La tuta libro konvinke montras, ke la posedo de la potenco estas kunligita kun zorgoj kaj penado. Ĉar nun la popolo mem difinas sian propran sorton, kaj ĝi deziras avantaĝon ne nur por si mem kaj ne nur por la estanto, sed ankaŭ por la posteuloj — eble por siaj propraj infanoj kaj nepoj — kaj por longa tempo. Tiu ĉi impona historia eksperimento povas esti sendube interesa por la legantoj.

Unu el la ĉefrolantoj estas Aleksandro Varga. Li faris ĉiun bonon kaj malbonon, kiu okazis en la vilaĝo; en si mem li unuigas la kontraŭdirojn de sia propra epoko. Ĉar la kreo de nova mondo ne progresas irante sur glate tretita vojo. Eraroj kaj obstakloj devas esti venkataj por evolui en ĝusta direkto. La popolo ankoraŭ ne havas multan praktikon en la mondkreado.

La arto de la aŭtoro kaŭzas, ke la eventoj de la verko tuŝas la leganton tiel ofte kaj profunde. La kialo estas klara: nenio koncernas nin tiel proksime, kiel la okazaĵoj de la anoj de nia familio. Kaj la leganto sentas la rolantojn siaj parencoj, siaj familianoj.

Mi jam menciis, kial estas facile verki novan kaj modernan literaturan verkon, kaj tamen kial estas ege malfacile fari ĉi tion. Nun mi devas almeti, ke legi ĉi tiun libron tute ne estas facile, precipe por ne-hungaro. Unu el la ĉefaj kaŭzoj povas esti, ke la rolantoj, la personoj de la libro prenas naturaj multajn aferojn, kiujn la progreso alportis, sed la eksterlandano ne konas ilin.

Sed ĝuste tiu ĉi cirkonstanco kaŭzas, ke la leganto sentas la rolantojn vivantaj personoj, ĝuste tiaj, kiel ili aperas en la reala vivo.

Certe, ke tio kion la verkisto starigas antaŭ la leganton, ne estas fantaziaĵo, sed veraj elementoj de la hodiaŭa vivo.

Ĝuste pro tio ne eblas precize priskribi la eventojn de la verko. Ĝi ja konsistas el mozaikaj eroj de la vivo, en la ordo, kiel ilin individua persono — eble la verkisto mem — renkontis.

La formo de la tuta libro estas, kiel la titolpaĝo mencias, „kroniko", pli ĝuste dirante: serio de riportoj kun diversspecaj homoj de la vilaĝo. Tiuj ĉi interparoloj malkaŝas la eventojn de la jaroj post la dua mondmilito, kiuj transformis la socian ordon de Hungario, kaj samptempe la homojn, iliajn eldirojn, ilian labormetodojn kaj gvidmetodojn, se ili mem gvidas sin.

La stilo de la traduko estas modela. El ĉi tiu vidpunkto estas speciala ĝuo legi la verkon. La leganto sentas, ke la bone elektitaj esprimoj, la vivplenaj frazoj ĝuste tiel sonus en la originala lingvo, kiel en Esperanto. Tiu ĉi fakto mem pruvas la grandan valoron de la libro por nia lingva evoluo.

Povas ja esti, ke la eksterlanda leganto ne komprenas ĉion kion la rolantoj diras. Estus eble praktike en la sekva eldono almeti en formo de epilogo la klarigojn de kelkaj rezultoj, kiujn Hungario atingis post la fino de la lasta mondmilito. Ĉar ili estas ofte menciataj en la paroloj de la rolantoj, per kiuj ili pli aŭ malpli direkte montras karakterizajn ecojn de la nova sociordo, ekz. la divido de la grandbienoj inter la kamparanoj, fondo de kooperativoj bazitaj sur novaj formoj de la socia demokratio de samrajtaj ŝtatanoj. Kun ĉi tiuj vivaperaĵoj estas kunligitaj multaj novaj esprimoj, kiujn la traduko provas sentigi kun la leganto ekz. fakabiturio, MADISZ, koopo ktp. Eble eksterlanda leganto devas iom cerbumadi pri ili, pro tio mi sentas necesa iamaniere klarigi la nove faritajn vortojn.

La tuta *kroniko* estas bona spegulo de la hungara vilaĝo antaŭ 1956. La historia signifo de ĉi tiu socia evoluo povas esti esprimita per la fakto, ke en la antaŭmilita Hungario la vilaĝo estis la tereno de la mizero kaj samtempe de la multspecaj formoj de la superstiĉo, malklereco; la tereno kie mankis la kuracisto ĝuste tiel, kiel la lernejoj kaj instruistoj; kie regis la nescio de skribado kaj legado. En tiu ĉi hungara vilaĝo nun vivas kleraj memkonsciaj homoj, kiuj povas regi sin mem kaj ĉiam pli kaj pli evoluas el ĉi tiu vidpunkto. Interesan klarigon pri la postmilitaj cirkonstancoj de la hungara vilaĝo donas la laŭvorta parto de protokolo, farita dum estrarkunveno de la kooperativo.

Mi esperas, ke la leganto de ĉi tiuj linioj komprenas la malfacilaĵojn de verkado de nova kaj moderna literatura verko, kaj eĉ la obstaklojn de ĝia tuja kompreno. Sed mi petas ĉiun por kompreni, kiel malfacile estas krei novan mondon, novan sociordon. Verŝajne tia socia laboro neniam estis facila, eĉ en la epokoj, kiujn la historiaj lernolibroj kaj historiaj romanoj nomas plej heroaj. La historiaj libroj kaj historiaj romanoj ĝenerale ne parolas pri la ŝvito, pri la turmentoj, pri la zorgoj, kiuj kunestas kun la historia evoluo. Sed ni, la atestantoj, vidis kaj sentis ĉion, la malnovan Hungarion, plenan de sufero kaj mizero en la najbareco de lukso kaj riĉeco de la estroj de la lando; kaj ni vidis la penadon kaj laboron de la popolo por aliformi ĉi tiun maljustan mondon. La rezulto estas antaŭ ni kaj ĝi signifas grandan kaj gravan historian paŝon. Ne estus mirinde, se la vojo de la evoluo, la procezo de ĉi tiu krea laboro interesus multajn ne-hungarojn. Kaj kiun interesas tio, legu la „kronikon" *Dudek horoj*. El ĝi la leganto ekscias ne nur tion, kiel malfacile estas fari novan kaj pozitivan turnon en la historio de mondo, sed ankaŭ tion, ke estas inde labori, penadi, suferi por ĉi tio.

Lajos PUSZTAI

La sporto kaj Esperanto

Pri la interrilato de la sporto kaj Esperanto nur malofte oni povas legi iun artikolon aŭ alparolon en la enlanda aŭ en la eksterlanda gazetaro. En Esperantaj revuoj de tempo al tempo aperas artikoloj pri la taŭgeco de la internacia lingvo, kiel universala lingvo de la interrilatiĝo, sed ne aperis artikoloj pri ĝiaj rilatoj al la sporto. Kvankam estas multo farenda sur tiu ĉi tereno. Kial ne instigas la esperantistoj, ke ilia lingvo estu lingvo de la internaciaj sportaj kontaktoj. De hungara parto jam estis serioza iniciata paŝo. En la ĵurnalo „Népszava" la 30-an de januaro 1966 aperis publika letero de la hungaraj olimpiaj ĉampionoj kaj sportuloj direktita al la Internacia Olimpia Komitato. Iliaj argumentoj estas bazitaj, nerefuteblaj, ĝisfundaj. Ja kiu povus negi, ke „vera sportamikeco inter la multlingvaj kaj multnaciecaj sportuloj dum la internaciaj renkontiĝoj ne povas elformiĝi pro manko de lingvo, kiun ĉiu povas kompreni kaj paroli." Tion montras ankaŭ la instruaĵoj de la olimpiaj ludoj. Kvankam ĝuste unu el la ĉefaj celoj de la olimpiaj sportrenkontiĝoj kaj la plej nobla enhavo de la olimpia ideo estas tio, ke ĝi profundigu la pacan sportamikecon inter la sportuloj de la mondo, apartenantaj al ĉiu nacio, al ĉiu raso. Bedaŭrinde la „serioza" propono de la publika letero, ke en la internaciaj sportrenkontiĝoj oni uzu Esperanton, kiel interkonsentitan, oficialan lingvon, ĝis nun ne havis rezulton. La alvoko dronis en la arkivo de la kompetenta internacia organizaĵo.

Tiu ĉi jaro denove estis, resp. estos jaro de du grandaj sportkonkursoj (Grenoble kaj Meksiko) de la olimpiaj ludoj. Denove montriĝas la grandega malavantaĝo de la multlingveco, de la babela konfuzo. La plimulto de la konkursantoj sen interpretisto apenaŭ povis diri kelkajn vortojn, ŝablonajn frazojn unu al la alia. Sed interpretiston, tian akompananton, kiu kapablas interpreti paroladon en tri-kvar, eĉ en pli multe da lingvoj, oni ne povis disponigi apud ĉiun konkursanton. Eĉ trovis malfacilaĵojn ankaŭ la informado de la gazetaro, de la ĵurnalistoj kaj — ankaŭ kio ne estas akcesora afero — tio pretendis seriozajn kostojn. Sed eĉ tiel ĝi estis malkompleta. Interesa kaj instrua artikolo aperis kun la subtitolo „Lingva kaoso en Grenoble" en la ĉi-jara aprila numero de Germana Esperanto-Revuo. La verkinto de la artikolo, d-ro Herrmann ekdiskutis pri tiu rimarko de germana sport-raportisto, ke la germana lingvo havas ŝancojn en la internaciaj sportrenkontiĝoj, ĉar ekzemple ankaŭ en Grenoble 360 personoj aŭskultis la germanlingvajn informadojn. Tial li proponis, ke por venki la malfacilaĵojn de la lingvolernado oni faru simpligon de la lingvo. Sed la artikolinto tre klare pruvis la neireblecon de tiu ĉi vojo. Ĉar vane ni kreus simpligitan, facile lerneblan kaj kompreneblan, tiel nomatan reformlingvon, oni atingus la samon, kiel la angloj per „Basic English", nu, ke la reformlingvanoj ne komprenus tiujn, kiuj parolas la originalan ligvon, la „Volldeutsch". Por plej konvena solvo pri la flego de internaciaj interrilatoj li trovas la internacian lingvon, Esperanton. Estas evidente — li konstatis — ke ĝin oni povas lerni dekoble pli facile ol la germanan.

Al la instruaĵo de Grenoble ni povas ankoraŭ aldoni, ke vane okazis la informado de la gazetaro en kvar mondlingvoj, angle, france, germane kaj ruse, la sento pri mankhavo restis en la rondo de la alilingvanoj, ekzemple ĉe la hispanoj, en la rondo de la raportistoj de la nordaj kaj sudaj ŝtatoj. Do kion oni devas fari? Multaj iloj kaj vojoj estas eblaj por tio, ke la esperantistaro, sed ankaŭ la pli vasta internacia publika opinio instigu la internacian olimpian komitaton por fari almenaŭ la unuan paŝon. Jen ekzemplo: en aprilo de ĉi tiu jaro pro indigniĝo de la publika opinio de ĉefe Afrikaj, sed ankaŭ de multaj aliaj landoj, en la afero de la partopreno en la olimpiaj ludoj de Sudafrika Respubliko, kiu aplikas rasan diskriminacion, oni voĉdonigis la membrojn de la Internacia Olimpia Komitato, kaj en demokrata maniero naskiĝis decido de plimulto, kiu de Sudafrika Respubliko revokis la rajton de partopreno en la olimpiaj ludoj. Kial oni ne povus en tia demokrata maniero voĉdonigi por decido ankaŭ la utilan proponon faritan pri aplikado de Esperanto?

Ne estas dube, ke Esperanto, la lingvo, kiun pluraj milionoj da homoj parolas kaj uzas ekde jardekoj, pro ĝia facileco estas la plej konvena lingvo de la ĝenerala internacia kontaktiĝo. Sed je tio, ke samtempe ĝi estu ankaŭ internacia lingvo de la sporto, necesas ankoraŭ ĝia faka evoluigo. Antaŭ ĉio oni devas eldoni esperantlingvan sportvortaron, kiu enhavas la vortojn de diversaj sportiloj, fintoj, metodoj kaj ĉiuspecaj fakideoj por ĉiuj sportbranĉoj. Laŭ mia scio nun jam prepariĝas en Budapeŝto tia vortaro, sed — mi opinias tiel — por tio, ke ĝi vere estu publike utila, estas necese, ke ĝi estu konvena al la zamenhofa fundamento de la lingvo, sed ĝi priatentu la jam internacie konatajn kaj kutimajn sportkonceptojn. Kial ne pretiĝis jam pli frue Esperanta sportvortaro, ties kaŭzon ni povas klarigi ekzemple per tio, kion skribis iu aŭskultanto de Radio Budapest. Laŭ li la esperantistoj ĝenerale apartenas al la pli aĝaj generacioj, aliparte la esperantlingvaj revuoj rilate al la tempopunkto de la okazintaĵoj aperas sufiĉe malfrue, tial la sportkomunikaĵoj en la tempopunkto de la apero jam perdis sian aktualecon. Kvankam sportartikoloj de tempo al tempo aperantaj en certaj Esperanto-revuoj, ekzemple en Hungara Fervojista Mondo, meritas rekonon, ili ne sufiĉas.

La plej freŝa gazeto estas la radio. Sed el inter la radiostacioj, kiuj dissendas esperantlingvan programon — ne konsiderante la okazajn sportinformadojn de la Varsovia radio —, nur Radio Budapest dissendas sportraporton ĉiulunde sisteme elsenditan. Ja estas vere, ke la reagado al tiuj nun ankoraŭ estas malmulta, tamen priatentinda, ĉar oni rekonas ties utilecon, oni opinias ilin interesaj, instru-karakteraj, freŝaj. Kaj koncerne tiun konstaton, ke la esperantistoj plej multe estas pliaĝuloj, tio ne estas kaŭzo por eklipsi la internacian lingvon en la sporto, ĉar la lingvo tiel estos pli vigla, tiel ĝi pli disvastiĝos, se ĝin ekŝatos ankaŭ la sportamanta junularo kaj rekonos ĝian utilecon.

Sándor TATAY:

La memorlibro

Antaŭ kelkaj jaroj mia filineto ricevis belan memorlibron je kristnaska donaco. La donacinto diris al la knabino, ke ŝi petu enskribon de ĉiuj konatoj, al kiuj ŝin ligas amikeco aŭ kara memoro. La donacinto enskribis sur la unua paĝo: „Tiu ĉi libreto estu la libro de la amikeco kaj amo."

De tiam ni gardas la ruĝkovrilan, kuprobukan libreton en nia domo en Badacsony (ĉe lago Balaton). Kaj se alvenas ŝatata gasto, mia filineto baldaŭ alportas la libreton. Tiel la eta libro ŝanĝiĝis je gastolibro, sed ĝi restis fidela al sia titola devizo. Nur la senco de la vortoj plilarĝiĝis. Do la libreto fariĝis vere la libro de la interpopola amikeco. Ĉar eksterlandano, kiu vizitas Hungarujon, venas ankaŭ al Badacsony. Kaj se la gasto estas verkisto aŭ artisto, tiam li malofte evitas nian domon — je nia granda ĝojo. La akompanantoj ĉiam kondukas la gaston al mi, por trinki kelkajn glasojn da vino sur la verando. De tie vidiĝas antaŭ ni belega pejzaĝo, kiun la okuloj povas kapti per ununura ekrigardo de Tihany ĝis la urbo Keszthely.

Foliumante la libreton mi komprenas malmulte el la fremdlingvaj tekstoj. Sed ĉiu paĝo konservas memoron pri iu longa konversacio. Longaj kaj intimaj estis tiuj sinceraj interparoladoj, kiujn ebligis la loko kaj la ŝaŭmanta vino. Mi sentas plej kara la memoron de tiuj babiladoj. Mi renkontiĝis tie kun popoloj, kiujn disigis de mi dum kvardek jaroj perforte ĉarpentitaj baroj. Kvazaŭ oni malfermus fenestrojn de ĉambro plenigita de sufoka aero, mi spertis mire, ke la historio nin knedis tre similaj al tiuj aliaj popoloj. Niaj ĝojoj, malĝojoj, zorgoj, esperoj estas kvazaŭ la samaj. Niaj virtoj kaj kulpoj estas similaj. La gestoj de niaj manoj, eĉ niaj palpebrumoj estas la samaj. Kiel valora malkovraĵo estas ĉi tio por romanverkisto!

Delonge premadis min la penso, ke la malgrandeco de nia lando kaj la malmultnombro de nia popolo estas la netranspaŝebla baro de naskiĝo de la grandioza hungara romano. Ĉar nia literaturo koncerne poemojn kaj novelojn egalvaloras kun tiu de la plej grandaj nacioj, eĉ se pro nia lingva izoliteco tio ne evidentiĝis en la mondo. Ni havis ankaŭ grandajn romanistojn: Jókai, Mikszáth, Móricz estas sendube tre signifaj eĉ laŭ mondliteraturaj rilatoj kaj en ĉiuj tendencoj de la mondliteraturo ni povas fieri pri grandiozaj eksperimentoj. Sed tiuj ĉi verkoj apenaŭ estas kompareblaj al la angla, franca, rusa grandmezuraj epikaj verkaroj. Naskiĝis grandaj hungaraj prozistoj, tamen mankas la grandaj hungaraj romanverkaĵoj. Ni estas kapablaj montri la sekretojn de la oceanoj en akvero, tion ni ja konas, sed navigadi sekure sur senlimaj akvoj — tio eble ne estas donita al ni. „Guteto de akvo el la granda oceano." Tiel ni povas glorigi la romanojn ankaŭ de nia eminenta verkisto Móricz. Nemalmulte da gloro apartenas al li, sed kiujn entuziasmigas la ekzemploj de Balzac, Dickens, Tolstoj — tiuj ne ĉesas serĉi la vojon al la vasta oceano.

Foliumante tiun ĉi ruĝkovrilan libron mi sentas, ke nun alvenis la tempo erupti en la pli vastan mondon. Ne nur miaj verkisto-gastoj el la najbaraj landoj vizitadis la monton Badacsony. Miloj da ekskursantoj kaj turistoj svarmadas somere tie sur la monto, kiuj alvenadis el la frataj, amikaj landoj. El ili mi alparolas ĉiun, al kiu mi trovas komunan lingvon. Nun mi jam scias precize, kiom da similaj kutimoj ni havas kaj kiel sensignifaj aĵoj apartigas nin unu de la alia. Se mi skribas romanon pri homo en Budapeŝto, tio same validas por la homo en Varsovio, por tiu en Bukareŝto. Sep-ok ĉefurboj tie ĉi estas tiel proksime unu al la alia, kiel la frat-urboj de grandaj landoj. Sed pli riĉenhava, pli homeca estos la kreaĵo de la verkisto, se li uniformigas la loĝantojn de tiom da urboj, se lin inspiras en la figurado de la homoj la kono de la popoloj de kvin-ses grandurboj. Ankoraŭ mi ne scias, kiel, nur mi konjektas, ke la agadsfero de la hungara verkisto postulas, ke la konoj de la verkisto pri la homoj kaj popoloj devas etendiĝi ĝis la bordoj de malproksimaj maroj.

Ĉu tio estas konkero? Certe ĝi estas konkero en pleja pleno kaj ĝi estas pli eterna, ol imperio akirita per glavo.

Estas ankoraŭ demando, kiom la verkisto povas kapti laŭ siaj kapabloj el tiu materio. Tamen sendube tiu ĉi vojo kondukas al grandaj epikaj verkoj ĉu nin, ĉu alinaciajn kolegojn. Ni nepre devas profiti ĉi eblon, ĉar fine ja estas je nia dispono la konvena historia atmosfero.

Mi kredas, ke tiu ĉi ruĝkovrila, kuprobuka libreto enhavos de jaro al jaro pli kaj pli multe da por mi karaj enskriboj faritaj per diverskoloraj inkoj de fontplumoj kunportitaj el foraj regionoj. Mi kredas, ke ĉiujare multobliĝos la nombro de tiuj, kiuj alvenas el aliaj landoj, por ekkoni nian patrujon kaj ĝiajn plej belajn partojn, priparoli niajn komunajn problemojn. Mi scias, ke ĉiam pli kaj pli da hungaroj vojaĝos eksterlanden por redoni tiujn vizitojn. Niaj verkistoj kaj artistoj devas tiel cirkuladi inter la samsortaj popoloj, kvazaŭ ili iradus en unu patrolando. Tiam la tempo baldaŭ elektos la grandajn kreantojn kaj naskos la eminentaj verkojn.

„Estu tiu ĉi libreto la libro de la amikeco kaj de la amo"! — mi legadas sur la dika unua paĝo de la orbrodita memorlibro. Sinceraj vortoj de simpla virino gravuris tion en la memoron de knabineto.

El la hungara: *K. D. Gyulai*

Imre SZENES

KIUJ DUAFOJE VENAS EN LA MONDON...

En Hungarlando multaj senfilaj geedzoj deziras adopti sućinfanon. Sed — malgraŭ ilia individua ĉagreno kaj je nia socia feliĉo, — ĉe ni ne troviĝas tiom da eksteredziĝe naskiĝintaj aŭ forlasitaj infanetoj, kiom la senfilaj geedzoj deziras adopti. Sed kiuj tamen ĉi-maniere ricevas novajn gepatrojn, kvazaŭ duafoje venus en la mondon . . .

Elegantaj geedzoj vizitis kune kun sia kvinjara filineto la ĉefurban Infan- kaj Junularprotektan Instituton. Ili prezentis sin al la sekciestro d-ro Mátyás Dickmann, poste la 25—30-jara oficistino kaj ŝia edzo-inĝeniero jam komencis rakonti la celon de sia alveno. Sed ilia filineto Ági babile antaŭis ilin:

— Oĉjo, ni venis por frateto . . .

Ĉi tiu ridiga, neatendita sinanonco faciligis la pluan paroladon de la ŝika, blonda-bruna patrino. Antaŭe ili konfidis la infanon al iu vartistino, por ke ŝi ne ĝenu la zorgojn de la plenkreskuloj. Intertempe evidentiĝis, ke d-ro Dickmann kaj la geedzoj jam konas unu la alian, ĉar ja antaŭ kvar kaj duono de jaroj same ĉi tie okazis la oficiala adopta ceremonio de Ági. La edzino pro sia antaŭa malsano ne povas naski, kaj ili nun ŝatus adopti ankaŭ alian sućinfanon, kiu similas al Ági.

— Volonte ni helpas — respondis la sekciestro —, sed en nia lando la adoptebla sućinfano estas la plej ofta „mankaĵo" . . .

— Do, tion ni spertis, sed ni jam multfoje estis en kelkaj infanvartejoj, kaj tre malfacile, fine ni trovis konvenan fratineton. Nun, do ni nur devas jure aranĝi ŝian sorton, poste ni tuj kunportos ŝin per nia aŭto al nia nova, provinca hejmo . . .

La edzo elprenis dokumentojn de la „novnaskito", kaj tiel la oficiala parto aranĝiĝis. Intertempe la patrino prenis el sia retikulo la fotojn de Ági, kaj tiom entuziasme fabelis pri ŝi, kiel ĝenerale la patrinoj pri siaj infanetoj . . .

— Eble vi rememoras — ŝi daŭrigis —, kiam mi „naskis" ŝin, ni translokiĝis al tiu nova provinca fabriko, kie mia edzo ricevis inĝenieran postenon kaj loĝejon. Tial neniu scias tie, ke Ági estis adoptita. Je nia feliĉo, oni translokigis nin denove en alian fabrikon. Kaj en tiu tempo, kiam elformiĝis niaj novaj amikaj rilatoj, kaj Ági jam kreskadis, — niaj gastoj ofte malkaŝis al ni similajn trajtojn, kiujn eĉ ni ne rimarkis . . .

— Ekzemple iu el miaj kolegoj okaze de sia vizito komencis ŝercadi kun Ági — daŭrigis la edzo — kaj poste atentigis mian edzinon: „Rigardu nur al via filino, nun same tia bubaĵo speguliĝas de sur ŝia vizaĝo, kiel de ŝia patro, kiam li blagas iun . . ."

— Kaj mia bofratino —, kiu scias pri la adopto, iafoje inter kvar okuloj, ŝerce-serioze demandis min: „Diru, ĉu ne vi naskis vian Ági antaŭ via edziniĝo? Ĉar ŝiaj paŝoj same balanciĝas, kaj ŝiaj grandaj okuloj same miras, kiel la viaj." Mi ekĝojis pro ŝia supozo tiel, ke mi tuj rakontis tion al mia parulo. Li ĝojante, tuj kaptis kaj kisis min . . .

— Jes — aldonis ŝia edzo —, ĉar ĉio pruvas la samon, ke Ági estas jam vere el nia korpo, animo kaj sango . . . Kaj mi sentas ke same okazos ankaŭ al nia „novnaskito" . . .

Ĉi tie, en la Instituto oni rememoras ankaŭ pri iu alia interesa familio. La edzo kaj edzino estas sciencaj esploristoj, kaj ili jam havas tri proprajn filojn. La plej aĝa tiam estis unuaklasa lernanto en la elementa lernejo. Ilia patrino post la nasko de sia plej juna filo jam ne plu povis naski, kvankam ili volus ankoraŭ du filinojn. Pro tio ili elcerbumis ĉarman fabelon pri la kaŭzo de „foresto" de ilia fratineto Éva. La enhavo de tiu estis, ke pro sia sanstato ŝi devis vivi en bonaera montara regiono ĉe alia familio, kaj la kuracisto nur nun permesis al ŝia veni hejmen. La saman ili diris laŭ kredebla formo ankaŭ al siaj konatoj.

Post unu kaj duono de jaroj la vartistino de la Instituto hazarde renkontiĝis kun la patrino de kvar infanoj, kiu rakontis kelkajn epizodojn pri tio, kiamaniere Éva alkonformiĝis en la eminentan familion.

— Nia filineto estas ĉies favorato. Kaj ŝiaj fratetoj amas ŝin tiom, se iu el inter la tri fratoj tamen interkverelas kun ŝi — la du aliaj ĉiam defendas sian fratineton. Sur la ludplaco ĉiam ili staras ĉe ŝi kiel gardistoj, se iu hazarde diras malagrableĵon . . .

— Cetere, nia pli aĝa filo, se li skribas sian hejmlecionon, aŭ desegnadas, movadas sian langeton ĉiam en tiun direkton, kien la krajonon. Estas interese, ke tio estis infanaĝa kutimo ankaŭ de mia edzo, sed ĉe niaj aliaj filoj ni ne spertas tion. Nu, kiam ankaŭ Éva komencis desegni kun kolorkrajonoj, — kion ŝi tre ŝatas — je nia surprizo, ankaŭ ŝi sekvis la kutimon de sia frato . . .

— Kun la filoj kelkfoje mi devas interdiskuti pro iliaj maloftaj miskondutoj, bubaĵoj. Tion Éva same transprenis de mi, kaj kiel tiaspeca infana „pairneto", helpas kutimigi la knabojn al ordo, devigi ilin al etaj domaj laboraĵoj, en kiuj nia filino jam estas kompetentulo. Cetere, ili multfoje aranĝas grandajn petolaĵojn, kvazaŭ ankaŭ Éva estus samdevena frateto . . .

Kun tre maloftaj ekscitoj miksiĝis la adopta intenco de iu laboristino en apudurbo de Budapeŝto. Ili loĝas en ĝardena familia domo, sed pro la tre atendita infano ili ne volis ŝanĝi sian konvenan hejmon, kiel tion faras multaj adoptantoj. Do tiu ĉi virino, per la asistado de la distrikta kuracisto, antaŭ la laboreja kaj hejma medio ŝajnigis sian gravedecon. Intertempe, iu hejmo de la ŝtataj vartitoj, — laŭ ŝia komisio, — interkonsentis kun iu provinca knabinpatrino,

ke semajnon post la nasko de ŝia filo, ili tuj adoptos ŝian filon. Ĉi-maniere la apudurba virino povis formi ankaŭ la hospitalajn cirkonstancojn tiel, kvazaŭ ŝi vere naskus. Kvankam tiu ĉi artefarita gravedeco enhavis multajn ekscitiĝojn, sed finfine ĉio reordiĝis. La du virinoj, kiuj tute ne konis unu la alian, ,,komune naskis'' bonstaturan knabeton . . .

— Tio estis tre malfacila nasko . . . — diris poste la patrino ŝerce al d-ro Dickmann, kiu rimarkigis: Vi pravegas, sed ĝi meritis la penadon.

— Jes, kaj vi estas nia vera helpanto — dankadis al li la edzo, ĉar ankaŭ li havis rolon en la preparado de la kurioza adopto.

Nun, antaŭ festotago tiu ĉi laborista familio vizitis la Instituton, kaj ili prezentis al d-ro Dickmann la baldaŭ trijaran bonstaturan Paŭleton. Tiam malkaŝiĝis, ke la knabeto pasintjare malsaniĝis tiom, ke por lia vivo estis bezonata operacieto kaj transfuzo. Kvankam la infana sekcio de la hospitalo disponis la bezonatan sangon por la operacio, tamen la patro per subita decido petis la kuracistojn, ke ili tuj esploru lian propran sangon, eble ankaŭ tiu estas konvena, kaj tiam li sola certigas la tutan transfuzon. Baldaŭ evidentiĝis, ke lia sangogrupo ne estas konvena. Tiam la patrino petis ĉe si mem la saman esploron. Kaj je ilia ĝojo ŝi havis la saman sangogrupon.

— Do ni rajtas diri — rakontis ili kortuŝe al la kuracisto, ke nia Paŭleto nun jam en ĉiu rilato devenas el nia sango . . .

Ja multaj spertoj dokumentas, ke la granda plimulto de la adoptoj, ankaŭ sen sangodono — estas vera transfuzo, eĉ pli multe: la transdono de la animo homa naturo de la novaj gepatroj.

El la hungara: *Zoltán ILLÉSSY*

PRI LA TEATRA VIVO EN BUDAPEŜTO

Kiam mi rememoras pri la 1967/68-jara teatra sezono de Budapeŝto, multaj rigarditaj, aŭditaj aŭ legitaj dramoj, operoj kaj ankaŭ iliaj kritikoj pasas-kuras tra mia cerbo kaose. Mi sentas, ke tio estas iuspeca ,,embaraso de riĉeco''. Kaj se mi skribas por Hungara Vivo ion pri nia teatra vivo, — mi faras tion esperante, ke efektiviĝos la propono de nia Kolomano Kalocsay, ke Hungara Vivo en ĉiu numero havu artikolon pri la gravaj okazaĵoj kaj sukcesoj de la hungara teatroarto, kaj ĝi prezentu ankaŭ en bildoj niajn eminentajn aktorojn. Bonvolu konsideri jenan modestan artikolon enkonduko al la menciita temo.

Sincere mi konfesas, ke mi volonte pasigus ĉiun mian vesperon en teatro aŭ en koncertejo. Tamen tiujn vantajn sopirojn mi devas flankenmeti eĉ tiam se tuj apud mia loĝodomo staras la moderna konstruaĵo de la Teatro Madách, kiun la membroj de nia Esperanto Mondkongreso en Budapeŝto bone konas, ja en 1966 ĉi tie oni aranĝis la plej multajn Esperantajn teatraĵojn.

La teatroj de la hungara ĉefurbo konstruiĝis en diversaj stiloj. Novrenesancan stilon prezentas en Budapeŝto la Operdomo, konstruita en 1874, tamen sekve de la kontinua modernigo, nia Operdomo ankaŭ hodiaŭ plenumas ĉiujn artajn-scenejajn postulojn.

La hungara ŝtato kaj nia ĉefurbo elspezas multe da mono por konstruo kaj rekonstruo de la teatroj. La konstruaĵo de la Ĉefurba Opereto-Teatro — kie en 1966 same okazis Esperantlingvaj prezentadoj — estas en stato de rekonstruo. Kaj la plej malnova teatro de la ĉefurbo, la Nacia Teatro, fondita en 1837, ankaŭ nuntempe funkcias en provizora ejo, kvankam en moderna teatra konstruaĵo. La palaco de la Nacia Teatro staros definitive sur la okcidenta rando de la Urba parko.

Ni diru kelkajn frazojn pri la Operdomo. La nuntempo de la Hungara Ŝtata Operdomo estas inda al la brila pasinto. Sub la nomo Operdomo en niaj tempoj rolas du teatroj: la malnova Operdomo sur la Avenuo Népköztársaság (Popolrespubliko) kaj la tre ampleksa Teatro Erkel sur la Placo Köztársaság (Respubliko). Tiuj ĉi du teatroj prezentas jare 560 operojn kaj ilia komuna ensemblo nombras 1300 membrojn (kune kun la teknika personaro). La hodiaŭaj membroj de la Ŝtata Operdomo, simile al la eminentaj antaŭuloj, estas bone konataj en la mondo. Mihály Székely — mortinta antaŭ kelkaj jaroj — estis same hejme sur la scenejo de Metropolitan de New York, kiel sur la podioj de Budapeŝto. La nuntempa gvidanta kapelestro de la Operdomo, János Ferencsik estas unu el la plej konataj dirigentoj de Eŭropo. Adél Orosz, Zsuzsa Kun, Viktor Róna per sia baletarto mirigis en la pasintaj jaroj la publikon de Londono, Parizo, Vieno kaj Moskvo. Krom la individuaj gastroladoj ankaŭ la kompleta ensemblo faras sukcesan turneon en preskaŭ ĉiu sezono. Por mencii nur la plej gravajn: en 1962 ili gastludis en Finnlando, en 1963 en la Festivalo de Edinburgh. En 1964 ili vojaĝis al Kairo, en 1965 sekvis Stokholmo kaj Monte Carlo, pasintjare ili prezentis en la Vienaj Festaj Ludoj la operon de Sándor Szokolay ,,Vérnász'' (Sangonupto).

El la dramoj prezentitaj en la Nacia Teatro dum la pasinta sezono mi mencias unue la draman poemon de Imre Madách ,,Mózes'' (Moseo). La ĉefan verkon de Madách ,,La Tragedio de l' Homo'' bone konas la civilizita mondo. Tiu ĉi dramo estas unu el la plej eminentaj verkoj ankaŭ en la Esperanta literaturo. Sed nur la hungaraj literaturistoj sciis, ke krom la Tragedio Madách havas ankaŭ aliajn memorindajn verkojn. En la dramo ,,Mózes'' eksonas la letargio de Madách pro falo de la hungara libermilito, la kredo je eblo de la refoja komenco kaj la fido je tio, ke la homoj disfalintaj al individuoj estas formeblaj al nacio. Cetere ankaŭ la Tragedio estas konstanta repertuara dramo de la Nacia Teatro.

La historio de la hungara nacio estas konstanta fonto de la dramverkado. La opero de Erkel ,,Hunyadi László'' estas ofte prezentita teatraĵo. Ankaŭ nia eminenta poeto Mihály Vörösmarty (1800—1855) okupis sin pri tiu ĉi tragika historio, — sed li postlasis nur fragmentojn. Nun pretiĝis nova dramo ,,Hunyadi kaj la Czillei-oj''. Ladislao Hunyadi — filo de la gubernatoro kaj la pliaĝa frato de la postea reĝo Matiaso, la justa, estis inside ekzekutita fare de magnato Czillei. La mezepoka historio de

la familio Hunyadi ĉiam altiras spektantojn en la teatrojn.

Elstara prezento de la Nacia Teatro estis krome la tragedio de László Gyurkó „Mia amo, Elektra" — originala tralaboro sur la bazo de la Sophokles-a tragedio.

La direktoro de la Nacia Teatro konstatis en sia intervjuo ke „la 1967/68-jaran sezonon karakterizis pli konscia kunmeto de la programo, pli altnivela aktora laborado kaj pliiĝinta kunfandiĝo." Kompreneble, ankaŭ alilandaj aŭtoroj kontribuis al la sukceso de tiu ĉi teatro. Shakespeare, Shaw, Brecht, Arthur Miller ankaŭ en la pasinta jaro estis prezentitaj. Jes, ankaŭ la ĉeĥoslovaka dramverkisto Franz Kaffka, kies romano „Ameriko" montras al ni la sorton de homo perdiĝinta inter malhomecaj cirkonstancoj.

Nun ni parolu pri la Teatro Madách. Ĝia elstara dramo estis la „Favorato" de Gyula Illyés, unu el niaj eminentaj poetoj kaj dramverkistoj. Illyés skribis sub la titolon de sia dramo: „Laŭ spuro de ideoj de László Teleki". Tiu ĉi politikisto-verkisto mortis antaŭ cent jaroj. Teleki en sia dramo — en vestaĵo de romi-epoka historio — analizas la ecojn kaj manifestiĝojn de la tiranismo kaj atakas ĝin. Sed — kiel la kritikisto Ervin Pamlényi konstatis: „La dramo de Teleki havas formaton de Shakespeare, sed malhavas la lingvan forton, riĉon kaj scenejotenikan genion de Shakespeare." Illyés — studinte la dramon de Teleki — baldaŭ konvinkiĝis, ke la simpla modernigo de la lingvo ne utilus. Finfine li reverkis la tragedion, kiu nur per siaj titolo, rolantoj kaj kelkaj motivoj rememorigas la verkon de Teleki. La publiko akceptis kun kompreno kaj plaĉo tiun ĉi majstraĵon de Illyés.

Nun ni citas el artikolo de András Rajk: „La vera drama ekprospero, la plenvalora drama efekto kompreneble postulas originalajn verkojn. Kaj en tiu rilato ni jam forte progresis. Oni ne povas sufiĉe emfazi la utilecon de la „Studio Thalia" en Budapeŝto, kiu en tiu ĉi jaro metis sur la scenejon verkojn de tri talentaj junaj aŭtoroj.

Ankaŭ la mondfamaj klasikuloj de la teatroarto, kiel ekz. Molière estas objektoj de profunda analizado, eksperimentado kaj modernigo. La 9-an de Majo la Teatro „Katona József" prezentis la komedion Tartuffe — sed en tute nova koncepto. Pasis la unua akto, kiam la publiko komprenis kaj akceptis kun rido tiun ĉi veran Molière. Multaj homoj spirretene atendis, ke fine iu sur la scenejo falu surventren aŭ ricevu fortegan vangofrapon. Sed tio ne okazis. Ja ĉiu povis vidi, ke s-ro Tartuffe ne estas monstro, ne estas abomeninda besto aŭ inkvizitoro, sed li estas normala naskito de ia monstra epoko. Kiel nia jurnalo „Népszabadság" konstatis: „Fariĝis klara, ke la karakteroj kaj situacioj de Molière ne eksmodiĝis, sed ili estas pli modernaj, ol iam ajn ili estis, kaj pli modernaj, ol multaj scenejaj kunmetaĵoj ŝajnigantaj la modernecon."

Estas evidente, ke ĉiu teatro fidele deziras servi al la literaturo, tamen la plej intiman rilaton havas kun ĝi la Literatura Scenejo, kiu prezentas la plej diversajn, sed ĉiam valorajn kaj interesajn verkojn ekde la klasikuloj ĝis la plej modernaj aŭtoroj. Havis varman sukceson la vespero, sub la parolanta titolo: „Sporto, humuro, poezio."

Kaj ĉu ni silentu pri la ĉarma Pupteatro? Ja ankaŭ ĝiaj aktoroj rolis dum la 1966-a Mondkongreso, kaj kelkaj el ili meritis la nomon de esperantisto. Ĝoje mi legis en la raporto de la teatro, ke la 1967/68-a jaro ankaŭ materiale

Prezento de la opero Aida en la Budapeŝta Operdomo

estis la plej rezultoplena. La Pupteatro instruas niajn infanojn, plenumas kulturlaboron en la vilaĝoj, kaj donacas sian arton kaj humuron ankaŭ por la plenaĝuloj. Kaj ni informiĝis ankaŭ pri tio, ke laŭ hungara iniciato la internaciaj kontaktoj de la pupteatroj plifortiĝas ĝuste pere de Esperanto.

Ni eĉ ne menciis ĝis nun la Gajan Teatron, la Teatron József Attila, la „kamero"-teatrojn, la kabaredojn, la interesan Mikroskop-scenejon kaj aliajn, kiuj ĉiuj havas specialan ĉarmon, destinon, kulturan valoron. Sed pri ili estu parolo en aliaj artikoloj.

La konsilantara kunsido de la Budapeŝta magistrato fine de Aprilo okupis sin pri la agado de la ĉefurbaj kinejoj kaj teatroj. La vizitado de la kinejoj konekse kun la konkero de la televido treege malkreskis, sed la interesiĝo por la teatroj restis senŝanĝa. En 1967 la 18 ĉefurbaj teatroj havis entute 3.6 milionojn da spektantoj.

Oni konstatis ankaŭ tion, ke plej grandan popularecon rikoltis la tragedio de Shakespeare: Hamleto, la drama poemo de Madách: La Tragedio de l' Homo kaj la opereto de Imre Kálmán: Ĉardaŝprincino.

Ni bone scias, ke en nia socio la riĉiĝo en spiritaj havaĵoj estas nedisigebla de la klopodoj: kreskigi ankaŭ la materialan bonstaton. Ankaŭ la artoj fidele helpas ekkoni la problemojn kaj konfliktojn kaj kunlaboras levi la moralon kaj konscion. Ankaŭ la arta ĝuo en la teatro estas fortofonto, kiu instigas la homojn al ĉiuspeca utila laboro.

La hungaraj aktoroj neniam estis pli respektataj kaj ŝatataj, ol en nia socio. Tiu ĉi popularecо tute koincidas kun la intencoj de nia socialisma kulturpolitiko.

Márta Nádasdi

Inĝ. Jenő Csongrádi:

NOVA HIDROMEKANIKA INVENTAĴO

Hidropneŭmatika dragmaŝino

La elminigo de malkompakta sedimentaĵo el sub la akvo, krome estigo de lagoj kaj navigeblaj aŭ irigaciaj kanaloj, pliampleksigado kaj dragado de havenoj, ĉiuj ĉi estas gravaj taskoj kaj por la industribranĉoj produktantaj krudmaterialon kaj por la afero de la transportado kaj trafiko.

Ĉe similkarakteraj laboroj la tradiciaj iloj, ekipaĵoj (dragmaŝinoj kun dragĉeno provizita per diverstipaj ujoj) kaj teknologiaj procedoj, kiuj estis uzataj ĝis la proksima pasinteco, certigis la eblecon de dragado en plejparte nur 8—10 metra, malofte en 15 metra profundeco. Estas esceptoj la aparatoj de Mohr, kiuj estas uzeblaj en pli granda profundeco, sed kun la kresko de la profundeco proporcie malkreskas ilia plenumo, kaj krome ili refaligas konsiderindan kvanton de tiu parto de la materio, kiu havas etan grajno-kalibron.

La mempezo de ĉi tiuj aparatoj estas ĝenerale inter 200—1000 tunoj, kaj ankaŭ la investokostoj proporcie al la nominalpovumo estas altaj. Ilia komuna karaktero estas krome, ke la turniĝantaj maŝinpartoj dronigitaj en la elmenigendan materialon forte erodiĝas. Ĉi tio ofte kaŭzas funkci-perturbon, malhelpante la kontinuan produktadon. Granda malavantaĝo estas ankaŭ tio, ke la elminigo sur pli granda teritorio, en pli longa strio estas realigebla pli-malpli bone nur pere de konstanta, kontinua lokŝanĝado.

La hidropneŭmatika elminigo de la gruzo kaj ŝtonero okazas per vertikala tub-aparato mergita en la sedimentan, ne-konglomeratan materialon. Ĉe la suba — fundoflanka — ekstremo de la aparato troviĝas t. n. laborkapo. La elminigan procedon kaj la laborkapon mem prezentas skize la bildo n-ro 1. La startigon kaj enportadon de la dragenda materialo en la tubon „T" okazigas altaprema akvoradio „Q"$_{akvo}$ tra la blovtruetoj „b"$_{akvo}$. Parto de la akvoradio penetrante en la fundon malkompaktigas la materialon, la alia parto pelas ĝin sub la produktokapon. Ĉe la malsupra parto de la produktokapo la aero „Q"$_{aero}$ alblovata kun hidrostatika superpremo tra la blovtrueto „b"$_{aero}$ konsistigas tri-komponentan miksaĵon kun la akvo kaj kun la solida materialo, kiun la altaprema akvoradio jam malkompaktigis kaj alpelis.

Sekve de la konvena dozado de la aero venigita en la miksaĵon, la mez-nombra specifa pezo de la miksaĵo restas sub la specifa pezo de la ĉirkaŭa akvo. Konsekvence, laŭ la leĝo de la komunikiĝantaj vazoj, en la tub-mekanismo, mergita ĝis profundeco „a", la tri-



bildo n-ro 1.

komponanta miksaĵo en statika stato povas atingi la altecon A
kaj (venkinte la flu-perdon,) en la alteco „A_1" ĝi elfluas el la tub-mekanismo. La supreniradon de la miksaĵo efike helpas ankaŭ la superprema aero, kiu el la blovtruetoj „b"$_{aero}$ klopodas supren al la tubo „T". En la supra parto de la labortubo, ĉe la konvene elformita angulo, la aero apartiĝas disde la miksaĵo, kaj foriĝas suprendirekte, dum la plue kunrestanta du-komponanta miksaĵo „M" iras al la transportbendo, kiu portas ĝin sur la bordon de la rivero aŭ lago aŭ al la loko de la utiligo.

En la praktiko la atingita profundeco „a" estas de 3 ĝis 25 metroj en Hungarlando. La maksimuman profundecon determinas la premo de la aerkunpremilo. Laŭ la supre konigita principo ĉiaj sedimentaj materialoj kun diversaj kalibroj (sablo, ŝtoneroj, malpli delikataj river-rulitaj rompopecoj) estas suprenporteblaj pere de ĝusta elformado kaj dimensiigo de la tub-mekanismo kaj laborkapo.

Sub la laborkapo la sedimenta materialo malkompaktigita de la akvoradioj lokiĝas laŭ la faco de la depresia funelo, kiu formiĝas ĉirkaŭ la rando de la produktokapo. La diametro de tiu depresia funelo proporcie pligrandiĝas laŭ la kresko de la merga profundeco. Se la rando de la depresia funelo atingas la lago- aŭ riverbordon, kaj oni plufunkciigas la aparaton, tiam komenciĝas la ruiniĝado de la bordo mem, kies materialo — fluanta kontinue sub la produktokapon — same povas esti elminigata. Funkciigado de pluraj aparatoj unu apud la alia — se la distanco inter ili estas pli malgranda ol la radio de la depresia funelo — ebligas larĝafrontan produktadon. Tiucele oni movas la tub-aparatojn laŭ la direkto de la rivero por dragi ekzemple en la tuta tranversa sekco de kanalo (bildo n-ro 2.).

Ĉi tiu hidropneŭmatika aparato, patentita krom en Hungarlando ankaŭ en multaj aliaj landoj, funkcias kune kun la same patentita miksaĵ-manipula transportbendo „Dekolt", kiu plulavas la mineralmaterialon, forapartigas la materialon neuzeblan pro tro eta grajnograndeco disde la uzebla, kaj faras la senakvigon ĝis normala terhumideco. La miksaĵ-manipulilo „Dekolt" estas strikte almuntebla al la flosanta dragmekanismo, sed ĝi povas esti alkonstruita ankaŭ al la surborde funkcianta klasifikejo-preparejo. En tiu okazo transportbendo alportas la du-komponantan materialon.

La suprekonigita moderna hidropneŭmatika dragmaŝino konsistas el jenaj ĉefaj partoj (bildo n-ro 3.):

1. Floso (ŝipo) por flosigi la dragmaŝinon.
2. Diversaj maŝinoj — pumpiloj, elektromotoroj, aerpremiloj.
3. Produktotuboj.
4. Subten-mekanismoj por subteni la laborkapojn.
5. Direktadejo.
6. Transportbendo „Dekolt".
7. Funkciiga aparato por „Dekolt"

La avantaĝoj de la hidropneŭmatika dragmaŝino:

1. Ĝi havas grandan funkciadan t. e. dragan profundecon.
2. Sub la akvo neniaspecaj rotaciantaj maŝinpartoj troviĝas sur ĝi. Ĝi ne havas tiajn turniĝantajn elementojn, kiuj kutimas frotdifektiĝi, kaj kaŭzi funkci-perturbon. Tial ĝi estas taŭga por daŭra funkciigado.

3. Ĉe faksperta direktado ne okazas konsiderinda drag-malgajno, nome ĝi ne lasas utilan krudmaterialon en la fluejo de la rivero. Sekve oni ne devas ripetite reflosigi la aparaton al la jam dragita loko.

de 15—16 metroj, El Pollando ofte oni mendas de ni ĉi-tipajn dragmaŝinojn.

5. En Anglujo la firmo „Mining Equipment" aĉetis la licencon, kaj uzas la aparaton por konstati per son-



bildo n-ro 2.



Ĝenerala bildo pri moderna hidropneŭmatika dragmaŝino bildo n-ro 3.
1 Ŝipo 2 Diversaj maŝinoj 3 Produkttubaj 4 Subtenilo 5 Direktadejo 6 Transport-bendo „Dekolt" 7 Funkciigita de „Dekolt"

4. Helpe de multaj produktotuboj la maŝino estas taŭga por elformi samtempe la tutan transversan sekcon de kanalo, aŭ per unu aŭ du produktotuboj ĝi kapablas fari fosaĵon en la fluejo por kondukiloj.

5. Ĝi kapablas elminigi la krudmaterialon lavita, sen ŝlimo aŭ malpuraĵo.

6. Ĝia manipulado estas simpla, ĝin povas direkti 3—4 personoj.

Nuntempaj lokoj de utiligo de la hidropneŭmatika dragmaŝino:

1. Ekde 10 jaroj oni funkciigas ĝin en la sablominejo de la Karbominada Trusto de Dorog en vilaĝo Sátorkő. Taga produktado: 1200 m³.

2. Ĝi funkcias ekde 4 jaroj en la gruzminejo de Nyékládháza apartenanta al la Nord-Hungarlanda Gruzmineja Entrepreno. Produktado: hore po 100—140 m³.

3. Pli malgranda sed pli moderna aparato estas nun en provuzado ĉe la Gruzmineja Uzino de Délegyháza. Ĝia atendebla kapacito estas hore po 70—90 m³.

4. Diversloke en Pollando okazas per ĝi gruzelminigo el profundeco dado la trovlokojn de mineralmaterialo en la interna maro de Irlando.

6. Kun kompetentuloj de Ĉeĥoslovakio daŭras traktado pri fabrikado de multaj aparatoj.

7. Kromaj seriozaj interesiĝoj pri niaj dragmaŝinoj venis el Francujo, Indonezio kaj Jugoslavio.

La inventinto de la hidropneŭmatika dragmaŝino kaj posedanto de la licenco estas dipl. miniñgeniero d-ro Ferenc Lévardi.

La licencon akceptis multe da okcidentaj landoj kaj ĉiuj socialismaj landoj.

Konforme al la indikoj de la mendantoj koncerne la deziratan celon, la dragmaŝinojn projektas en kunlaboro dipl. miniñgenieroj Géza Krupár, Jenő Csongrádi, Imre Törzsök kaj László Dzsida.

Interesiĝoj el eksterlando estas sendotaj al la hungara „Nehézipari Külkereskedelmi Vállalat" (NIKEX) (Pezindustria Entrepreno pri Komerco kun Eksterlando) Budapest V., Dorottya u. 6. Hungarujo.

Tradukis: Dipl. inĝ. *Ferenc Egry*

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

Ĉi-somere oni aranĝis jam la trian fojon en Debrecen la internacian ĥoro-festivalon nomatan pri Béla Bartók. La ĉi-jara festivalo koincidis kun notinda datreveno: antaŭ cent jaroj, en 1868 oni aranĝis la unuan hungaran kantistan renkontiĝon, same en Debrecen, kun partopreno de pli ol okcent ĥoromembroj. Ilian unuigitan ĥoron tiutempe dirigentis Ferenc Erkel. La ĥorokulturo havas malnovajn tradiciojn en tiu ĉi urbo de la Ebenaĵo: en la dekoka jarcento en la kalvinana kolegio de Debrecen oni enkondukis kiel instruobjekton la ĥoro-kantadon.

Laŭ iniciato de György Gulyás, gvidanto de la Kodály-ĥoro en Debrecen, en 1961 oni aranĝis la unuan Bartók-festivalon en la urbo, kun partopreno de multaj eksterlandaj ensembloj. En1966 okazis la dua festivalo, kaj en la nuna jaro la trian fojon renkontiĝis en Debrecen la plej eminetaj ĥoroj de pluraj landoj, inter ili tiuj de Hungario. — La Ĥoro Kodály fariĝis mondiranta ensemblo. Ekde 1958 Leningrád kaj pluraj francaj urboj, la norda havenurbo Riga kaj la Italia Arezzo gastigis la ĥoron kaj plektiĝis novaj kontaktoj, amplekssantaj tutan Eŭropon.

El la riĉa, altnivela programo de la nuna festivalo de Debrecen leviĝis tiu koncerto de la Ĥoro Kodály en kiu la Ĥoro prezentis la Ĥoroverkojn de hodiaŭaj aŭstraj komponistoj. La unueca, bela sonado, escepta muzikeco de la Ĥoro Kodály jam ĝis nun akiris por la urbo merititan famon. La aŭstra koncerto estis vere elstara, festa evento de la festivalo, kaj ĝi donis bonegan bildon pri la hodiaŭa aŭstra ĥoromuziko.

En la ferma koncerto de la festivalo partoprenis ĉiuj ĥoroj en la oratorio de Zoltán Kodály „Psalmus Hungaricus". La unuigitajn ĥorojn, kaj la Fervojistan Filharmonian Orkestron de Debrecen dirigentis Vilmos Rubányi, ĉefmuzikdirektoro de la opero-ensemblo de Debrecen.

POR NIAJ KARAJ INFANOJ

Géza Gárdonyi

Vespermanĝo de Marci

Antaŭ la tagmeza sonorigado Marci faris grandan veturon. Li vojaĝis nek sur la maro, nek sur la tero, nek per flugmaŝino. Kien li do



iris? Li estis supre en Ĉerizlando sur la ĉerizarbo. Kaj se li jam iris tien, li volis gustumi la ĉerizon. Tagmeze, kiam la familio altabliĝis, Marci rigardis en la pladon malbonhumore.



— Tiu ĉi fabosupo ne estas bongusta — li diris kaj flankenŝovis sian teleron. El la viando li manĝis kelkajn pecetojn, sed la fromaĝon li rigardis per la sama subtakso.

— Ne estas bongusta tiu ĉi fromaĝo, li ekparolis, ĝia odoro estas malagrabla por mia nazo.

Aŭdinte tiun ĉi parolon la patrino de Marci, balancis la kapon, sed ŝi diris nenion. Marci leviĝis de la tablo kaj eliris en la ĝardenon ludadi. La infanoj pilkoludis. Posttagmeze la tempo forflugis tiel rapide, ke Marci forgesis ankaŭ pri la posttagmeza manĝo. Ĉe sunsubiro li ekpensis, ke li devus jam iri en la ĉambron.

— Ho, panjo, kiel malsata mi estas — li diris.

La patrino metis antaŭ lin pladon da fabosupo.

— Tiu ĉi jam estas bona fabosupo — ekparolis Marci. Ne estas tia, kia ĝi estis tagmeze. — Kaj li elkuleris la supon el la telero ĝis la lasta guto.

— Mi estas ankoraŭ malsata — li diris. — Patrino, mi petas ankoraŭ ion por manĝi.

La panjo metis fromaĝon sur la tablon.

— Kiel bonan odoron havas tiu ĉi fromaĝo — diris Marci kaj li manĝadis bonapetite el ĝi.

— Estas bonega ankaŭ ĝia odoro Kvazaŭ ĝi degelas en mia buŝo — daŭrigis Marci la laŭdon.

— Kie vi aĉetis tiun ĉi fromaĝon, panjo?

La patrino respondis ridante:

— Kara mia filo, vi mem lasis ĝin tagmeze. Tiun kaj ankaŭ la fabosupon.

Por kio utilas?



Ni havis gastojn. La infanoj ne povis ludi ekstere pro la malbona vetero. Ili petis avoĉjon, ke li proponu ian amuzan ludadon.



— Kiomope vi estas? — li demandis.

— Okope.

Avoĉjo donis al ili ok paperslipojn.

Nu — li diris —, sidiĝu laŭvice unu apud la alian! Unu skribu

demandon sur sian paperon, la najbaro respondu tion, skribante same sur la propra papero. La demendo komenciĝu tiel: Por kio utilas?

La skribaĵoj estis pretaj dum mallonga tempo. La geknaboj laŭtlegis ilin. La kvar demandoj kaj respondoj sonis jene:

1. Por kio utilas la nokto? — Por dormi.

2. Por kio utilas la libro — — Por legi el ĝi.

3. Por kio utilas la kuko? — Por manĝi ĝin.

4. Por kio utilas la ŝuo? — Por tiri ĝin sur la piedojn.

— Nun intermiksu la slipojn! Ĉe kiu estas demando, tiu demandu. Kiu estas plej proksima al la demandanto, legu sian respondon.

Kompreneble eksplodis la ridego, kiam la demandoj kaj respondoj renkontiĝis jene:

1. Por kio utilas la kuko? — Por tiri ĝin sur la piedojn.

2. Por kio utilas la libro? — Por dormi.

3. Por kio utilas la nokto? — Por manĝi ĝin.

4. Por kio utilas la ŝuo? — Por legi el ĝi.

Kiomfoje la infanoj staris aliel, tiel miksiĝis la demandoj kaj respondoj.

Ankaŭ vi provu tiun ludon, sed per aliaj demandoj kaj respondoj.

(Trad.: *Ada Csiszár*)

Korespondi deziras

Memoro pri Julio Baghy kun muziko de Mihaelo Sárosi. Prozo, gitar- kaj fortepianludo, deklamo sur sonbendo. Daŭro: 15 minutoj. Prezo 100 forintoj. Mendebla ĉe Hungara Esperanto—Asocio, Budapest, VIII. Kenyérmező utca 6.

S-ro Jan *Kabla*, oficisto, ul. Mickiewicza 18, PIOTRKÓW, TRYB., woj. Lódzkie, Pollando, kor. pri ĉ. t., int. PM BK kaj kulturaĵojn. Li certe respondos.

13-jara lernanto A. *Tiodorovas*, Str. Tarybines armijos 52—2, KLAIPEDA-8, USSR, Litova SSR. kor. k. ĉ. l. Interesiĝoj pri PM, ĵazmuziko, revuoj, filmo kaj sporto.

Ni eldonas revuon kun adresoj de membroj por interŝanĝado de gramofondiskoj kaj sonbendoj ktp. Ni invitas ĉiujn amikojn al kunlaboro. *Int. Muzika Klubo*, D. K. S. v. Mezibori, okr. MOST, ČSSR.

Kor. k. ĉ. l. kaj int. PM Sándor *Barabás*, Iernutului 28, TG. MURES, Rumanio.

Jenő *Zágoni*, Str. Gábor Áron 30, COVASNA, Rumanio, kol. kaj int. BK pri pentraĵoj kaj kor. pri ties temoj.

25-jara Nikolaj *Starodubcev*, do vostrebovanija, DONJECK-47. Ukr., USSR. int. BK. kun ĉ. l.

33-jara oficisto Boguslav *Sobol*, Mokra Prawa 61a, p-ta SKIERNIEWICE, woj. Lódzkie, Pollando, kor. pri sporto kaj turismo, int PM kaj Bk.

Stefano *Nolipa*, pentristo, BUDAPEST, XX. Ady Endre strato 43. kor. kaj int. BK pri pentraĵoj kun italaj s-anoj loĝantaj en urboj Venezia, Milano, Firenze, Roma, Napoli.

26-jara instruisto Stefano *Pawlik*, LIPICZE 45, pow. Sievadz, woj. Lódz, Pollando, kor. pri historio, pedagogio, sporto, kol. BK, PM.

Barnaula Esperanto-Klubo petas sendi infan-desegnaĵojn por ekspozicio. Rekompenco per desegnaĵoj de siberiaj infanoj aŭ laŭ deziro. Esperanto-Klubo, p. k. 11, BARNAUL-99, USSR.

Nejko M. *Nejkov* kaj 14 klubanoj — 17—25-jaraj — dez. kor. „Ivan Vladkov" Esperanto-Asocio, Ivan Vladkov 21, DRJANOVO, Bulgario.

20-jara studento en Teknika Lernejo (elektraj, ciferaj maŝinoj) kor. pri muziko, fotoarto, filmo, junularaj problemoj, kol. BK, diskojn kun distra muziko ktp. Johano *Sikora*, KRAKOVO 2. Str. Solskiego 22/8. Pollando.

19-jara teknikisto Jan *Romanuek*, Bykowce 82, p-ta Zaluz, pow. Sanok. woj. Rzeszów Pollando, kor. pri literaturo, geografio, junularaj problemoj, sporto.

21-jara laboristo Antonio *Szekeres*, HORGOS, Zadruzni kraj. 78., Vojvodina, Jugoslavija, kor. kun hungaroj.

21-jara Jozefo *Körmendi*, HORGOS, József Attila 3., Vojvodina, Jugoslavija, kor. kun hungaroj pri seriozaj temoj.

Veterana e-isto komunikas, ke li post longa malsano denove estas sana, kaj atendas leterojn de siaj malnovaj amikoj. Florian Deziderio *Paraskivesku*, Poŝtkesto 4. LUPENI, Rumanio.

25-jara Nikola *Dimitrov Gjurnev*, 21-jara Atanaska *Dimitrov Gjurnev* kaj 16-jara Georgi *Dimitrov Gjurnev* kor. pri ĉiuj temoj. Barieva—Smoljansko 8/2, Blagoevgradski, BALDEVO, Bulgario.

RIDETU! RIDU! RIDEGU!

— *Malnovaj muzikistoj* —

En la reĝa kapelo de Ludoviko la 16a oni prezentis „Mizerere" de *Lully*. La reĝo surgenue aŭskultis la komponaĵon, lin do devis sekvi-imiti la tuta kortego. Post fino de la psalmo la reĝo demandis grafon:

— Kio estas via opinio pri la muziko de Lully?

— Por la oreloj ĝi estas ĉarma kaj mola, sed por la genuoj ĝi estas kruda kaj malmola — respondis la grafo.

. . . .

En la pasintaj jarcentoj okazis ofte, ke en diservoj oni prezentis mondecajn melodiojn. Ankaŭ kun Lully okazis, ke foje li aŭdas, ke unu el liaj operoarioj oni kantas dum la meso.

Lully rapide krucsignis, kaj diris:

— Pardonu al mi, Sinjoro Dio, ĝi pretiĝis ne por vi.

. . . .

Mozart ne ŝatis la miraklo-infanojn. Foje talenta knabo staris antaŭ li, kiu bele fortepianludis, sed ne kontentiĝis nur pri tio.

— Mi ŝatus komponi ion — li diris. Mi petas vin, bonvolu diri, kiel mi komencu tion?

— Vi havas tempon al tio — respondis Mozart. Al tio vi devas ankoraŭ kreskadi kaj multe lerni.

— Sed vi jam komponis en la aĝo de 13 jaroj — respondis la knabo.

— Jes, mi komponis — diris Mozart. Sed mi demandis de neniu, kiel mi komencu la komponadon.

. . . .

Rossini komponis en sia aĝo de 37 jaroj la operon Vilhelmo Tell, poste ne plu verkis, kvankam li atingis la aĝon de 75 jaroj. 15 jarojn post la prezentado de Vilhemo Tell iu volis persvadi Rossini, donu vivsignon pri si, ĉar cetere oni forgesos lin.

— Mi ne timas pro tio — respondis la komponisto. Kredu al mi: pli multe oni parolas pri tio, kial mi ne komponas, ol pri tio, kion mi komponis.

GAJAJ MINUTOJ

El la hungara satíra gazeto „Ludas Matyi"

La desegnaĵoj de Sándor Erdei kaj András Mészáros

LA KULPO DE LA PASINTO

De kiam mi scias, ke la avinjo estis matematika profesoro mi ne povas rigardi ŝin.

MALBONŜANCA AŬTOAĈETANTO



Mi mendis ĝin ankoraŭ en 1892, sed nur nun mi ricevis tiun ĉi aŭtomobilon

VOJERARINTAJ TURISTOJ EN BALATON



Sprechen Sie deutsch, mein Herr ? ! (Ĉu vi parolas germane Sinjoro ? !)

SUR HORTOBÁGY

Interpretisto (meze): Mr. Smith diris, kiom ajn ĝi kostas, nur bonvolu paki por li pecon el la miraĝo.

Abono de HUNGARA VIVO en eksterlando

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Sumoj de abonprezo por unu jaro, en pluraj ĉefaj valutoj: Usonaj dolaroj = 1,50; Kanadaj dolaroj = 1,50; sterlingaj funtoj = 0—11—0; okc. germanaj markoj = 6,40; svedaj kronoj = 7,80; norvegaj kronoj = 10,70; danaj kronoj = 10,40; italaj liroj = 940,—; belgaj frankoj = 75,—; svisaj frankoj = 6,60; francaj frankoj = 7,50; nederlandaj guldenoj = 5,50.

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

ANGLUJO
Colle's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH
The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

AŬSTRIO
Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I.
Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO
Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, St. Kilda, Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGUJO
Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BULGARIO
„HEMUS", Pl. Slawejkov 11, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO
P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2.
P. N. S. — dovoz tisku, Leningradska 14, BRATISLAVA

DANLANDO
Ejnar Munksgaard, Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.
Hunnia Books, Norrebrogade 182. I., COPENHAGEN/N.

SUD-AMERIKO
Livraria Brody Ltda., Caixa Postal 6366, SAO PAULO, Brazilo
Livraria D. Landy, Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO, Brazilo.
Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS, Venezuela

FINNLANDO
Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCUJO
Agence Littéraire et Artistique Parisienne, 7 Rue Debelleyme, PARIS 3
Société Balaton 12 Rue de la Grande Bateliére, PARIS 9.

NEDERLANDO
Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

ISRAELO
Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV
Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV
Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA
A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

JAPANUJO
Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO
Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD
Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27. BEOGRAD

KANADO
Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Street West, MONTREAL 18. Que.
Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

ĈINUJO
Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

POLLANDO
P. K. W. Z. Ruch. ul. Wronia 23, WARSZAWA

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO
Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO
Griff Verlag, Über der Klause 7, 8 MÜNCHEN 90
Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34.
Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1.
W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

NORVEGIO
A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

ITALIO
Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA
S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

RUMANIO
OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI
OSEP, ORADEA

SVISUJO
AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200
Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILLL

SVEDUJO
A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, STOCKHOLM 1
A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, STOCKHOLM 5.

SOVETUNIO
Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112-a MOSKVA

USA (Usono)
Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Second Ave., NEW YORK 10028
Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028
Stechert-Hafner Inc. 31. East 10th St., NEW YORK 10003
Magyar Áruház Könyv- és Lemezosztálya, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND

VJETNAMIO
Phong Phat Hanh Bao Chi 17. Dinh Le. HANOI

KOREO
„Chul Bo" PHENJAN

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 2-a kovrilpaĝo

8,— Ft



Sárpilis. Knabinoj ĉe riverbordo en popolarta vestaĵo

Decs (Dep. Tolna). Dimanĉe posttagmeze — en popolarta brodaĵo